Johannes Ramel

# EN LA ERUPTO DE LA FIDO

Klaŭdiforumo

2015

*Johannes Ramel*

En la

# ERUPTO

de la fido

Tiu ĉi libro estas dediĉita por la katolikoj, kiuj troviĝas survoje serĉi la veron de Jesuo, kiu faras la homon libera.

*„Se vi restos en mia vorto, vi estas vere miaj disĉiploj; kaj vi scios la veron, kaj la vero vin liberigos“* (Evangelio laŭ Johano 8, 31-32).

# En la
# ERUPTO
# de la fido

Vivraporto de iama romkatolika paroĥestro

*Johannes Ramel*

El la germana tradukis:
Vinko Ošlak

La bibliaj citaĵoj prenitaj el la esperanta traduko LA SANKTA BIBLIO de L. Zamenhof & kons., tradukita el la originaj lingvoj. British and Foreign Bible Society; printed in Hong Kong.

ISBN 3 - 95 007 71 - 2 - X

© 1997 1-a eldono en la germana origina lingvo: 5.000 ekz.
© 2003 2-a plibonigita eldono en la germana: 5.000 ekz.
© 2014 3-a eldono en la germana: 3.000 ekz.
© 2015 1-a eldono en Esperanto
© 2016 1-a eldono en la slovena lingvo

*Aŭtoro kaj eldonisto:* Johannes Ramel

*Neudastrasse 10*
*A-3375 Krummnussbaum*

Enhavotabelo

ANTAŬPAROLO ……..……………………………………. 8

Ĉapitro 1 **Ĉirkaŭita de la amo de Dio** ......................... 10

A. Mia infanaĝo

Ĉapitro 2 **For de la vizaĝo de la Sinjoro** …………….. 16

A. En la kaptiteco de la katolika pensmaniero
B. Renovigita serĉado de Dio

Ĉapitro 3 **La fajra testo** ……………………………….. 23

A. Agado de mi kiel paroĥestro
B. Sub la mezuro de Dio
C. Tiel la faro de ĉiu estos malkovrita

Ĉapitro 4 **Kaptu la savon** …....................................... 28

A. La enkonduka seminario
B. La decidiĝo por Jesuo

Ĉapitro 5 **Konfirmo de la Sinjoro** …………………... 41

A. Reen en mian laborkampon

Ĉapitro 6 **Gvidita en la tentadon** ……………………  46

A. La unua malekcepto de la anonco
B. Sinpravigo antaŭ la episkopo

Ĉapitro 7 **Fortigita per la forto de la Sinjoro** …………65

A. Serĉante laboron
B. Benita en la profesia laboro
C. Pensiiĝo, por esti libera
D. Karaj gekolegoj!

Ĉapitro 8 **Benita per mia edzino** ….............................. 78

A. La Sinjoro ene de la familio
B. Kiamaniere la Sinjoro gvidas?
C. Ĉu estas permesite geedziĝi?
D. Reciproke donitaj por la geedzeco
E. La proklamo de nia geedzeco
F. La premo fare de la eklezio
G. Ni trovis nin denove

Ĉapitro 9 **Benita per la faro de la Sinjoro** …................ 95

A. De kiu mi estas varbata?
B. Mia servo por la fratoj
C. Ili kunvenas en la domoj
D. Alpaŝi la homojn

Ĉapitro10 **Perspektivo** …………………………..........114

A. La vojo de la fido – kiel la obeo el la fido
B. Sinrevelacio de lia komunumo
C. Kaptu la savon

POSTVORTO …………………………………………...121

# Antaŭvorto

Mia vivo estis ek de la komenco de mia vivo situigita en kamparana familio, en la rondo de granda parencaro, en eta vilaĝa komunumo Korning kun proksimume dudek domoj kaj en la paroĥo Hafnerbach kun sia kulturo kaj historio ene de mia malvasta patrujo. Sur tiu ĉi grundo malfermiĝis por mi alpaŝo al iu pli granda realo super mi. Tio estis la evento, dum kiu mi vekiĝis el la dormeteco de mia infanaĝo. Tio ankaŭ estas la sprono, por ke mi komencis verki tiun ĉi libron. Ĝi estu *konfeso* pri la faroj, kiujn Dio faris sur mi kaj Li ilin daŭre faras. La konfesoj fariĝis foje en la kristana mondo disigaj linioj aŭ eĉ dolorigaj limoj. Mi volas antaŭmeti konfeson, kiu pri Dio prezentas portkapablan tuton kaj al mi donacis lastan unuecon kaj hejmiĝon.

Ek de mia elementlerneja tempo estis por mi pere de la bibliaj rakontoj el la Malnova testamento klare, ke Dio super sia popolo, de Li elektita, agas save. Tiuj ĉi rakontoj havis unu nuran celon: montri, kia Dio estas kaj kion Li faras. Tiel komenciĝis mia vera vivrakonto tie, kie trans la okazintaĵoj en mia vivloko komenciĝis ankaŭ mia rilato kun Dio. Ĝis tie la vojo estis longa. Sed Dio trenis min dum tiu tuta tempo al tiu direkto. Mi jam de ĉiam volis ĝisvivi Dion, la Patron, Jesuon kaj la Sanktan Spiriton, Lin sperti, esti de li prenita. Estis al mi dirite, ke tio estas granda escepto, donita nur al la vere grandaj viroj de Dio. Sed kaŝe mi diris al mi, pro kio Dio ne estus farinta escepton ankaŭ kun mi? Kiel feliĉa mi nun estas super tio, ke laŭ la volo de Dio tio ne estis escepto, sed regulo.

Dio vere volas havi kun mi fidindan komunecon kaj Li ankaŭ pridonacas min per konduto kaj direktigo, kiu min gvidas al *disĉipleco*. Ĉio tamen estas sen iu ajn rito, ĉio rilatas nur la personon. Pro tio nenio estas peniga kaj nenio estas ŝarĝo. Ĉio estas viviga kaj donanta forton por daŭrigi la vojon. Tiel mi rimarkis, ke Dio ankaŭ en nia tempo antaŭvidas certan „eliron el Egiptujo” el la sklaveco sub la kontraŭdia regimento kaj sub devigoj. Nuntempe Li kondukas en „sian landon”, la regnon de Dio, kiu jam sur la tero havas sian adreson, ne nur en la ĉielo. Li igas nin plenigitaj de Lia Spirito, por en ties forto fari agojn, kiuj ne plu estas homaj, sed lumigas Lian agadon.

Ĉio-ĉi kune starigis min sur certan grundon, sur kiu mi laŭ multe pli profunda maniero ol antaŭe travivas mian kredan hejmon, feliĉan sekurecon. Mi rigardas nun ne plu al iu malproksimega ĉielo, sed simple ĉirkaŭ mia vivo troviĝas la mistero de la regno de Dio kaj Lia proksimo. Mi deziras, ke tiu ĉi libro fariĝu vojkondukilo sur la vojo por aliaj, kia malfermiĝis ankaŭ por mi. Mi dediĉas ĝin al la homoj en la katolika medio, kiujn mi ĝis antaŭe renkontadis kaj mi ilin ankoraŭ renkontos.

# 1. ĈIRKAŬITA DE LA AMO DE DIO

Kiam mi pensas pri mia komenco, tiel mi ĉiam havas fortan impreson, ke antaŭ mi jam iu troviĝis, pensinta pri mi, antaŭ ol mi estis en tiu ĉi mondo. Tio povus esti miaj gepatroj aŭ ankaŭ miaj gefratoj, sed aparte mia patrino dum ŝia gravedo. Pli poste mi legis en la Sankta Skribo:

*„Benata estu la Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu benis nin per ĉia beno spirita en la ĉielejoj en Kristo; kiel Li elektis nin en li antaŭ la fondo de la mondo, por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj antaŭ Li en amo; antaŭdestininte nin por filadopto per Jesuo Kristo al Si mem, laŭ la aprobo de Sia volo"* (Efesanoj 1,3-6).

## A. Mia infanaĝo

Mi kreskis kiel la sesa infano en kamparana familio. Mia frato tiam jam havis dek jarojn. Mi havis, ĵus naskita, preskaŭ kvin kilogramojn. Mia patrino pro tio spertis grandan plagon. Mia pezo premis ŝian urinvezikon tiom, ke ŝi troviĝis en danĝero veneniĝi de propra urino. Kuracisto konsilis aborton. Sed mia patrino prefere riskis sian vivon ol mian. Kiel la lasta infano mi rajtis longe kuŝi en la sama lito kun miaj gepatroj. Tio peris al mi multe da sekursento. Mia emocia rilato al miaj gepatroj estis pli forta ol tiu de miaj pli aĝaj gefratoj, kio ilin sporade ankaŭ faris iomete ĵaluzaj.

Kiom longe reen mi povas rememori, mi multe kuniĝis kun infano el najbareco, kiu estis je duona jaro pli juna ol mi.

Iun tagon ni ĵetis etajn lignobastonetojn en la akvon de la vilaĝa akvorezervujo por estingi fajron. Je tiu okazo mi glitis kaj jam mi troviĝis meze de la akvo. Mi eĉ nun ne scias, ĉu la akvo estis malvarma aŭ varmeta. Per miaj manetoj mi tiris min je herbtufoj supren ĝis mia brusto, sed tiam la herbtufo elsarkiĝis kaj mi denove falis en la akvon. Post la tria aŭ la kvara provo mi jam kredis, ke mi ĉesu batali. Mia ludkamaradino, ŝi ĵus iĝis kvar jarojn aĝa, tenis per unu mano la palison de la ĝardena barilo kaj la alian ŝi etendis al mi. Kaj jam mi povis rampi el la akvo.

Kiel ĝoja mi estis, post kompleta purigado de mia korpo denove povi troviĝi en la lito, diri la preĝon por anĝela protekto kaj plene elripozi. Hodiaŭ mi scias, ke mi rajtas min per ĉiuj miaj preĝoj turni al Dio, la Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Li sola posedas la ordonpovon super la anĝeloj. Al Li sola povas esti dediĉita la honoro kaj ne en anstataŭa rolo al Liaj anĝeloj.

*„Neniu forrabu de vi vian premion per memvola humileco kaj kulto de la anĝeloj, entrudante sin en tion, kion li ne vidis, vante blovŝvelinte per sia karna menso, kaj ne tenante sin al la kapo, el kiu la tuta korpo, per la artikoj kaj ligiloj provizita kaj kunigita, kreskas laŭ la kreskigo de Dio"* (Koloseanoj 2,18-19).

Ek de tiam por mi estis klare, ke la vivo estas donaco. Ja mi delonge povus esti morta.

## 1. Mia lernejdeva tempo

Dum mia dviga lernejtempo apud la lernado aparte min okupis, kiamaniere akiri en la lerneja komunumo mian lokon. Pro tio por mi estis la interparolado en la lernejo kaj en la lastaj lernejaj jaroj la teatra ludo grava afero. Mi travivis, kiel en tiu granda komunumo mia ŝirmiteco plilarĝiĝis. Tio por mi estis grave. Ja mi travivis ankaŭ terurajn aferojn kiel avi-adilalarmon, dresuron en la lastaj militjaroj, la enloĝiĝon de la germana *Wehrmacht* kaj poste de la rusa soldataro. La postmilitaj jaroj estis apud la tuta primitiveco de la vivo tamen plenaj da espero. Mi havis mian pajlmatracon en la ĉambraĉo de mia avino. Varmigita briko en la lito dum vintraj monatoj, post la jaro 1947 eĉ jam la elektra lumo, tio estis la mejloŝtonoj de nia bonstato. Sed ĉar miaj gefratoj jam estis tiom pli aĝaj, mi povas revoki nur malmultajn momentojn de nia komuna ludado. Ili ĉiuj jam devis labori. Ankaŭ mi laŭeble frue estis taskigita per certaj laboroj, kiel kolektado de la arbfruktoj por elpremi cidron, por balai la korton, la straton, por alporti hejtlignon, por purigi ŝuojn…

Tiom pli grava sekve estis la dimanĉo. Freŝe lavita de la tutsemajna malpuro, vestita dimanĉmaniere, oni piediris al la preĝejo. Survoje oni renkontis aliajn homojn el la vilaĝo, infanojn kaj plenkreskulojn. Per ĉiu kunveno kun aliaj frekventantoj de la preĝejo kreskis la festa etoso. La preĝejo mem estis per sia sava funkcio kaj kun siaj belaj bildoj iamaniere la fenestro en la ĉielon, de kie sentiĝis veni ankaŭ la sonaro de la orgeno. Okaze de la speciale solenaj diservoj la incensa fumo kovris la altaran spacon per bonodora nebulo kaj desur la ĥorejo la tuta preĝeja spaco estis plenigita per solenaj kantoj, akompane de trumpetoj kaj violonoj, ke la ĉielo mem ŝajnis al

mi proksimiĝi. Ĉio en mi kunvibris, kvankam mi ne povis kunkanti. Sed mi ĉeestis. Tie mi povis vidi kune la tuton de mia vivspaco. Tie ŝajnis al mi tiutempe la mondo kaj la ĉielo kiel harmonia unuo. Kaj ĉiuj havis lokon ene de tio.

Sed mi estis deprimita, ke kelkaj homoj tie ne serĉis sian lokon. Ili ne venis en la preĝejon. Ili estis eligitaj el la granda savanta komunumo de la loko. Mi sentis kontraŭ ili fortan malfidemon. Ili estis por mi tre fremdaj. Tamen tiu ĉi en si ŝlosita mondbildo ĉiam pli ofte estis ĝenita. Mi devis ĝisvivi, ke troviĝas ankaŭ alia mondo. Dum la misia semajno devus esti alparolitaj ankaŭ tiuj, kiuj jam dum jaroj ne venis en la preĝejon. Do, troviĝis tiaj, kiuj estis ekstere kaj aliaj, estinte interne. Kaj nur ĉe tiuj, kiuj troviĝis interne de la eklezio, la vivo povis esti en ordo.

Sed mi ankaŭ aŭdis susuri, ke unu el la paroĥa konsilio antaŭe en la unua benko apud sia edzino havis aferon ankaŭ kun sia servistino. Tiu devis pri la afero silenti, cetere ŝi estus sian laborlokon perdinta. Ĉiuj scias tion, tamen neniu aŭdacas kun li pri tio paroli. Unu el revenintoj de la orientfronto rakontis, ke li pafis virinon en Ruslando, ĉar ŝi ne donis al li sian lastan havaĵon. La homoj en lia ĉirkaŭo tion aŭdis, sed diris pri tio nek unu vorton. Tiaj cirkonstancoj minacis mian ŝirmitecon forte.

Okaze de la festo de l'Korpo de Kristo la tuta paroĥo marŝis sub la solenaj sonoj de la blovmuziko tra la foirvilaĝo. Estis, kvazaŭ la reĝo Davido kun la ligokesto kaj la Dia popolo defilus pretere. Tio estis la bildo de la granda unueco de la tuta loko. Kaj tamen tiu unueco ne posedis sufiĉan forton en la aliaj tagoj de la jaro. La buboj kunvenis el la tuta vilaĝo por batali kontraŭ tiuj el najbareco. Estis ĉiam pli komplike trovi sian apartenon.

## 2. Miaj sekvantaj pensoj

Kaptis min la travivo de soleco. Dum tiaj horoj miaj pensoj vagadis tra la vivo kaj mi rigardis al la ĉielo super mi. Mi emis foliumi en la preĝlibro de mia patrino „Der Weg des Lebens” (La vojo de la vivo), en kiu por ĉiu dimanĉa evangelio troviĝis aparta bildo. Bildoj, kiel Kristo en majesto kiel ĉefpastro, aŭ ankaŭ la malvasta vojo, plena da ŝtonoj serpentinanta supren, aŭ la larĝa vojo, kiu kondukas en la pereon, ili restis en mia memoro. Mi demandis min, sur kiu el tiuj du vojoj mi troviĝas? Mi havis neniun respondon. Mia vivo ankoraŭ ne havis karakteron kaj tamen mi sopiris trovi la ĝustan vojon.

Mi la respondon al miaj demandoj ne trovis plu en la sekureco de la komunumo. Mi etendis min por ricevi la respondon de Dio mem. Apud ĉiuj bonaj komencoj enkreski en la socion de la adoltoj mi tiun vojon ne sekvis plu. Mi serĉis pli ol tion, kion proponis al mi mia ĉirkaŭo. Mi tiam jam havis dekses jarojn. Mi lernis ludi baritonon ene de la blovorkestro. Mi jam rajtis kunludi okaze de kelkaj eventoj. Ĉe mia pli aĝa fratino, kiu estis dungita en iu buĉejo, mi kun la filino de la buĉista familio lernis miajn unuajn dancpaŝojn. La unua bloveto de la amo trairis min akompane de ruĝiĝinta hontiĝeto. Mi trovis min tre senhelpa.

## 3. Mia travivo kun la vorto de la vivanta Dio

Estis dimanĉa vespero. En tiu tago okazis nenio speciala. Mi postenigis min en la mezo de nia kvarangula korto kaj

rigardis kontraŭ la vespera ĉielo. La vespera stelo jam estis videbla. Tiam interna voĉo ekparolis al mi: Kio okazos kun via vivo? Ĝuste tio estis mia plej grava demando. Mi vidis mian vivon ankoraŭ tiel malfermita kiel la vespera ĉielo tio estis. Tiu malfermiteco faris min ĝoja kaj samtempe ankaŭ malkvieta. Mi volis tiel forte scii, kiamaniere evoluos mia vivo, kia aspektos la rezulto de mia vivo. Kiu mi estos por la tuta eterno? Kio konsistas mian vivprodukton, kio estas mia neŝanĝebla personeco? Mi rimarkis, ke temas pri tio, ke mi laboru super tiu personeco. Samtempe mi sciis, ke pli forte temas pri mia vokiteco ol pri mia produkto. Antaŭ miaj okuloj aperis la rakontoj pri la vokiteco, misio de Abrahamo, de Moseo, de tiu aŭ alia apostolo. Nun mi volis scii, kio mia misio estas. Se mi mian mision trovas kaj ĝin postsekvas, tiam mi trovas ankaŭ mian lokon en la eterno. Se mi tion ne trovas, tiam mi egalas al falanta stelo, kiu sian lokon ne trovis kaj nun forbrulas. Mi volis mian poreternan signifon trovi. Kaj estis valore ne perdi tempon. Ĉio devas ankoraŭ en tiu ĉi vivo esti ordigita. Tiel mi ricevis klarecon, kiel granda mia vivo fakte estas. Ĝi ricevas gravecon. Mi devas vekiĝi. Ĉio-ĉi filmkuris en mi en sekundoj ĝis la fino. Mi registris ĉirkaŭ mi nenion.

Mi foriris en mian ĉambreon, kiun mi tiutempe jam povis preni por mi sola. Mia avino jam estis morta. Mi tion aranĝis sen trovi por tio klaran decidon. Mi eksidis kaj malfermis Biblion „Pius-Parsch” kaj metis mian montrofingron sur certan teksteron sur la malfermita paĝo kaj komencis tie legi: *Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas pli ol tiuj?* (Evangelio laŭ Johano 21,15b). Mi sentis varmon ĉe mia koro kaj mi havis kortuŝan impreson, ke Jesuo en distanco de metro kaj duono troviĝis ĉe mi, parolante nun al mi. Tiu ĉi vorto estis tiel viva kaj tiel aktuala! Per ĝi mi travivis mian senditecon kaj mi trovis min en la tuto de la kreitaro sur la ĝusta loko. Ĉio-ĉi

havis certan eternecan dimension. Mi sentis min beata kaj plena de kvieto, jes, plena de destina forto. Mi restis en sento de sentempeco. Nun mi sciis, Jesuo ests spite sian superecon kaj grandecon tiu, kiu min amas de la tuta eterno kaj min kondukas. Tio estis la mistero, kiu ne venis el miaj pensoj kaj sentoj, sed estis al mi „promesita” en certeco. Tiu realo fariĝis mia hejmeco. Tiel mi en tute alia dimensio havis mian sekurecon, kia antaŭe sur la homa nivelo por mi estis perdita.

## 2. For de la Vizaĝo de la Sinjoro

Tiel mi forlasis tiun ĉi altecon de la dio-sperto per la vorto, kaj en la malaltecoj de la vivo mi streĉis miajn pensojn plu. Mia pensado estis tute penetrita de la katolika mondaspekto. Ankaŭ la Sanktan Skribon mi aŭdis nur tra la filtro de la katolika diservo. Tiu ĉiutagaĵo havis palan koloron de la travivaĵo kompare kun la supre menciita travivaĵo. Ankaŭ mi konis la senperan leviĝon de mia koro al mia Kreinto. Mi ŝatis la mallongajn memformitajn frazojn kiel preĝon pli ol la lacigan ripetadon de la parkerigitaj preĝoj. Mi ankaŭ povis konstati la diferencon. Se mi preĝis per propraj vortoj, mia rilato al Dio estis viva kaj senpera. Se mi elparolis la formulitajn preĝojn, ili restis sen reeĥo.

## A. En la kaptiteco de la katolika pensmaniero

Kiam mi en mia ĉambro legis kaj aŭskultis la vorton de Dio, en mi troviĝis varmo, ĝojo, amo kaj kvieta progreso. Estis la vivanta vorto de Dio. Nun mi denove devis sinki en la vivmedion de mia ĉiutagaĵo. Mi tamen devis denove pripensi la vortojn el la Sankta Skribo. Mi estis senpacienca super tio, kiamaniere ties eldiroj povus esti konkretigitaj ĉe mi. Troviĝis certa promeso rilate mian vivon. Kaj nun tio devus esti rapide efektivigita. Tiu plenumiĝo fariĝus mia vivenhavo. Tiel mi komencis ĉion entrepreni mem. Mi preparis por mi propran koncepton por tiun celon atingi. Sub tiu arbitra povo mi renkontis la priskribon de Paŭlo en ties epistolo al Romanoj 10,2: „… *ke ili havas fervoron al Dio, sed ne laŭ scio*!" Tiu ĉi arbitreco plene korespondis kun la katolika ordo. Mi havis opinion, ke mi fariĝu katolika sacerdoto.

Tiu penso plenigis min samtempe per timo kaj angoro. Mi antaŭsentis la tropostulecon de celibata vivo, la povon de la katolika eklezio super min. Tio ne estis la parolo de Jesuo antaŭ mi kiel tiam antaŭe. Nun mi spertis certan superpostuleman Dion, kiu lasis al mi neniun liberon, kiu promesis al mi samtempe ankaŭ certan povon kaj influon, la fascinon de la hierarkiaj ŝtupoj tien supre. Li ne postlasis en mi ĝojon, amon kaj pacon, sed streĉon, riskon kaj premon. Temis pri la bildo de Dio, de la homoj tiel formita, kiel la Dia popolo tiutempe faris. Farita el oro kiel fascina aperbildo, tamen idolo en la okuloj de Dio.

Sub tiu ĉi premo mi komencis agi. Mi esprimis al miaj gepatroj kaj al mia tuta familio mian opinion, ke mi volas fariĝi paroĥestro. Ankaŭ ĉi-foje ia hororo disvastiĝis super ni ĉiuj. Ili timis, ke en la familion povus bati malfeliĉo, se ili ne

akceptus tiun mian aspiron. Mia fratino diris: „Se en ĉiuj tiuj jaroj unu bovino malsaniĝas kaj pereas, tio kostus same kiel la studado de Johano.” Mi esperis, ke miaj gepatroj mian intencon estos malakceptintaj. Samtempe mi diris al mia patro, ke li diru pri la afero al la paroĥestro okaze de la dimanĉa diservo. Kontraŭ ĉiu atendo mia patro parolis kun la paroĥestro. Ĉio komencis ruliĝi.

## 1. Mia studado en Horn

En Septembro 1953 mi venis al Horn en la seminarian mezlernejon. Studento de medicino, poste fariĝinta pastro, preparis min por la akcepta ekzameno. En la sentegmenta aŭto *Jeep*, kun litkovrilo kaj la nepra pakaĵo malantaŭ mi, mia patro, frato, mia paroĥestro kaj mi la unuan fojon veturis transdanuben. Estis kvazaŭ veturo de la tiu ĉi en la alian mondon, pli kun zorgoj ol kun atendoj. La veturilo *Jeep* estis prunteprenita de la komerca firmao *Lagerhaus*, kie mia frato estis dungita. Ni estis en Horn enloĝigitaj en iu pli posta kazerno. Mi tuj eniris kontakton kun mia litnajbaro el Supra Aŭstrio, dum ni preparis niajn litojn. Li fariĝis mia bona amiko dum tiu tempo.

Vere „ekzotika” prezentiĝis al ni la filo de persa diplomato. Ni simple lin nomis *„Perso”*. Li kapablis ruli sin trans 15 litoj, sen fali tra iu el interspacoj. Jam en la unua semajno ni havis la horon de la latina. En tiu nova mondo mi estis pli spektanto ol aganto. Estis por mi klare, ke mi devas investi tutan klopodon por povi naĝi kune. Kiam mi rimarkis, ke mi tamen ne fiaskis, mi tiel ankaŭ trovis firman plankon sub miaj piedoj. Mia rigardo direktiĝis al la horizonto de sukceso, de

renomo. Mia vivovojo startis. Mi ĝuis ankaŭ mian ĝojon dum la libertempo en la rondo de multaj amikoj kun samaj celoj. Bone efikis sur mi, esti ŝatata. Intertempe tamen anoncis sin ankaŭ ia nedifinita amimpeto, atendinta esti plenumita. Sed nia atento estis pli kaj pli klare direktita al la eklezia kariero. Episkopoj, eĉ ankaŭ la kardinalo, honorigis nin okaze de la festotago per sia vizito. Intertempe ni estis transloĝigitaj en iaman hotelon en Rosenburg. Oni aranĝis kapelon el ligno. La liturgio atingis siajn pintajn momentojn fare de la eminentaj klerikoj, kie la antaŭe preparita scenaro fariĝis tiel videbla. Sed ĉio-ĉi ne povis ŝtopi certan vakuon, kiu ĉiam denove aperis. Mi preĝis antaŭ la Plejsankta en la preĝejo. Tamen nenia vivsigno revenis. Nun mi komprenas, ke tio estis horora misvojo. Nome, Dio volas esti adorata en spirito kaj en vero kaj ne pere de materia objekto. Mi provis prezenti al Dio ultimaton. Sed ĝi ne estis respondita. Post kvin jaroj, sen devi jaron ripeti, mi faris mian abituron „senbalbute", do sen ripetekzameno.

## 2. Mia teologistudado en St. Pölten

Nun venis tempo, transpaŝi la sekvan ŝtupon, nome la filozofian-teologian altlernejon en St. Pölten. Ni estis enloĝigitaj en konstruaĵo, nomita *Alumnat*. Temas pri monaĥeja domo kun arkadoj, interna korto kaj altkonstruita muro. En la unua jaro ni dormis en komuna dormsalo – en nia ĵargono nomita „*Gruft*". Baldaŭ ni estis vestitaj per la signo de kleriko, per talaro. Tio okazis en intima ĉeesto de la episkopo en la episkopa kapelo.

En la katedralo ni sidis en la presbiterejo, malantaŭ de ni estis la arte formitaj seĝoj por prelatoj kaj altrangaj pastroj. Desupre pendis orumitaj portretoj de la apostoloj. Por la episkopo tri ŝtupojn pli alte troviĝis baldaheno kun la episkopa blazono, kaj la episkopa seĝo. Tie mi travivis en la episkopaj servoj la tiam pli grandan komunumon de la diocezo ene de la plene ekipita loka preĝejo. Denove mi renkontis sekurecon, kian mi ĝuis kiel eta infano en nia paroĥa preĝejo. Temis pri sekureco, kiu kreskis el certa komuneco. Sed ankaŭ tiu ĉi sekureco ne daŭris. La studado peris al mi parte kaj ŝajne ordigitan tuton koncerne la religian instruon de la katolika eklezio, sed samtempe Dio ne estis ĉeestanta proksime. Ĝuste tio faris min neelteneble soleca. Tiu ĉi soleco ne povis esti forigita eĉ fare de la frateco inter la studkolegoj.

## B. Renovigita serĉado de Dio

Tiel mi malfrue vespere ankoraŭfoje enpaŝis la kapelon, eksidis en la lasta benko kaj diris en la aeron antaŭ mi: „Sinjoro, mi ne volas forlasi la kapelon, ĝis Vi Vin al mi revelacias, kiel tiam en mia ĉambreto.” Mi preparis min por pli longa atendado. En mi viviĝis la vorto *„Patro”*. Mi diris: „Zorgu pri mi, se Vi estas mia Patro!” Post tio mi eksilentis por aŭdi, kian respondon mi ricevos. Nur post kelkaj minutoj venis al mi la frazo: *„Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon”* (Johano 3,16).

Denove venis eldiro, Dio amas ankaŭ min – kiel mi jam travivis tion en mia ĉambreto. Se Li amas la mondon, kiu kontraŭ Dio kondutas malamike, tiam en tio ĉi ankaŭ mi estas

konsiderita. Je mia surprizo ankaŭ mi povis kredi tion, kion tiu ĉi versiklo eldiras. Jes, mi estas amata, nome, de Dio. Mi delikate gratis la haŭton de mia mano kaj diris al mi: Se tiel, do ankaŭ mi povas min akcepti, ja mi estas akceptita de Dio. Post tiu ĉi malsato de mia animo mi foriris satigita en kvieto dormi. Tiun konfirmon povis doni al mi neniu sakramento, neniu certigo de iu sacerdoto. Kaj tamen mi ne bezonis tion al mi persvade rediri por tion kredi. Mi lasis tion simple validi. La vorto de Dio havas validon en eternon. *„La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos”* (Mateo 24,35).

La vorto de Dio havas forton, kian neniu homo el sia propra aŭtoritato povas doni. Tio ĉi venas rekte el la aŭtoritato de Dio.

## 1. La graveco de la tradicio

Kaj denove mi estis plenkovrita per scio kaj animprizorgaj konceptoj por tiel esti preparita por la animprizorga laboro. La influo super la homojn koncerne ilian kredon estis fascina. Temis pri partopreno ĉe la povo de la eklezio kaj por la eklezio. Tiamaniere devus la eklezia komunumo kreski. Per la servo de la eklezio ĉiu kredanto devus esti prizorgita kaj formita, por ke tiu laŭeble bone sin subigu al la tuto de la eklezio. Mi mem fariĝis totala posedaĵo de la eklezio. Kien la episkopo min sendos, tie do estos mia loko. Por tion plenumi mi ankaŭ ricevus la adekvatan komisiitecon de Dio. Tiel mia fido estis plene orientita al la ĉiama decido de la episkopo kaj al tiu graco de Dio, kiu fluis al mi pere de la eklezio. Mi dronis en tiu eklezio kaj nur plu pere de la eklezio, la papo, la episkopo, la sakramentoj, tiel mi opiniis, mi atingas mian Dion. En tiu enlitiĝo mi unuflanke posedis la plenan garantion fare

de la eklezio, aliflanke la freŝa aero de la spirado de Dio iĝis ĉiam pli maldensa. Dio mem ne estis rekte atingebla, ĉar tio estis Dio de la eklezio. Tiel ŝajne ĉio venis de Dio pere de la eklezio, kiu la sola klarigis, kion Dio diris.

Sub la pezo de jarmilojn daŭrinta tradicio mi disponigis finfine al tiu supera instanco ĉiujn finajn decidojn. Tiamniere mi sublume de la II-a Vatikana Konzilio 29-an de junio 1963, okaze de la festotago de Petro kaj Paŭlo estis konsekrita por sacerdoto. La primica festo en mia hejma paroĥo sendis min al nova tasko. Brile alta apreco al mi subite proponiĝis kiel frapo kaj mi renkontis ĝin kun forta kontentiĝo en mia nova idento kiel pastro.

# 3. La fajra testo

Ĉe ĉiuj miaj pastrecaj agoj mi rimarkis, ke mi ĉiam agis sub la taskigo kaj sub la aŭtoritato de la eklezio. Tio donis al mi la senton de grandega majoritato, kiu staris malantaŭ mi. Tiun ĉi dorsodefendan vandon mi ne volis perdi. Tiel mi klopodis pere de mia engaĝiĝo sur la kampo de instruado, de la porjunulara laboro kaj de la diserva liturgio certigi la aprobaprezon ĉe mia eklezio. Tiel mi volis progresigi la paroĥan komunumon laŭ la spirito de la konzilio, kiu desegnis al ni la idealan bildon de la eklezio. Tio postulis flanke de la kredantoj fortan komutŝanĝon kaj novan orientiĝon. La enhejmiĝo ene de tiu nova eklezia bildo iamaniere ne montris veran sukceson. Ĉio estis trapensita kaj klare formulita, tamen ne vere viva. La liturgio de tiu tempo okazis en la ĉiama nacia lingvo, sed kie estis apud ĉio-ĉi Dio mem?

Kompreneble mi provis vivi ankaŭ mian tute personan rilaton al Dio. Mi preĝis por gvidi mian animprizorgadon dum miaj predikpreparoj kaj mi ankaŭ sentis la proksimon de Dio. Sed pli ofte restis sopiro ol plenumiĝo. Venis ankaŭ reeĥoj flanke de la kredantoj, kiuj min ĝojigis. Nur, vera trapenetro tio ne estis.

## A. Agado de mi kiel paroĥestro

Mia deziregо, mem gvidi paroĥon, anoncis sin ĉiam pli forte. Mi volis havi nenian rutiniĝintan paroĥon kun malnovaj tradicioj, tiel estis por mi favora okazo, ke en Golling ĉe Er-

lauf estis konstituita nova paroĥo. Mi aspiris atingi la postenon de paroĥestro tie. Kiel kaplano de Pöchlarn mi la evoluon de la aferoj tie povis observi unu tutan jaron. Per la formiĝo de la foirkomunumo kaj de la paroĥo mi estis instalita kiel la nova paroĥestro de Golling ĉe Erlauf fare de la episkopo. La tuta loko tion spertis kiel avancon. Regis etoso de novaj perspektivoj. Mia alirmaniero al la homoj vekis novajn esperojn.

Ekregis forta komuneca konscio. Preteco kunlabori en la paroĥo estis granda. Ni komencis per festenoj, dum kiuj oni ĝuis tiun ĉi novan komunecan senton. Eklezia ĥoro, paroĥaj konsilantoj estis preparitaj. Okazis grandskala disdivido de la roloj.

Finfine ni fondis unu aldonan dancgrupon kaj novan societon laŭ la sacerdoto kaj popolkuracisto Kneipp. La preĝejo ricevis artan ekipaĵon fare de profesoro Sepp Mayrhuber per aparta lustrotekniko kaj mozaikoj. Li tion faris kun plena idealisma elano, ja li loĝis ene de la paroĥo. Nova orgeno, paroĥa centro kaj finfine la paroĥejo estis masonitaj. Ĉion-ĉi la paroĥo devis kunfinanci helpe de paroĥaj festenoj, bazaroj kun antikvaĵoj kaj tombolo…

## B. Sub la mezuro de vorto de Dio

Jam mi troviĝis transe de la enviviĝo en la eklezio meze de socia formadproceso, kiu porekstere ŝajnis sukcesa paroĥa vivo. Tamen tio ne konformis al la mezuroj de la biblia komunumo. Sur kio mia laboro estis konstruita? Mi masonis

surbaze de la socio, de la kulturo. Mi masonis surbaze de la eklezio, kiu mem elektis sian grundon. Ĉu vere Jesuo estas la grundo, aŭ tio estas la hodiaŭa „*Petrus*”, la papo, kun sia episkopa kolegaro? La katolika eklezio alte aprezas, ke ĝi estas konstruita sur Petro. Ĝuste pro tio ĝi ankaŭ fundamentas sur la homa faro. Sed la komunumo de Jesuo estas la faro de Jesuo. Li ĝin konstruas. Paŭlo diras: „*Ĉar neniu povas meti alian fundamenton krom tiu, kiu estas metita, tio estas Jesuo Kristo”* (1 Korintanoj 3,11). Ankaŭ Petro la fundamenton de la komunumo ĉiukaze ne ligis kun si mem, sed kun la roko, t.e. kun Kristo mem: „*… al kiu alvenante, kiel al ŝtono vivanta, de homoj rifuzita, sed ĉe Dio elektita, honorinda, vi ankaŭ, kiel ŝtonoj vivantaj, konstruiĝas domo spirita, sankta pastraro, por oferi spiritajn oferojn, akceptotajn de Dio per Jesuo Kristo. Ĉar estas enhavate en skribo: Jen mi kuŝigas en Cion bazangulan ŝtonon, elektitan, valoregan; kaj kiu lin fidas, tiu ne estos hontigita”* (1 Petro 2,4-6).

Ĉu do mi kun mia eklezio ankoraŭ staras sur la ĝusta fundamento? Aŭ la arbitreco de la popolo de Dio de Sinajo envenis ankaŭ mian eklezion? Ĉu mia eklezio faris por si propran bildon de Dio kaj alvokas kiel Aarono al festeno por la Eternulo, eĉ se temas pri idolo?

Moseo troviĝis sur la mondo de Dio kaj li ricevis la ordon por la tendo de la renkonto kaj por la diservo. Sed la popolo de Dio ne volis plu atendi Moseon kun la instrukcioj de Dio kaj komencis arbitre starigi propran diservan ordon: „*Kiam Aaron tion vidis, li konstruis altaron antaŭ ĝi; kaj Aaron proklamis kaj diris: Morgaŭ estos festo de la Eternulo”* (2 Moseo 32,5).

Ili ambaŭ, Moseo kaj la popolo de Dio, estis okupitaj pri la sama temo: pri la vivordo de la komunumo antaŭ la Eternulo. Moseo lasis ĝin doni al si de Dio. La popolo laŭ propraj religiaj imagoj mem faris por si tian ordon. Tiu arbit-

reco de la popolo fariĝis laŭ la juĝo de la Sankta Skribo servo al idolo.

*„Tiam la Eternulo diris al Moseo: Iru, iru malsupren; ĉar malvirtiĝis via popolo, kiun vi elkondukis el la lando Egipta. Rapide ili forflankiĝis de la vojo, kiun Mi ordonis al ili; ili faris al si fanditan bovidon kaj adorkliniĝis al ĝi kaj alportis al ĝi oferojn, kaj diris: Jen estas viaj dioj, ho Izrael, kiuj elirigis vin el la lando Egipta"* (2 Moseo 32,7-8).

Tial Aarono cetere ne estis abolita, sed li devis akcepti la instrukcion de la Eternulo. Malantaŭ tia misdecido ĉiam staras la premo flanke de la misgvidita popolpieco: *„Kaj Moseo diris al Aaron: Kion faris al vi ĉi tiu popolo, ke vi venigis sur ĝin grandan pekon?"* (2 Moseo 32,21).

La demando estas:

*Ĉu mia eklezio lasos sin korekti de la vorto de Dio, kiel Aarono lasis korekti sin?*

## C .Tiel la faro de ĉiu estos malkovrita

Okaze de la juĝa fajro de Dio tio ĉi estos ekzamenita: *„Sed se iu konstruas sur la fundamento oron, arĝenton, multekostajn ŝtonojn, lignon, fojnon, pajlon, ĉies laboraĵo evidentiĝos; ĉar la tago ĝin montros, pro tio, ke ĝi estas malkaŝita en fajro"* (1 Korintanoj 3,12-13).

Ĉu do mia vivofaro de la animprizorgado en tiu fajro povos rezisti? Jesuo diras: *„Ĉar sen mi vi nenion povas fari"*

(Johano 15,5). Ĉiam do unue temas pri la senpera rilato al Jesuo kaj ne pri ia perita rilato. Sed kie restas tiu senpereco de la efikado de Dio kaze de mia servo? Paŭlo povis diri: *„Kaj mia parolo kaj mia prediko estis ne en allogaj paroloj de saĝeco, sed en elmontro de la Spirito kaj potenco”* (1 Korintanoj 2,4-5).

Mia prediko tamen fundamentas prefere sur la homa saĝo. Sed la potenco de Dio, kie ĝi estas? Tiu potenco de Dio ne povas esti preparita de iu ajn homa organizo, ĝi revelaciiĝas de Dio sole. Ĝi ankaŭ ne povas aŭtonomiĝi en la eklezio, ke oni tiel povus ĝin manipuli kiel per instrumento.

Nun por mi fariĝis klare, ke mi devas alveni la fonton. Ne mia propra klopodo, ne mia agado estas la decida afero, sed la ago de Dio en mia vivo. La silento de Dio estas la plej granda plago. Neniu vojo estas malfermita por akiri la majestecon de Dio. Samtempe al mi eklumis io, kie en mia vivo estis spertita tia ago de Dio. Kun miaj dekses jaroj en mia ĉambreto, en la vorto de Dio en la kapelo… En tiu ĉi direkto mi povus trovi tiun fonton.

# 4. KAPTU LA SAVON EN JESUO KRISTO

En la tempo de mia serĉado je nova orientiĝo mi estis atentigita pri seminario en Wiener Neustadt. Unu el la partoprenantoj, laborinta pri la televida serio „Wozu glauben” (Kial kredi) de ORF diris al mi post mia prelego: „En Wiener Neustadt okazas seminario, ĉe kiu temas nur pri la Sankta Spirito.” Tio lasis en mia kapo sparki. Mi pensis ĉe mi: Precize tion ĉi vi bezonas. Al vi mankas la potenco de la Sankta Spirito. Mi surprizige ricevis liberan lernejan tagon kaj mi veturis plena de atendoj kun mia paroĥestro kaj kun iu fratulino el la pilgrima loko Maria Taferl tien.

## A. La enkonduka seminario

Mi veturis al tiu aranĝo sen antaŭsupozo kiel juna virkapreolo, kiu ne rekonas jam danĝerojn kaj malamikojn. Por mi estis grave, ke la seminario estis aranĝita fare de la katolika eklezio. Mi opiniis, ke la katolika eklezio estas la garantio por la vero kaj ĝusta kredinstruo. Kun tiu bonintenca fido Dio rigardis preter mia tempo de nescio antaŭen kaj uzis tiun ĉi vojon por min konduki al la savanta evangelio. Ne okazis jam ekscentraj formoj de pieco, kie temas pli pri la karno ol pri la spirito.

Mi estis tie akceptita ĉe ĉiuj partoprenantoj en kortuŝa renkontiĝo. Estis, kvazaŭ ni estus nin jam de ĉiam konantaj kiel bonaj amikoj en la fido. Per kantado kaj spontanaj preĝoj montriĝis ĝojo pri Dio, kiel mi tion ĝis tiam nenie konis. Ni

ĉirkaŭprenis unu la alian kaj ni interŝanĝis spertojn pri Dio. Kelkaj eldiris benantan vorton, kio min tuŝis kore. La preleganto montris al ni la spiritan ordon, sub kiu Dio per nia spirito revelaciiĝis.

La Resurektinta laŭ liaj vortoj iras tra la ŝlositaj pordoj de diversaj konfesioj al ĉiuj gefratoj en la fido. Fakte troviĝis en nia grupo partoprenantoj el la katolika kaj la protestanta eklezioj kaj de iu libera kristana eklezio (Freikirche). Tiun ĉi denominacian nomon mi aŭdis mian unuan fojon. Pli poste mi klare vidis, ke la liberaj kristanaj eklezioj estas komunumoj de kristanoj, havantaj la originan atestadon de la Sankta Skribo por la fundamento de sia kredo kaj vivo. Ili ne apogas sin je privilegioj de la ŝtato aŭ je certa evoluigita instruo paralele al la Sankta Skribo. La alpaŝo al tia komunumo sekvas al ĉies individua decido en la fido al Jesuo, ĉar tiu en tio povas realigi sian kredovivon kaj tion ankaŭ volas fari.

Precipe tiuj ĉi homoj el la liberaj kristanaj eklezioj ŝajnis tiel spontanaj, aŭtentaj kaj kormolaj. Ĉu tio venas de tio, ke la korkiĝoj el la apartaj piecaj kaj kredaj praktikoj ĉe ili ne trovis lokon? Ili neniam aperis artifikaj per certa kredkulturo kun siaj historiaj ŝarĝoj kaj misvojoj. Dum iu adora tempo mi rimarkis, kiel antaŭ mi masoniĝis certa spirita blokiĝo. Mia preĝo haltis. Mi diris: „Sinjoro, helpu min transen de tio ĉi!” La aliaj gefratoj subtenis min en mia preĝo. Kaj la muro antaŭ mia spirito estis tiel denove forprenita kaj mi havis denove mian liberon adori Dion. Ĉu temis pri fortresoj kaj raciaĵoj, pri kiuj parolas Paŭlo en la 2-a epistolo al Korintanoj 10,3-6, aŭ temis pri la antaŭsento de io malaŭtenta?

## 1. Entuziasmigita de Dio

Dum paŭzo inter aliaj preĝis pli aĝa kredfratino pro miaj problemoj kun reŭmo en regiono de mia ŝultro. Ŝi neobserveble staris malantaŭ mi. Dum ŝia konfideca preĝo mi havis impreson, ke nun ĉio en mia vivo venas sur la ĝustan lokon. Ĉia nekontento retiriĝis; miaj pensoj, sentoj, mia spirito enripoziĝis sur sia ĝusta loko. Mi rigardis tra la fenestro en ĝardenon kaj kontraŭ la ĉielo kaj mi longtempe ne movis min deloke. Mi restis en tiu nova realo, en kiu Dio estis al mi tiel proksima kiel la Kreinto kaj la Patro. Ĉi-okaze mi rememoris la vortojn de Jesuo en la evangelio laŭ Johano:
*„Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li”* (Johano 14,23).

## 2. Agado de Dio trans ĉiuj limoj

Dum la tagmeza paŭzo mi iris en la ĝardenon iom distance de la aliaj, dirante: „Sinjoro, mi ĝojas, ke Vi estas tiom grandanima, irante ankaŭ al la kristanoj ekster la eklezio katolika. Nun ankaŭ mi volas preni por mi tiun ĉi liberon kaj havi komunecon kun ili. Ja kion ajn vi faras, tio ne povas esti falsa, eĉ se la katolika eklezio tion ne rigardas kun fervoro.” Tiel mia sekureca stato en la katolika eklezio transiris en novan sekurecon kun la viva kredo. Tio estis tiagrada malstreĉiĝo, kaj multaj problemoj, kiuj min ĝis tiam akompanis, defalis de mi. Estis ĝojo, rajti ĉeesti la nove malkovritan ordon de Dio. Tiun ĝojon povis aldone kun mi dividi tiel multaj homoj el diversaj vivofonoj. Nenio troviĝis inter ni, kio estus nin sepa-

riganta, kion ni reciproke malakceptus. La ĝojo super la kredfratoj samtempe estis ĝojo je Dio. Tiel en niaj koroj kreskis senĉese danko al Dio, sen ke iu ajn al tio devus esti stimulita. Inter la partoprenantoj regis esperriĉa atendo je ĉio, kio en la sekvaj horoj nin ankoraŭ renkontos.

Retrorigarde mi tamen rekonas, kiel forte tiam estis manipulite per sentoj kaj per la komuneca spirito kaj ĉio dekomence estis interpretita kiel la efiko fare de Dio. Sed vera pento kaj sinturno al Dio tamen ne jam troviĝis fronte de ni. La pento estis substituita per la konfespreno, la sinturno al Dio per publika volproklamo. Tiel cetere okazis sindecidoj por Jesuo, sed ĉu troviĝis ankaŭ konvertiĝoj kun konsekvencoj? Ĉu troviĝis ankaŭ la aspiro releviĝi en Kristo? La komunumo portis la individuon kaj lin konfirmis. La katolikaj misinstruoj povis resti retenitaj, kiel mi ankoraŭ al tio revenos. La sentoj povas la veron de la vorto de Dio surkovri. La sentoj povas la atendatan konvertiĝon malebligi, se la homo en tio tro forte insistas stari mem en la centro.

## B. La decidiĝo por Jesuo Kristo

Fine de la seminario la de ni trovitaj promesoj de Dio, la ordo de la savo, devus klardecide trovi akcepton en pura fido. Tio devus sekvi kvazaŭ per leĝliga deklaro. La unuan fojon por mi fariĝis klare, ke la fido ne estas io nebula, same ne nur akcepto de certa kredinstruo, sed la fido de mia koro al Jesuo, ke li povas min savi kaj ŝanĝi. Tio anticipas, ke en mi ekregu klaro pri lia resurekto kaj pri tio, ke li vivas en unika plenpovo, kiu etendiĝas super la ĉielo kaj la tero. Li havas povon

super ĉiuj definitive validaj ŝanĝoj direkte al la bono. Li estas pli povohava ol la tuta mizero kaj malbono en la mondo.

Tamen mi sciis, en mi troviĝas nesuperpontebla deficito – la peko. Ĝis tiam mankis al mi la gloro de Dio. *„Sed nun, ekster la leĝo, justeco de Dio montriĝis anstataŭ per la leĝo kaj la profetoj; nome, la justeco de Dio, per fido al Jesuo Kristo, por ĉiuj kredantoj, ĉar ne ekzistas diferencigo; ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio; pravigite donace de Lia graco, per la elaĉeto, kiu estas en Kristo Jesuo"* (Romanoj 3,21-24).

Tiel Jesuo Kristo komencis la batalon, eltiri nin el la regno de la mallumo kaj preni nin en la regnon de sia lumo. Kiel aglo prenas siajn minacatajn idojn kaj ilin forprenas, tiel elprenas li nin el ĉia malbono. La kondiĉo estas, ke ni lasas nin preni de liaj manoj, nin plenigi de lia savanta potenco. Ĉar li savas nin ne sen nin sciigi per sia evangelio kaj sen nia konsento per la fido. Tial estas grave, ke ni havu scion pri la misio de Jesuo, por povi malfermi la pordon en konfido, donante tiel al Jesuo enirpovon en la centron de nia vivo.

## 1. La kontrakto

La ŝlosilo aŭ la pordo en la verecon de la nova vivo estas iamaniere kontrakto inter Jesuo kaj mi. Tiun ĉi kontrakton starigis neniu pli malgranda ol Dio mem. Ĝi estas sigelita per la sango de Jesuo. En tiu ĉi kontrakto estas konfirmite, ke ni sen Dio vivas en la ombro de la morto, ke Dio tiom amis la mondon, ke Li sian ununaskitan filon donis, por ke ĉiu, kiu en lin kredas, ne estos perdita, sed havas la eternan vivon (*komp. Johano 3,16*). Kion do ni kredu, kion ni al Jesuo fidu? Ke li havas la plenan povon super la tuta homa senvaloro, doni al ni

la eternan vivon (*komp. Johano 17,2*). Ĉu mi tion al li fidas? Kiamaniere Jesuo tion faras?

Li havas tiun plenpovon de sia Patro. Tion konfirmis la Patro, revokinte lin el la mortintoj. Ankaŭ la releviĝinta Jesuo restas nedisigeble ligita kun sia homa naturo. En la Dio-homo-esto Jesuo kiel la resurektinta estas la Dia vivo en sia resurektinta korpo, tiel ke li estas tute apoteozita. Li nuligis ĉiujn pekojn de la mondo anstataŭe je la prezo de sia sango. La peko havas en li nenian povon plu. Li estis levita al la dekstro de la Patro. La ligo kun la homaro estis negative videbla en la ĉeniĝo de la peko ek de Adam ĝis niaj tagoj. La novo tamen estas nun la ligo de la homaro en la sava senco en Kristo Jesuo. Fariĝis eble, la vivon, la nerompeblan vivon, kiu troviĝas en la Dia rilato, nian homan eston ŝanĝi, ĉar nia homesto sin apogas je nova elirpunkto. Ni estas tiel naskitaj el Dio.

Flanke de Dio la kontrakto estas plenumita. De nia flanko Li atendas nian subskribon. La subskribo konfirmas, ke tio, kio troviĝas skribe en la kontrakto, havas validon. Mi sekvas la instrukciojn de la kontrakto. La instrukcio diras: Mi kredas, mi fidas al Jesuo, ke li povas doni al mi la eternan vivon kaj ke li ĝin al mi donos kaj mi volas Jesuon tiel alpreni.

*„Li venis al siaj propraĵoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis. Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo, kiuj naskiĝis nek el sango, nek el volo de karno, nek el volo de homo, sed el Dio”* (Johano 1,11-13).

Jesuon tiel alpreni efektivigas novan naskiĝon el Dio. Nur tiaj povas vidi la regnon de Dio.

*„Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio”* (Johano 3,3).

Tiu kontrakto estas komparebla kun la nupta kontrakto. Ek de la nuptiĝo la partnero ne apartenas plu nur al si mem,

li/ŝi apartenas ankaŭ al sia amata partnero kun sia tuta personeco. Ĝuste tiu ĉi aparteno faras la amfeliĉon kompleta. Ni posedigas nin do al Jesuo tiel, ke ni povas ekzistale diri: Mi apartenas al Jesuo. Tiel la ponto inter Dio kaj la homo estas starigita. Mi laŭ la kontrakta juro jam havas partoprenon en la regiono Dia. Tio pligrandigas nian esperon tiom, kaj ankaŭ la scio pri la amo, kiu troviĝas en Jesuo Kristo.

Tiu ĉi kontrakto tiel estas komparebla ankaŭ kun testamento. Estas la Nova Testamento ekde la ligo de Jesuo. Definitive ekzekutita kaj plenumita tiu ĉi testamento estos okaze de la sinrevelacio de Jesuo en gloro, kiam ankaŭ ni estos revelaciotaj en la gloro. Tiam nenio nin plu malhelpos posedi tion, kio al ni estas promesita.

## 2. Savita per la kredo

Tiu ĉi enpaŝo en tiun ĉi mirindan realon, tiu ĉi alproprigo de mia savo okazas ne per sakramenta procedo, sed ekskluzive nur per la kredo, tio diras, per mia agnosko de tio, kion Jesuo por mi faras kaj mi tion al li fidas. Tial en la Skribo ne staras skribite, tiu, kiu estos baptita, konfirmita… estos savita, sed, kiu kredas, estas savita.

Kiel unu el la unuaj mi surgenuiĝis, la ĉirkaŭstarantaj kreis cirklon ĉirkaŭ mi en preteco min beni kaj min akompani en preĝo. Mi diris simple: „Jesuo, mi sen vi estas perdita, ekster ĉia savo, ĉirkaŭita per la povo de la peko, de la pereo kaj morto. Vi ankaŭ por mi fiksis sur la kruco la ŝuldleteron de mia peko. Mi petas vin nun, venu kaj posedu la tronon de mia koro kaj konduku min en ĉiuj tagoj de mia vivo. Mi volas aparteni nur al vi kaj vivi el vi. Mi ne volas plu vivi por mi

mem. Mi fidas al vi, ke vi alprenis mian preĝon kaj ke okazis tio, kion vi promesis al tiuj, kiuj alprenas vin.”

Okaze de mia pastra konsekrado mi lasis min konsekri al Kristo de la eklezio, kiu ĉiam agis en la vesto de la eklezio. Nun mi subigis min al la resurektinta Kristo Jesuo, kiu efektivigos la tutan gamon da promesoj el la Sankta Skribo. Nenia instanco staras plu inter Jesuo kaj mi, kiu povus al mi alpreni nur ian peritan Kriston. Estas la levita Sinjoro, kiu diris al Paŭlo: *„Kuraĝu; ĉar kiel vi jam atestis pri mi en Jerusalem, tiel vi devas atesti ankaŭ en Romo”* (Agoj 23,11).

Finfine tiu ĉi ago ne estas homa merito, ankaŭ ne la merito de la kredo, sed ekskluzive graca ago de Dio. Neniu povas el propra forto esti naskita. Oni estas (do pasive) koncipita kaj naskita: *„Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito”* (Johano 3,6). Tiuj, kiuj en lian nomon kredas, estas naskitaj el Dio (*komp. Johano 1,13*).

Petro diras okaze de la pentekosta evento: *„Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj, kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito”* (Agoj 2,38).

## 3. La bapto en Jesuon

Dum mia disponiĝo al Jesuo do mi faris penton, mi konvertiĝis for de la malkonstruaj fortoj de la mondo en mi al la ricevanto kaj realiganto de la fido, Jesuo. Jes, mi mortis al la malnova memo, mi mortis kune kun Kristo kaj nun ne vivas plu mi, sed Kristo vivas en mi. Mi komencis pensi pri la vorto de Jesuo kaj ĝin primediti.

Per sia sekva paŝo parolas Petro en sia pentekosta prediko pri la bapto, kiu porekstere atestas: Mi trovis pardonon en Jesuo. La bapto sekvas erst post la konvertiĝo, kiu ebligis mensan ŝanĝon al Kristo kaj post la kreddecidiĝo por Jesuo nur estas ebla kaj vereca. Tiel mi finfine trovis post kelkaj jaroj de mia konvertiĝo la eblecon lasi min de iu evangeliisto[1] el Germanio bapti. Estis ekstraordinare, kiel tiu evangeliisto venis ĝuste al la katolika paroĥestro en Aŭstrio. Mi lasis lin tendumi kun lia loĝaŭtomobilo sur nia paroĥeja herbejo. Sekvatage li veturis for, por kunpreni la bibliojn en orienteŭropaj landoj. Mi post la bapto iris kun miaj amikoj, kiel siatempe la etiopia trezoristo.

Mian trovitan savon mi tamen ne devus gardi en sekreto, sed ĝin publike anonci. Mia konfiddecidiĝo por Jesuo fariĝas la konfeso por Jesuo. La unua kaj la unuaranga enhavo de nia kredkonfeso estis, ke mi ĉe Dio trovis pardonon. La pardonon de la pekoj oni ne povas al si sugestparoli, ne ĝin deziri, ne ĝin almozpeti, la pardonon oni devas sperti. Tio estas la certiga konfirmo de mia konvertiĝo. Sed tiun pardonon mi ne perlaboris por mi mem, mi lasis ĝin doni al mi de Jesuo. Li diras: Viaj pekoj estas al vi pardonitaj. Ne certa sacerdoto en la konfesprena ŝranko, nek la eklezio povas la pekojn per si mem pardoni, Jesuo kiel la filo de la homo posedas la plenpovon, pardoni la pekojn pere de sia sava morto. De ni postulas li nun, se ni denove pekas, ke ni konfesu la pekon antaŭ li:

*„Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas fidela kaj justa por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigi de ĉia maljusteco”* (1 Johano 1,9)

---

[1] Ĉi tie la vorto „evangeliisto” ne signifas la skribiston de unu el kvar evangelioj, sed la anoncanton de la evangelio, kiaj aperas ĉe aŭtentaj kristanoj ĝis niaj tagoj kaj ili aperos ĝis la dua alveno de Kristo – rim. de trad.

## 4. Ricevo de donaco de la Sankta Spirito

El la pento, konvertiĝo kaj bapto sekvas: *„Kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito”* (Agoj 2,38b). Tiu donaco de la Sankta Spirito kapabligas nin ĉiam pli por la servo de atestado por Jesuo: *„Kaj ni estas atestantoj de ĉi tiuj vortoj, kiel ankaŭ estas la Sankta Spirito, kiun Dio donis al tiuj, kiuj lin obeas”* (Agoj 5,32).

La Sankta Spirito donos al tiuj, kiuj Dion obeas. La sperto de la savo estas io beateca. Tiun sperton komuniki al aliaj, tio estas nia tasko. La Sankta Spirito loĝas ek de mia vivdisponigo al Jesuo en mi. Mi estas naskita el la Spirito (*komp.: Johano 3,8*). Li estas en mi la fonto de la akvo, kiu kirliĝas en la eternan vivon. Mia korpo fariĝis la templo de la Sankta Spirito (*komp.: 1 Korintanoj 6,19*). Sed tiu ĉi Spirito devas en mi ankaŭ transpreni la povon, min konduki!

*„Ĉar ĉiuj, kiuj estas kondukataj de la Spirito de Dio, estas filoj de Dio”* (Romanoj 8,14).

Tiu ĉi mesaĝo pri la leĝeco de la Spirito, pri la vivo en Kristo Jesuo, devus esti dirita ankaŭ al aliaj, kiuj tian sperton ne jam konas. Tio ofte provokas malakcepton. Paŭlo vokas: Estu plenigitaj de la Sankta Spirito. Tial Jesuo diras: *„Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj”* (Agoj 1,8a).

La potenco de la Sankta Spirito devus penetri el la mezo de la nove aranĝita templo en mi en ĉiujn regionojn de mia pensado kaj agado, tiel ke li povas sin revelacii al la mondo ankaŭ per mi. Mi simple devis pleniĝi de la Sankta Spirito. Tiam mi petis por mi la donacon de kondukado, de profetado, de distingado inter la spiritoj, la donacon sanigi. Nuntempe mi

scias, ke la Spirito disdonas kiel li volas. Li havas la kondukon. Temas pri servado en la komunumo kaj por la komunumo. Tiutempe iu juna viro spontane kaj neatendite diris: „La Sinjoro dum la anoncado de Lia vorto enmetos potencon kaj okazos resaniĝoj por glorigi Lian nomon.” Tio ne aŭdiĝis tiugrade kiel preĝdeziro, sed pli kiel kuraĝigo. Pli poste al mi estis klarigite, ke temis pri la vojmontra vorto – unu el la manieroj de la Sankta Spirito agi (*komp.: 1 Korintanoj 12,4-10*). Nun mi fariĝis pli singarda koncerne tiajn mesaĝojn. Ofte tiel okazas manipuladoj. Mi malpli atentis pri la vortoj en la preĝoj de tiuj, kiuj staris ĉirkaŭ mi, sed mi fariĝis ĉiam pli malgranda, dum la Sinjoro fariĝis ĉiam pli granda. Mi sentis emon levi la Sinjoron.

## 5. Alstrebu la spiritajn donacojn

Paŭlo diras: *„Sekvu amon; tamen deziregu spiritajn donacojn, sed prefere, ke vi profetadu. Ĉar tiu, kiu per lingvo* [glosolalio] *parolas, ne al hpmoj parolas, sed al Dio; ĉar neniu komprenas, sed en la spirito li parolas misterojn”* (1 Korintanoj 14,1-2).

Foje mi estas deinterne movita preĝi, sen havi kompreneblan klarigon. Tiam mi min unuigas kun la Sankta Spirito, kiu ankaŭ en mi preĝas: *„Kaj tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon; ĉar ni ne scias kiel preĝi dece, se la Spirito mem propetadas por ni per ĝemoj neeldireblaj”* (Romanoj 8,26). Post tia preĝo, per kia mi simple preĝas, ke la volo de Dio okazu en al mi nekonata situacio, revenas la paco per la scio, ke mi sekvis la impulson de la Sankta Spirito. Alifoje temas pri la de la Sinjoro kondukita kontakto kun certa homo aŭ super la konkreta tasko.

Tiu ĉi procedo tamen en la kristana vivo ne devas esti izolita aŭ tia serĉita. Ĉiam temas pri vokiteco por spontana kaj konkreta servo sur la korpo de Kristo, kiu venas el fidela sindediĉo: *„Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu korpon, ĉu judoj aŭ grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj; kaj ĉiuj estas trinkigitaj el unu Spirito”* (1 Korintanoj 12,13).

Nia membreco en la korpo de Kristo estas la granda faro de la Sankta Spirito. Jesuo Kristo kapabligas nin tial ankaŭ por la servado je lia korpo ankaŭ per la donacoj de la Spirito. Tiu ĉi servado devas esti portita per Lia amo: *„Se mi parolus la lingvon de homoj kaj anĝeloj, se ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo”* (1 Korintanoj 13,1).

## 6. Ĉe la demandoj pri la spiritaj donacoj oni povas ankaŭ esti disravita.

*„Ne ĉiu, kiu diras al mi; Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Multaj diros al mi en tiuj tagoj: Sinjoro, Sinjoro, ĉu ni ne profetis en via nomo, kaj en via nomo elpelis demonojn, kaj en via nomo faris multajn potencaĵojn?”* (Mateo 7,21-22).

Ankaŭ en spiritistaj rondoj kaj ĉe aborigenoj, kredantaj je spiritoj, troviĝas ritoj kun ekstaza hurlado kaj kun strangaj korpaj moviĝoj. Tie, kie la kondutmanieroj kaj la asertitaj donacoj ne estas konfirmitaj per la vorto de Dio, alvenantaj nur per aparta etoso aŭ de la grupa kondutpremo, kiu tendencas al la homo kaj ne al la sindediĉo kaj timo antaŭ Dio, tie ni devas singarde enketi kaj resti vekaj kaj nin en serioza kazo ankaŭ de tio distancigi.

Jam pli pruvita estas la frukto de la Spirito por elprovi la aŭtentecon de la efikoj de la Spirito. Temas pri la restantaj efikoj de tia agado. Estas la sperto pri la pardono de pekoj, ke do ne troviĝas plu damneco en mi kaj la vivo de Jesuo en mi fariĝas la supera afero. Mi spertas pacon, repaciĝon, Dian amon kaj ĝojon kaj esperon, kiu ne laciĝas.

*„Sed la frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco”* (Galatanoj 5,22).

# 5. Konfirmo de la Sinjoro

Ekipitaj per nova orientiĝo el la vorto de Dio ni denove veturis hejmen. Estis samtempe veturo en novan tempon. Ni sentis nin ekipitaj de la Sinjoro. Dum la veturo ni kantis glorajn kantojn, ni rakontis al ni la eventojn. Estis kvazaŭ multvalora lumo, kiun ni estus kunprenintaj. Tiuj lumoj nun iris en ĉiujn direktojn. Ju pli proksime ni venis al niaj hejmoj, des pli forte ni sentis, ke ne nur la lumon ni portis kun ni. Ni ricevis ankaŭ la okazon, vidi la spiritan mallumon ĉirkaŭ ni. Tiom pli singarde ni provis nian lumon reteni.

## A. Reen en mian laborkampon

En la samaj semajnoj okazis la pastra konferenco de la dekanejo. Mi havis taskon raporti pri la seminario pri la Sankta Spirito. Nun mi komencis min demandi, kio do estis la ĉefa afero ĉe la tuta seminario. Temis pri la vivdediĉo al Jesuo kaj pri la donacoj de la Spirito. Ju pli mi pri tio pensis, des pli mi estis interesita pri la interligoj de ĉiuj-ĉi aferoj. Mi samtempe enloĝiĝis en novan domon. Nun mi volis pli bone inspekti la unuopajn ejojn kaj la ekipaĵon. Mi volis min bone envivigi en la nova domo. Tiun ĉi teologian superkonstruon mi dum mia teologia studtempo ne ricevis. Mi komencis legi en la Sankta Skribo per notickajero kaj krajono; mi notis por mi la temojn sur unu folion kaj kompilis la adekvatajn skribitajn lokojn. Mi estis mirigita, kiel ĉiuj temoj en la Sankta Skribo estas super-

ordigitaj. Ĉiam pli malfermiĝis por mi ankaŭ la senco de la Sankta Skribo, ĉar mi vidis la tutecan bildon. La sava volo de Dio, la vojo de la savo, la mirindaj intencoj de Dio, tra la tempoj. Mi konatiĝis kun ĉio-ĉi kaj tiel ankaŭ mia vivo ordiĝis tutece sub la volo de Dio. Fine la ordo, kiu daŭras, kiu portas, kiu ne malaktualiĝas, kiu ne montras sin falsa. Kio ĝis tiam ŝajnis komplika, nun mirige aperis simpla, sen ke mi ion ajn balaŭ sub la tablon.

## 1. Firmigo de novaj spertoj

En tiu tempo mi per lernopaŝoj de la kredo ankoraŭfoje ripetis ĉion. Estis kvazaŭ ĉe la unua aŭtostira kurshoro. Mi rigardis nur mallongajn unuojn. Tial mi ne kuraĝis jam avanci. Mi timis devojiĝi. Ju pli mi rigardis antaŭen, despli rapide mi komencis avanci. Tiel mi sopiris ekhavi spiritan superrigardon, por povi pli rapide trapasi tiun ĉi vojon.

Post miaj unuaj spiritaj progresoj mi lasis kunfari ankaŭ la aliajn. Mi startis preĝrondon en la paroĥo. Mia plano estis, lunde, je 18.30 troviĝi en la paroĥa centro dum unu horo por kanti, preĝi kaj legi en la Skribo, sendepende de tio, ĉu iu venos aŭ ne. Je mia miro ĉiam iu venis. Per la prediko mi provis prezenti la nove malkovritajn spiritajn leĝecojn kaj mi invitis la homojn, tiujn ĉi paŝojn de la kredo iri kun mi. Tio estis nekutima afero. Ili aprobis la mesaĝon. Sed ili estis surprizitaj, ke ilia paroĥestro volas realigon de la kredo. Ĝis tiam ili aŭdis la predikon kaj fine, diris „Vergelt’s Gott” (Dio rekompencu) kaj iris post siaj tagokupiĝoj. Foj-foje okazis aldona interparolo.

Nun mi kun bedaŭro rekonas, ke kelkaj konceptoj de la seminario tro forte emfazis la disponigon de sia vivo al Jesuo

kaj la alprenon de Jesuo kaj tiamaniere la konvertiĝon kaj la penton prezentis tro feble. La unua marko de la graco estas la sperto de la pekrekono, la ekscio pri sia perditeco, kiu kondukas al vera pento. Erst kiam la homoj trafitaj aspiras la pardonon de siaj pekoj, ili estis baptitaj: *„Kaj aŭdinte tion, ili estis pikitaj en la koro, kaj diris al Petro kaj la aliaj apostoloj: Kion ni faru, fratoj? Kaj Petro diris al ili: Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj, kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito"* (Agoj 2,37-38).

## 2. Perado de tio al aliaj, kion mi ricevis

Mi komencis sisteme viziti homojn en iliaj domoj. Mi antaŭanoncis min telefone kaj interkonsentis pri la tempo. Je la komenco de tiaj renkontiĝoj ni krozis ĉirkaŭ multaj kredodemandoj. Mi serĉis ĉe tiuj rondoj ĉiam la ĝustan momenton por atingi la demandon: Kiamaniere mi povas ricevi vivan rilaton kun Dio?

Hodiaŭ mi scias, ke el tio ofte estiĝis senparaŝuta falo. La familioj per tio ankoraŭ ne scipovis barakti. Ili pacience alaŭskultis. Foje ni ankaŭ preĝis por ricevi eblecon disponigi nian vivon al Jesuo. Sed restis nur certa preĝo kiel multaj aliaj. Vera decidiĝo ne okazis, same okazis nenia pli profunda, devliga ŝanĝo de la pensmaniero, pento kaj konvertiĝo.

Tiel mi foje venis al iu militinvalido. Li havis kugle trafitan kapon. Senĉesaj kapdoloroj estis la sekvo. Ĉi-foje mi simple parolis pri Jesuo. Li estas la sama hieraŭ, hodiaŭ kaj

poreterne. Ni povas lin alparoli. Li nin aŭdas. Estis mallonga interparolo, ĉar mi registris, ke li ne povas plu absorbi. Je la fino mi lin demandis, ĉu mi rajtas preĝi pro lia kapdoloro. Li permesis kun certa pasiveco. Miaj vortoj estis: „Jesuo, vi konas tiun ĉi sinjoron, lian militan handikapitecon. Vi sanigis malsanulojn kaj vi komisiis ankaŭ viajn disĉiplojn sanigi la malsanajn. Vi ne savis nin nur surkruce, sed vi kunportis sur la lignon de la kruco ankaŭ niajn malsanojn. Ni alportas al vi tiujn ĉi kapdolorojn. Mi konfidas al vi, ke vi tion ĉi povas sanigi. Mi petas vin por tio kaj mi dankas vin por tio. Amen.” La unuaj vortoj je reago estis: „Sinjoro paroĥestro, nun trinku ni ankoraŭ glason da vino.” Min doloris, ke li simple preterparolis la preĝon. Sed estis ankaŭ gesto de lia ligiteco kun mi. Tiel mi akceptis. Preĝinte en mia koro mi restis en amo kaj espero je la Sinjoro kun li. Post minutoj li levis sian manon al la frunto kaj diris: „Mia kopdoloro estas for.” Mi sentis min kvazaŭ kunprenita sur la glacisurfacon. Singarde mi diris: „Se la kapdoloro post unu semajno ankoraŭ estos for, bonvolu min pri tio sciigi.” Post kelkaj tagoj mi venis al la dirigento de la eklezia ĥoro. Li diris al mi: „La militinvalido estis hodiaŭ ĉe ni por preni lakton kaj li rakontis al ni, ke lia kapdoloro estas for.” La samon pli poste konfirmis ankaŭ li mem ĉe ĉiu okazo. Tamen li eskapis kreddecidiĝon. Tiu signo de Dio povus esti por li invito, trovi sian savon en Jesuo, sed bedaŭrinde li la manon de la Sinjoro ne akceptis.

Post iu dimanĉa diservo venis en la paroĥan kancelarion virino kun sia filino en aĝo de 10 jaroj. Ŝi diris al mi, ke la infano suferas sub epilepsio kaj pro tio estas primokita de aliaj infanoj. Ankaŭ tiun kazon mi metis preĝe antaŭ la Sinjoron. Post kvar jaroj mi renkontis tiun virinon surstrate. Ŝi intertempe translokiĝis. Ŝi paŝis al mi kaj diris: „Mia infano ek de tiu tempo ne plu havis epilepsian atakon.” Kiel mi dankis al la Sinjoro!

Mia najbara paroĥestro ofte suferis pro fortaj depresioj. Ni rondpaŝis en lia ĝardeno. Post simpla kredinterparolo mi proponis al li, preĝi por la afero. Ni restis starantaj. Mi prenis lian manon kaj preĝis kun li. Mi proponis al li rigardi al Jesuo, kiu la potencon de ĉia malsano rompis. Mi vidis antaŭ mi la vortojn de la Sankta Skribo: *„Sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos"* (Marko 16,18).

Ĉe la afero mi pli fidis al Jesuo kaj al lia liberiga ago ol al mia preĝo. Fine la paroĥestro min alrigardis videble malpezigita kaj diris: „De mia koro nun falis peza ŝtono. Mi sentas min tiel malpeza kaj libera." Ni laŭdis Dion kaj preĝis ankoraŭ unu psalmon. Post tio li diris: „Antaŭe akuzis min ĉiu biblia vorto. Nun ĝi alportas al mi ĝojon. Kiel tio povas esti?"

Mi memorigis lin ankoraŭfoje, ke li preferu sian tutan vivon porti antaŭ Dion kaj nur kun Li parolu per la preĝo. Li, nome, havis ankaŭ grandan emon praktiki adoradon de Maria, per kio al Maria estis atribuita la gloro, kia nur por Dio decas. Estas danĝere devojiĝi de la vorto de Dio.

Kelkaj, malmultaj, tamen venis al la viva kredo en Jesuon, en kiu ili spertis la pardonon de siaj pekoj kaj la savon antaŭ la eterna morto. Ili troviĝis poste en la preĝa rondo.

# 7. GVIDITA EN LA TENTADON

Dum mia preĝa tempo antaŭ la Sinjoro la bildo de la komunumo, kiel la Sinjoro ĝin konstruas, estis por mi ĉiam pli klara kaj aminda. Antaŭ miaj okuloj mi kun tiuj, kiuj por tio decidiĝis, iris la vojon al la savo en la ĝusta sinsekvo: konvertiĝo – alpreno de la kredo – alpreno de la savo en Jesuo per la fido – bapto per la Sankta Spirito en la komunumo. La tradicie katolika komunumo laŭ mia atendo devus fariĝi de Jesuo fondita komunumo.

## A. La unua malakcepto de la anonco

Tiom pli min doloris, kiam mi ĉiam pli klare vidis, ke ĉe la paroĥanoj ne venis respondo de la fido. Kelkaj el la preĝrondo memorigis min je tiu riĉa junulo, kiu ne volis ŝanĝi sian alkutimitan vivon kaj ricevis malĝojon super la vortoj de Jesuo. La ĝoja mesaĝo fariĝis mesaĝo, kiu ilin malgajigis, ĉar ili ne estis pretaj enpaŝi la savproponon de Dio. Mi ekkuŝis antaŭ la Sinjoro surgrunde kaj klarigis al Li mian situacion kaj Lin demandis, kio misfunkcias? Mi rememoris pri Moseo, kiel li preĝis por sia popolo, kiam tiu refutis obeon al Dio. En tiu plago tamen mia amo al la paroĥa komunumo fariĝis eĉ pli intima. Samtempe mi klare vidis, ke la fino de mia servo troviĝas en senpera proksimo. Ĉu do la Sinjoro nun ĉion forprenis de mi? Ja mia predigado fariĝis ĉiam pli forteca kaj konfirmita per la trafiteco de la aŭskultantoj. Kaj nun ĉio-ĉi

estu de mi forprenita, ĉu vere? Eĉ kiel mi povis kompreni Abrahamon, kiu vivis tutece el la promeso kaj estis preta sur la monto Morijo ĉion redoni, eĉ sian filon, por la promeso!

## 1. La respondo de la Sinjoro

Sinjoro, kio misfunkcias? Kial vi min forlasas? Kion mi faru? La respondo venis per lapidara klaro: *„Mi volas vian obeon.”* Kiel glavo de la spirito tratranĉis min tiu vorto. Mi predikis: Unue la konvertiĝo, sekve la kredo en Jesuon, kaj poste la bapto. Okaze de ĉiu baptopreparo mi al la gepatroj montris ĉiujn tekstopartojn en la Sankta Biblio pri la bapto:

*„Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita”* (Marko 16,15).

Do, unue kredinta, poste baptita! Tio nenie kaj neniam rajtas fariĝi renversita.

*„Sed kiam ili* [la homoj el la urbo Samaria] *kredis al Filipo,predikanta la evangelion pri la regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo, ili baptiĝis, viroj kaj virinoj”* (Agoj 8,12).

Do ĉeestis plenkreskuloj (viroj kaj virinoj) kaj neniuj infanoj, kiuj fariĝis fidantaj kaj lasis sin bapti.

La gepatroj de la infanoj, kiujn mi devus bapti, ne estis pri tio ŝokitaj. Mi proponis al ili, la baptadon de la ĵus naskita bebo prokrasti ĝis la tempo, kiam la infano atingos la aĝon, en kiu ĝi povos kredi en Jesuon. Mi promesis, ke ili ne ricevos reprezaliojn. Mi protektos ilin kiel la paroĥestro en la lernejo kaj en la paroĥo. Kiam do la tempo fariĝos matura, ni havos mirindan baptadon. Sed ili tion malakceptis kaj volis daŭre por ilia bebo tujan baptadon. Kaj mi tiel tamen tiun infanon

baptis. – Sed tio estis mia malobeo al la Sinjoro. Mi pli obeis la katolikan eklezion ol la Sinjoron pere de Lia vorto.

## 2. Malobea en la konfesŝranko

Mi proklamis en la konfesprena ŝranko la homojn liberigitaj de iliaj pekoj, kvankam nek troviĝis klara konfeso de la pekoj nek vidiĝis signo de vera konvertiĝo aŭ de intereso super la Sinjoro. La Skribaĵo tamen diras: *Kiu povas pardoni la pekojn krom Dio sola? Kaj la Filo de la homo havas la povon surtere pardoni la pekojn* (Marko 2,5-11), ĉar li la Filo de Dio estas.

*„Pri li* [Jesuo] *ĉiuj profetoj atestas, ke per lia nomo ĉiu kredanta al li ricevos pardonon de pekoj”* (Agoj 10,43). Antaŭ Jesuo ni konfesas niajn pekojn:

*„Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas fidela kaj justa por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigi de ĉia maljusteco”* (1 Johano 1,9).

## 2. La servo de repaciĝo per la ĝusta anoncado

La servo de la repaciĝo estas plenumita per la anoncado kaj ne per la sakramentoj. La repaciĝo estas la senpera realigo de la fido en Jesuon, kiu per sia vivdediĉo sur la kruco nin repacigis kun Dio. Ni rajtas, ni vere devus tiun ĉi repaciĝon alpreni, ĝin akcepti.

*„Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj. Sed ĉio estas*

*de Dio, kiu repacigis nin al Si mem per Kristo kaj donis al ni la administradon de la repacigo; nome, ke Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si, ne alkalkulante al ili la kulpojn, kaj komisiis al ni la vorton repacigan”* (2 Korintanoj 5,17-19).

## 3. Malobeo ĉe la meso

Okaze de la meso mi donis la oferon de Jesuo por la mortintoj, por ke ili post sia morto atingu tion, kion ili dum sia surtera vivtempo malestimis kaj perdis, la savon per Jesuo. Okaze de tio Jesuo dum la lasta vespermanĝo parolis al la vivantaj kaj ne al la mortintaj. Li diris: *„Prenu kaj manĝu ĉiuj de tio ĉi”* kaj ne: „Oferu ĉiuj per tio ĉi”.

## 4. Neniu alvoko por la oferado

Ne diris li: „Oferu ĉiam denove.“ La ofero de Jesuo okazis unu nuran fojon kaj havas povon por ĉiam. Tiel en la epistolo al Hebreoj estas dirite, laŭsence:

*„Ĉar per unu ofero li poreterne faris la sanktigitajn ĝis la plenumiĝo … Kaj se nun tiuj* (pekoj) *estas pardonitaj, do troviĝas plu neniu ofero por la pekoj”* (Hebreoj 10,11-12).

## 5. Nenia transsubstanciiĝo

Kiam Jesuo diris super la pano: *„Tio estas mia korpo, donita por vi”*, li ne parolis pri la transsubstanciĝo de la pano. Tial neniu pli malgrava ol la apostolo Paŭlo konfirmas:

*„Ĉar ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis li venos”* (1 Korintanoj 11,26).

Li parolas pri la *„pano”*, kiu estas manĝata. Se Paŭlo estus kredinta en transsubstantiĝon de la pano, li estus dirinta: Ĉar ĉiufoje, kiam vi manĝos la korpon de la Sinjoro; li do ne estus dirinta panon. La vespermanĝo de la Sinjoro estas por tiaj disĉiploj de Jesuo, kiuj tiun ĉi potencon de la savo en Jesuo per sia fido spertis kaj nun festante dum dankdiroj manĝas la panon. Je tio ĉi ili pensas pri la sava faro de Jesuo sur la kruco kaj tion anoncas plenaj de la fido ĝis la videbla denova alveno de Jesuo.

Jesuo jam dum sia pripana parolo diris, ke li kiel la tuteca persono estas donita, por ke ni per li vivu. Tiu, kiu venas al li, tiu ne plu malsatos – tiu manĝis la „panon” laŭ la ĝusta maniero. Tiu, kiu en lin kredas, ne havos plu soifon – tiu trinkis laŭ la ĝusta maniero:

*„Ĉar la pano de Dio esas tiu, kiu malsupreniras el la ĉielo kaj donas vivon al la mondo. Jesuo diris al ili: Mi estas la pano de la vivo; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos”* (Johano 6, 33.35).

Alveno al Jesuo kaj la kredo en Jesuon, kiu por nia savo estis oferdonita, tio faras ĉion.

## 6. Nenia alvoko por la adorado

Sed mi daŭre surgenuis antaŭ tiu pano, ĝin adorante, kvankam li ne troviĝas en la pano, sed sidas dekstre de la Patro en la ĉielo, kiel Stefano lin vidis antaŭ sia morto. Dio ne povas esti adorata en certa objekto, tio en Liaj okuloj estas idola kultado (5 Moseo 4,14-19).

*„Dio estas Spirito; kaj Liaj adorantoj devas adori Lin laŭ spirito kaj vero”* (Johano 4,24). – *„La spirito estas la viviganto; la karno nenion utilas; la vortoj, kiujn mi diras al vi, estas spirito kaj estas vivo. Sed estas iuj inter vi, kiuj ne kredas”* (Johano 6,63-64b).

## 7. Malobea kiel la sacerdoto

Tiamaniere mi kiel la sacerdoto arogis al mi disponi pri io, kion ekskluzive faris la Filo de Dio. Malantaŭ tiu ĉi piaĵo estis farita falsifado. La homo en la persono de sacerdoto volas disponi pri la manipula povo super Dio. La sacerdoto agas anstataŭe de Dio. Li fakte Dion abolas, kvankam Li sola agas por nia savo. Kaj ni devas por Dio esti disponeblaj, ne Dio estu disponebla por ni.

Unuflanke la katekismo de la katolika eklezio en la alineo n-ro 1544 diras: „Jesuo esta la nura ‚Ĉefpastro laŭ la maniero de Melkicedek’ (Hebreoj 5,10; 6,20). Kristo estas ‚sankta, senpeka, senmakula’ (Hebreoj 7,26) kaj li ‚per unu ofero perfektigis ĝis eterneco la sanktigatojn’ (Hebreoj 10,14), nome, per la ununura ofero de sia kruco.”

Malgraŭ tiuj gravaj eldiroj de la Sankta Skribo, ke neniu alia krom Jesuo sola estas la Ĉefpastro laŭ la maniero de Melkicedek, la katolika eklezio aliflanke postenigas sian arbitran sacerdotecon sur la saman nivelon per la aserto, ker per la ago de la eklezia pastra servo la ĉeesto de la sacerdoceco de Kristo estas efektivigata (*Katekismo de la Katolika eklezio*, alineo n-ro 1545). La hierarkia sacerdota servo de episkopoj kaj paroĥestroj kaj la ĝenerala sacerdotaro de ĉiuj kredantoj „partoprenas per aparta maniero la pastrecon de Kristo". (*Katekismo de Katolika eklezio*, alineo n-ro 1545).

En la Encikliko de Pio XII-a „Mediator Dei" (La peranto de Dio) estas blasfeme dirite: „Per la konsekreco de sacerdoto, *egaligita* al la ĉefpastro, tiu posedas (la katolika pastro) la plenpovon, agi en la povo kaj *anstataŭo de la persono de Kristo mem*." Jesuo estas tiel abolita, la katolika pastro agas en la anstataŭeco de Jesuo.

„Kristo mem estas disponigita en la eklezia servo de la konsekrita sacerdoto *kiel la kapo de Lia korpo* … la ĉefpastro de la sava ofero." La sacerdoto tiel agas „en la persono de Kristo, de la kapo" (*Katekismo de la katolika eklezio* n-ro 1548). Samtempe anstataŭ tiu ĉiuj postenoj de la pastro kaj instruisto estas donitaj anstataŭe al tia pastreco.

La Sankta Skribo distingas klare inter la levida pastreco (*2 Moseo 28,41*) en la Malnova Testamento, la popolo de la sacerdotoj, kiel ankaŭ en la Malnova Testamento (*Jesajo 61,6*) kaj en la Nova Testamento (*Apokalipso 1,6*) kaj la ekskluziva sacerdoteco de Jesuo laŭ la maniero de Melkizedek (*Hebreoj 5,10*). Tiuj ĉi diversaj kategorioj de la sacerdoceco ne rajtas esti interŝanĝitaj aŭ nebuligitaj. Tio, kio konvenas ekskluzive por la Filo de Dio, tion la homo ne rajtas arogi por si, kiel la sacerdota savofero de Jesuo tio estas.

## 8. Honoro, priŝtelita de Dio

Multaj en la paroĥo preĝas al Maria pli ol al Dio. Sed Dio diras: „Alvoku min, se vi troviĝas en plago!” Preĝi signifas interparoli kun Dio. Kial oni dumpreĝe parolas kun la kreitaĵoj, kiuj ne estas Dio? Mi provis ankaŭ ĉi tie enmeti korektadon. Tamen estis senefike. Tiu gloro, kiu konvenas ekskluzive por Dio, estis de Dio deprenita kaj donita al Maria. Kiamaniere tia adorado de Maria povas glori ankaŭ Dion? Maria, prezentita per protektmantelo kaj alvokita kiel la protekta damo. Sed ni devas diri kune kun la psalmisto:

*„Kiu loĝas sub la ŝirmo de la Plejaltulo, tiu ripozas en la ombro de la Plejpotenculo. Mi diras al la Eternulo: Mia rifuĝejo kaj mia fortikaĵo estas Dio, kiun mi fidas”* (Psalmo 91,1-2).

Maria estas alvokita kiel la damo, jes, kiel la ĉiela reĝino. Sed Jesuo ekskluzive estas la Sinjoro, diras Petro dum sia pentekosta prediko:

*„Tiun Jesuon, kiun vi krucumis, Dio faris Sinjoro kaj Kristo”* (Agoj 2,36b).

Antaŭ li ĉiu genuo fleksiĝos. Kiom da homoj surgenuas antaŭ la portreto de Maria! Jesuo diras: „Neniu venas al la Patro krom per mi.” Maria tamen ricevas ĉiam denove maskitan peran rolon, kvazaŭ ŝi disdonus la gracon kaj eldirus promesojn.

Tio ne okazas en la senco de Maria mem, ke oni ŝin tiamaniere prezentas. Ŝi volas la tutan gloron doni al Dio. Ŝi scias, dirante dum sia preĝo, pri sia humileco kaj ŝi levas sian Dion, kiu estas ŝia savanto. Pro tio ankaŭ la aperado en Lurdo estis demaskita, ja la kvazaŭa Maria tie ordonis, je gloro de ŝi konstrui kapelon, anstataŭ doni la gloron al Dio; same la

aperado en Fatimo, kie la aperaĵo postulas penti antaŭ ŝi anstataŭ antaŭ Dio. Kompreneble mi konas la malfortajn teologiajn provojn tion ĉi klarigi tiel, ke pere de la adorado de Maria fakte devus esti glorita Kristo. Sed en vero tia piaĵo tamen restas kuŝi sur Maria, dum la akcentoj tiamaniere estas dislokitaj.

Jesuo diras: *„Foriru, Satano! Ĉar estas skribite: Al la Eternulo, via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al Li sola vi servu”* (Mateo 4,10).

## 9. Malobeo ĉe la ĥarismeca renoviĝo

La katolik-ĥarismeca renoviĝo daŭre instruas, ke la kristano estas nove naskita per la bapto en la aĝo de bebo kaj li estas per la konfirmacio baptita per la Sankta Spirito. Laŭ la atesto de la Sankta Skribo tamen oni fariĝas la infano de Dio nur, kiam oni pentas kaj alprenas fidon en Jesuon (*Johano* 1,12). La ideo pri la baptorenovigo tiel temas pri paŝo en malplenon. Kaze de la beba bapto okazas nenio, do tio ankaŭ ne povas esti renovigita. Ricevo de la savo pere de sakramentoj transmetas la personan fidon en Dion al la anstataŭa kredo de la eklezio. Nur la persona fido povas konduki al la nova naskiĝo. Kaze de la „baptorenoviĝo” cetere povas okazi tia persona fido, kiu kondukas al la novnaskiĝo. Sed tiam la koncerna persono nur ek de tia „baptorenoviĝo” fariĝas novnaskita, sed ne jam okaze de la bebaĝa baptoceremonio.

La katolik-ĥarismeca renoviĝo agnoskas, sub la vorto ĥarismeca renoviĝo kompreni nur la pleniĝon per la Sankta Spirito. Sed tio supozas la spiritan bapton jam anticipe. La spirita bapto tiel estus okazinta okaze de konfirmacio. Ankaŭ

tio prezentas vojon en malplenon. Okaze de la konfirmacio la plimulto da konfirmantoj tute ne estas nove naskitaj, ja ili Jesuon tute ne alprenis en fido reale. La spirita bapto ne povas okazi sen la naskiĝo denove. La ripetiĝanta pleniĝo per la Sankta Spirito, kiel atestas la Agoj de apostoloj ene de la komunumo en Jerusalemo, post kiam la disĉiploj de Jesuo post sia liberiĝo preĝis (komp.: *Agoj* 4,31), povis okazi nur post la ricevo de la Sankta Spirito de la unuopaj kredantoj.

Tiu ĉi konstelacio kondukas al tio, ke enkadre de la ĥarismeca renoviĝado kelkaj katolikoj ŝajne estas nove naskitaj kaj plenigitaj per la Sankta Spirito, se ili rekte kaj per fido sin turnas al la vivanta Sinjoro Jesuo. Tamen ili poste restas ene de la kredinstruo de la katolika eklezio. Ilia orientiĝo ne originas ekskluzive en la vorto de Dio, tiel ĝi restas sur multaj punktoj vualita. Restas espero, ke ili iam ekskluzive sin turnos al la Sinjoro, kiel Paŭlo same esperas por Izraelo. Mi estas konvinkita, ke la Sinjoro per sia Spirito ankaŭ la tempon de senscio finos kaj al tiuj personoj parolos klare en iliajn korojn, kiam ili por tion akcepti estos pretaj:

*„Sed kiam ajn oni turnas sin al la Sinjoro, la vualo estas forprenata. La Sinjoro estas la Spirito; kaj kie estas la Spirito de la Sinjoro, tie estas libereco"* (2 Korintanoj 3,16-17).

Aliaj vagadas sur du reloj en la vorto de Dio kaj en la miskredo pri la perado de la savo pere de la eklezio per sakramentoj. Sed Jesuo mem restas por ni kiel la peranto de la savo rekte per nia persona fido. La supre menciita durela iro preparas la grundon por kaŝita misgvido, kie ne plu la vorto de Dio povas esti distingata kaj separata disde la homaj instruoj. Sed la vorto de Dio ne estu intermiksita, ĝi ne toleras intermiksadon. Tiaj homoj daŭre preĝas al Maria kaj serĉas aldone la peradon de Maria apud tiu de Jesuo. Ili forlasas sian rilaton al Jesuo, preĝante en la Spirito kaj en vero kaj tion

reduktas per adorado antaŭ tabernaklo, kiel Izraelo sian adoradon de Dio anstataŭis per adorado de la ora bovido.

## 10. Kiu perdos en la afero?

Tute trafita mi klare vidis, ke sub ĉio-ĉi mi ĉiam deprenis de Jesuo. Samtempe mi kun li negocis. Prenante konsideron ĉe mia katolika komunumo Jesuo do devus tion pretervidi. Kiel mi post tio povus diri, ke mi lin pli amas ol la aliajn? Kiamaniere do li daŭre povus esti mia Sinjoro? Mi sentis timon kaj zorgon antaŭ skuiĝo ĉe la paroĥanoj, kiuj mian kredobeon ne komprenis. Ĉu ili per tio havos pri Dio ankoraŭ pli misan komprenon? Ĉu mi rajtas forlasi la komunumon, kiu estis al mi disponigita je mia responso?

Ĉiuj tiuj, kiuj foriris el Egiptujo, mortis en la dezerto, ĉar ili cetere komencis iri la vojon kun Dio, sed poste ili fariĝis en sia pieco arbitraj. Tiel ankaŭ al mi ne estis donita licenco, konduki al Dio la en katolikismo arbitrecan paroĥon. Tiu ĉi konstato estis por mi unu el la plej malmolaj spiritaj spertoj dum mia animprizorga laboro.

## 8. La prostituino ne estas allogata al Kristo

Ne ĉiuj ene de la katolika eklezio estis naskitaj el la semoj de la vorto de Dio. Estas kiel ĉe la agro, sur kiu komence la lolo kaj la tritiko ne distingiĝas videble. La parto de tiuj, kiuj opiniis aparteni al Kristo ene de sia mondiĝinta eklezio, manifestiĝas esti la prostituino, montrita al ni en la *Apokalipso*, ĉapitroj 17-18. Ŝi tenas en sia mano oran kalikon, sidanta

vestita en purpuro sur la grandan beston, simbolon de la politika mondpotenco kaj prezentita kiel la urbo sur sep montetoj. Sed en la Biblio estas ripete ankaŭ la Dia popolo przentita kiel la prostituino, se ĝi ne decidiĝas por la Sinjoro, sed iras aliajn vojojn. La spirita prostituino evoluas arbitrajn vojojn de pieco kaj ne lasas sin plu konduki per la Sinjoro. Iun tagon ĝi estos forpuŝita fare de la besto, la politika potenco. Tiam la falo de ĝi estos profundega.

Sed kiu grupiĝo ene de la kristana mondo niatempe troviĝas plej proksime al tiu horora bildo? Kiu grupo havas propran politikan povon, propran ŝtaton ene de certa urbo kun diplomata statuso en multaj ŝtatoj de la mondo, marŝanta preter la Biblio propran religian vojon; verŝinte la sangon de multaj disĉiploj kaj atestantoj de Jesuo? Post Konstantino fare de la mondiĝinta eklezio estis torturitaj kaj mortigitaj pli da kristanoj ol en la komenco de la kristana kredo fare de la romia imperio. Ne estas nia tasko jam nun montri al ĝi fingre, ja la tago de la lasta juĝo troviĝas en la manoj de Dio. Grave estas, ke ni ne apartenu al la malĉastulino, sed ke ni estu nove naskitaj el la nefiniĝema semo de la Dia vorto (1 *Petro* 1,23).

*„Tial eliru el inter ili, kaj estu apartaj, diras la Eternulo. Kaj ne tuŝu malpuraĵojn; kaj Mi vin akceptos, kaj Mi estos por vi Patro, ja vi estos Miaj filoj kaj filinoj, diras la Eternulo Plejpotenca”* (2 Korintanoj 6,17-18).

Mia penado, fari la paroĥan komunumon biblifidela komunumo, malsukcesis. Tiu ĉi fiasko enkondukis ankaŭ la perdon de mia socia statuso. En tiu konstelacio mi per plena energio laboris por klare prezenti la bazan mesaĝon de la evangelio kaj prezenti la tutan veron pri la Sankta Skribo. Mi predikis, ke Dio nin vokas al pento, nin amas, kun ni planas la plej bonan aferon kaj nin inkluzivigas en siajn promesojn. Kaze de miaj predikpreparoj mi preĝis por tio, ke la paroĥo tamen vekiĝu. Mi metis la Sanktan Skribon kun grandlitera

eldono en la preĝejo proksime al altaro, por ke ĉiu frekventanto dumtage havu aliron al la vorto de Dio. Tiu Biblio estis la parolanta atestaĵo de Dio kaj samtempe la juĝinto de la pensoj, kiuj aranĝis muron kontraŭ Dio. Kiel forte mi nun povis kompreni, ke profeto Jeremio meze de sia popolo havis plu neniun hejmon. Ĉiuj estis al li fremdaj, multaj lin malamis, ĉar li ne adaptiĝis al ilia koncepto.

## B. Sinpravigo antaŭ la episkopo

Baldaŭ post tio mi estis de miaj ofickolegoj alspronita antaŭ mia episkopo aperte prezenti, kia estas mia kredbazo koncerne la baptadon de beboj, de konsekrado de sacerdotoj, kio ambaŭ estas katolikaj sakramentoj. Por la unua interparolo mi estis invitita al la asista episkopo d-ro Aloizo Stöger. Li estis larĝe akceptita fakteologo por la Nova Testamento. La interparolo estis surprize malfermita kaj li aprezis mian animprizorgan engaĝiĝon. Mi petis, ke la eklezio tamen povu toleri ankaŭ la konscian bapton en fido kaj ne plu insisti je la baptado de la suĉinfanoj. La interparolo finiĝis per postulo, ke mi ne kontaktu plu la liberekleziajn grupojn. Sed tiun poron mi ne povis kaj ne volis plu fermi. Tion mi ankaŭ mesaĝis kaj tiel adiaŭis de la episkopo.

Mia dua limdato estis post kelkaj semajnoj ĉe la dioceza episkopo d-ro Francisko Zak, doktoro pri la eklezia juro. Li jam ricevis leterojn, per kiuj iu paroĥestro plendis, ke mi al la liberaj eklezioj liveras tro da protekto. Tiel li postulis de mi respondon kaj mi donis respondon: „Ĉio, kion instruas la Sankta Skribo, estas la enhavo de mia kredo. Tio, kio iras

transe de la Skribo, ne povas plu esti akceptata kiel la fundmento de la fido.” La demando de la episkopo post tio tekstis: „Kion vi opinias per tio, kio en la Sankta Skribo ne troviĝas?” Mi diris, ke la baptado de la suĉinfanoj, la konsekrado de la pastroj, la kompreno de la meso, ĉio-ĉi troviĝas ekster la Sankta Skribo. La homo ne estas farita justa per la bapto, sed surbaze de sia fido. Tio estas la persona fido kaj ne la anstataŭa kredo de la baptopatro aŭ de la eklezio. Jesuo sola estas la ĉefpastro en la Nova Testamento laŭ la ordo de Melkicedek (*Hebreoj* 6,20) kaj neniu cetera apud li. Li la sola pastrece prezentis la savan oferon.

*„Nek per la sango de kaproj kaj bovidoj, sed per sia propra sango, eniris* [Kristo] *unufoje por ĉiam en la sanktejon, atinginte la eternan elaĉeton”* (Hebreoj 9,12).

## 1. Mia abdiko

Konsternita demandis min la episkopo, kiom longe mi jam tiel kredas. Li mallongtempe retiriĝis kaj poste diris: „Mi devas vin surloke suspendi (depreni de vi vian oficon).” Super mi regis sentebla trankvilo. Mi provis, kontraŭe, trankviligi la episkopon, ja mi lian decidon komprenis plene. Telefone pri tio estis informita la dekano, ke li por la anoncita vespermeso sendu alian pastron. Mi adiaŭis dankante por la ĝistiama rilato kaj mi preĝis en mia koro. Mi estis tre ĝoja pri tio, ke mi nun finfine aranĝis klarecon kaj tio estis al mi donacita momento. Nun mi sciis, ke mi ĉe tio ne kondutis laŭ mia arbitro aŭ ke ĉe mi estus falsa fervoro. Pli ol iam antaŭe mi rimarkis, ke mi fariĝis la posedo de mia Sinjoro kaj ke la Sinjoro zorgos pri mi. La tuta procedo estis kvazaŭ fulmo sub la ĝusta diro de Dio. Estis dirita neniu vorto de sindefendo el mia buŝo. Mi

simple antaŭ mia aŭtoritato aperte prezentis, kio estas la espero de mia savo.

Tagon poste la episkopo sian studkolegon ankoraŭ informis, ke li devis veni al decido, kiu por li estis malfacila, ĉar li bedaŭras la perdon de tiu paroĥestro.

## 2. Sola surstrate

Lasita sola kun mia Sinjoro mi en mia koro Lin dankis pro Lia gvidado tra tiu horo. Nun en mi troviĝis nenio plu, kio barus mian vojon inter Dio kaj mi. La paŝo de obeo estis farita. Nun mi devis nur plu el la fido vivi kaj agi, ja mi en tiu momento ne havis amikojn el la fido ĉirkaŭ mi. Okaze de mia hejmenveturo estis, kvazaŭ de mi estus laŭvice deprenita unu peco de vesto post la alia. Mia nudeco estis kvazaŭ de ĉiuj flankoj videbla. Kiamaniere mi tion diru al mia paroĥa komunumo, al miaj amataj gefratoj kaj parencoj? Kia lavango ruliĝos nun sur min? Kioma malamo min renkontos? Tiel ankaŭ mia insistospiro ĉe la preĝo estis ĉiam pli mallonga. Sed unu penso min kovris dum ĉio-ĉi. Mi estas la propraĵo de la Sinjoro, mi staras sub lia mano. Mi estas lia ilo, sed li agas.

Tiel mi iris hejmen koncentrita tra la sakristejo el la preĝejo kaj mi proklamis: „La kaplano de Ybbs nun celebras la meson, ja mi estas de mia ofico suspendita."

## 3. Proklamo de la juĝo

En la dimanĉo poste venis la dekano al la paroĥa diservo kaj ankaŭ al la vespera meso al Säusenstein, kie mi kunadministris la paroĥon. Mi perdiĝis meze de la popolo en la preĝejo kaj aŭskultis post la iomete deprima diservo la juĝon, kiu falis super min. Laŭ la vortoj de la kondamno mi defalis de la eklezia kredo, mi ne reprezentas plu la plenan doktrinon de la katolika eklezio kaj tiel mi estas de la ofico suspendita. Kiam mi post la diservo la preĝejon forlasis, la kredantoj senintence starigis spaliron. Irinte tra la spaliro mi ĉiun alrigardis okulen kaj por li kaj ŝi preĝis. Mi atendis, ke iu ajn rompu la silenton, por ke mi direktu al ili miajn lastajn vortojn. Sed tio ne okazis. Al ĉiu unuopa paroĥano el la paroĥa konsilio mi proponis manon kaj dankis pro la kooperado. Pli da tio al mi ne estis permesite diri. La rilato, kiun mi dum jaroj konstruis inter la kunlaborantoj, nun per unu frapo estis malkonstruita. Tiu fremdeco kaŭzis doloron. Kien ajn mi iris, ili ne povis min sekvi. Mi devis ilin lasi post mi.

## 4. Enketita fare de la raportisto

Post la tagmanĝo venis raportisto de la gazeto *Kurier* en mian domon. Mi volis intervjuon eviti. Sed li diris al mi, ke en la kazo de malakcepto li estus publikigonta tion, kion li ricevis en la najbara paroĥo responde al siaj demandoj. La ŝlosila linio diris:

**Harte Konsequenzen für Kritik an kirchlicher Glaubenslehre: Bischof setzt einen Pfarrer vor die Tür.**
(Malmolaj konsekvencoj pro la kritiko je la eklezia kred-doktrino: la episkopo starigis sian paroĥestron ekster de la pordo.)

Sub mia bildo kun la Biblio enmane tekstis: Ĵuru je la Biblio, ne je la eklezio:

***Pfarrer Ramel.***
(Paroĥestro Ramel)

GOLLING – La paroĥo Golling an der Erlauf devos en estonto rezigni pri sia paroĥestro Johano Ramel, 48. Ĉar li devojiĝis de la esencaj katolikaj instruoj – tiel la oficiala eklezia argumentado – li estis suspendita kiel sacerdoto fare de la dioceza episkopo Francisko Zak. Ĝis la fino de la monato li devas forlasi la paroĥejon!

„La instruoj kaj praktikoj de la katolika eklezio esence diferencas de la eldiroj de la Biblio" argumentas Ramel sian diferencon konfronte al la katolika kredinstruo. La Biblio kiel la kredbazo kaŭzis ankaŭ lian pensan metamorfozon, kiu en li lasis abismon inter lia konscienco kaj la ekleziaj instancoj.

„Mi negas la nocion pri sakramentoj, ja tiu kontraŭdiras la Skribon," tiel Ramel. La eklezio uzas tradiciajn ritojn, por helpe de la organoj de la eklezio peri la gracon de Dio. Tamen – emfazas Ramel – nur la alpreno de la Sankta Skribo kaj la vivo en ĝia senco havas signifon por la savo de la homo. Surbaze de la biblia interpretado li provas pruvi la ĉefajn misinstruojn de la eklezio:

- La eklezio multajn bibliajn teksterojn tute ne konsideras.
- La konsekrado de pastroj en la Biblio tute ne estas menciita.
- La mesofero ne povas esti ripetita (Rim. de la aŭtoro: Devus teksti: La ofero sur la kruco ne povas esti ripetita dum la meso) kaj

- La povostrukturo, kia en la eklezio estas praktikata, estas al la Biblio io fremda.

„Mi adiaŭas sen malamo," opinias Ramel, kiu jam dum jaroj siajn ideojn komparas kun la sampensantaj homoj. Samtempe li energie refutas ĉiun riproĉon, ke li apartenas al sekto: „Mi faros ĉiun responsa, se tiu ion similan asertas. Miaj kontaktoj al preĝkomunumo en Amstetten kiel ia ‚Chapter'-aranĝo estis sporadaj, krome ankaŭ tiuj grupoj ne povas esti markitaj kiel sektoj."

La paroĥestro Ramel ek de la momento estis senlabora. Kiamaniere tio profesie funkcios daŭre, li ankoraŭ ne scias. Same tiel li ankoraŭ ne decidis, ĉu nun li geedziĝos aŭ ne. Tamen li restas ĉe sia nova rekono: „Mi pledas pri senkonfesia kristaneco!" La paroĥo Gollin estos priservita ĝis la jarfino de la spirita konsilisto Walter Dier el Erlauf.
JOHANN FRANK

Mi aranĝis fasciklon por ĉiuj leteroj, kiujn mi ek de tiam ricevis. Mi troviĝis en tia plago, ke mi apud ordigo kaj malplenigo de mia loĝejo kaj apud mia serĉado de la laborloko ne trovis forton por tiujn leterojn respondi. En ili troviĝis multa kunsento, spertinterŝanĝo en la fido kaj ligiteco el multaj direktoj.

## 5. En karanteno

Mi devis dum kelkaj semajnoj retiriĝi en la paroĥejo kiel en karantenon. Ĝis tiam mi devis prizorgi por mi novan loĝejon. Bonŝance mi jam antaŭe per mia kredito dum la konstruo de la paroĥejo jam tiam aĉetis loĝejon por la tempo de mia pensiiĝo. Mi propramane aranĝis termoizoladon kaj mi gips-

glatigis la vandojn denove. Mi estis surprizita pri mia manlabora lerteco kaj ni laboris en ĝuo.

## 6. La vorto de Dio forigita el la preĝejo

Unu el la unuaj multedirantaj mezuroj flanke de la paroĥo estis, ke ili denove forigis el la preĝejo la Sanktan Skribon, presita per grandaj literoj. La paroĥa komunumo estis ŝancela post ĉiuj tiuj jaroj de mia priservo. La Sankta Spirito trafe parolis per Jesajo:

*„Ĉar la koro de tiu popolo grasiĝis, kaj iliaj oreloj aŭdas malklare, kaj siajn okulojn ili fermis, por ke ili ne vidu per siaj okuloj, kaj por ke ili ne aŭdu per siaj oreloj, kaj por ke ili ne komprenu per sia koro, kaj por ke ili ne konvertiĝu, kaj por ke Mi ne sanigu ilin”* (Agoj 28,27).

Tiu fermiteco ankaŭ mian priservon blokis per katenoj. Tiun spiritan fonon esprimas la tekstero de Jeĥezkelo 3,24-26:

*„Kaj eniris en min la spirito kaj starigis min sur miaj piedoj. Kaj Li ekparolis al mi, kaj diris al mi: Iru, enŝlosu vin en via domo. Kaj vidu, ho filo de homo, oni metos sur vin ŝnurojn kaj ligos vin per ili, kaj vi ne povos eliri inter ilin; kaj vian langon Mi algluos al via palato, kaj vi mutiĝos kaj ne estos admonanto por ili; ĉar ili estas domo malobeema. Sed kiam Mi ekparolos kun vi, Mi malfermos vian buŝon, kaj vi diros al ili: Tiel diras la Sinjoro, la Eternulo.”*

# 7. Fortigita per la forto de la Sinjoro

Inter la kristnaska tempo kaj novjaro mi helpe de eta kamiono translokiĝis kun miaj havaĵoj. Parton de miaj libroj kaj ceteraj ekipaĵoj mi devis intertempe deponi ĉe iu meblofirmao. Helpis min frato en fido, kiu etendis sian manon, kie troviĝis granda bezono kaj min tiel helpis. Lia proksimo faris al mi bonon. Li povis min bone kompreni. Li mem iam estis tre aktiva en la katolika laborista movado kaj kiel tia li estis delegito ĉe la dioceza sinodo. Ankaŭ li invitis al biblia kurso, kiu baldaŭ allogis multajn vizitantojn, kiuj serĉis novan orientiĝon en la vorto de Dio kaj en Lia Spirito. Ankaŭ nuntempe estas lia ĝojo konduki homojn al la kredo.

## A. Serĉante laboron

Komence de la jaro 1986 mi dissendis tutan liston da laborserĉaj leteroj al diversaj firmaoj kaj publikaj institucioj. La novo kaj la fremdo de la situacio iĝis haŭtproksima. Mi preĝis por akiri gvidadon de la Sinjoro. Alvenis kelkaj malakceptoj, cetere simple deprima silento. Proponitaj estis nur eblecoj labori kiel vojaĝanta reprezentanto por asekuraj firmaoj.

Tiel mi komencis studis diversajn postenproponojn ĉe iu filio de Bausparkasse (banko por krediti konstruadon); helpe de videoklipo mi spektis la proponitan kontrakton. Per tio mi paŝis sur la ŝtupon de praktiko. Ankaŭ sur tiu vojo mi denove preĝis por la halpo ĝuste konduti, fare de la Sinjoro. Sub la instrukcio de Petro:

*„Benadantaj, ĉar al tio vi estas vokitaj, por ke vi heredu benon”* (1 Petro 3,9), mi benis la homojn, kiujn mi renkontis. Mi sciis ankaŭ en tiu situacio, ke mi unue troviĝis tie por respondi, se iu min demandis pri mia espero kaj fido. Fakte aperis ĉiam denove surprizitaj vizaĝoj, kiuj demandis, kvazaŭ pafite el pistolo: „Do, sinjoro paroĥestro – mi daŭre vin titolas sinjoro paroĥestro – kiel domaĝe, ke vi foriris!” Kiam mi menciis mian motivon, ili ĉesis interparolon. Subpene realiĝis potage unu ŝparkontrakto, por kiu mi devis ĉiun tagon veturi 50 ĝis 80 kilometrojn da laborvojo. Per plena precizo mi laboris, rigardante al mia celo kaj planinte, notinte protokolon semajno post semajno. Tiel mi akiris ankaŭ kurson por akiri laborpostenon de plenhora laboro kiel faka konsilisto kaj mi vivis de provizioj. La psika premo ĉe tiu laboro igis min foje laŭte krii al Dio, akompanate de larmoj.

Mi sciis, ke mi por tia laboro daŭre ne estas kapabla. Mia urbestro porparolis por mi denove, ke oni disponigu al mi postenon ĉe *Finanzamt* (ŝtata agentejo por enkasigi impostojn). Sed je ĉiuj decidniveloj troviĝis fortaj baroj. Iun tagon mi ricevis leteron de la financoficeja direktorejo. Mi estis invitita al la sinprezenta intervjuo. Kun koro, plena de espero, mi veturis al Vieno al la direktorejo, kie mi vagadis tra diversaj ejoj ĝis la respondeca instanco. Sed mia tuta peno falis flanken, dirite, ke mi atingu reciprokan interkonsenton kun la eklezio. Tiel mi devis antaŭmeti propran leteron de la episkopo en la senco de rekomendo. En espero, supervenki la baron, mi denove reveturis.

Post kelkaj semajnoj denove venis letero kun nova limdato por plia interparolo. Sur la tablo kuŝis letero, en kiu estis menciitaj la kialoj de negativa respondo por la posteno ĉe la financa agentejo. Laŭdire mi estis en la ĉirkaŭo konata, estinte subtenita de organizaĵo, kiu kontraŭas la eklezion. Tamen mi de neniu ricevis eĉ nur unu ŝilingon. Temis pri la premo flan-

ke de la eklezio kontraŭ mi, kiun mi devus klare senti. Tiu ĉi premo estis sentebla ankaŭ dum pliaj interparoloj, kie mi denove estis pridemandita pri la kialo de mia kreddecido. Mi respondis tiel: „Kaze de la religia instruhoro mi estis devinta diri, ke oni fariĝas infanoj de Dio per la bapto. En la evangelio laŭ Johano tamen estas skribite: *‚Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li onis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo'* (Johano 1,12). Laŭ la atesto de la Skribo do oni iĝas infanoj de Dio, kiam oni en kredo alprenas Jesuon."

La oficisto respondis ekscitita: „Pro tiu ĉi tekstero do vi kubĵetis je tia grando, ĉu? Tio estas la motivo, kial ni vin ne povas dungi. En plej bona kazo vi povas komenci en Vieno, kie neniu vin konas."

## 1. Lastaj baroj

Peza ŝirmkurteno nun troviĝis antaŭ mi, kiu dum certa tempo ebligis al mi nenian rigardon en la estonton. Okaze de mia reveturo en densa trafikstato mi kriis al la Sinjoro por helpo. Tio venis el la senkonsola forlasiteco de mia animo. Sed en mia koro iu voĉo parolis: *Estu silenta kaj fidu la Sinjoron!* Mi estis de tio surprizita. Mi bone sciis, tio venis de la Sinjoro. Ek de la momento mi silentiĝis kaj mi troviĝis en atendo al la Sinjoro. En mi okazis larmsekiga konsolo. La densa kurteno estis denove detirita. Mi veturis kun silento en mia animo en la direkton de mia estonto. Mi pensis, la Sinjoro laboras. Mi lasas tion al Li, kion ajn Li faros. En mi troviĝis plu nenio timenda, sed silenta espero. Tiu respondo de la Sinjoro estis nenio, kion erst mi estus devinta al mi enparoli. Tio lasis min malstreĉa, ja tio venis de Lia flanko. Mi ankaŭ ne bezonis erst serĉi por tio mian fidon, estis certeco, kiun mi ne

bezonis prienketi. Ĉion-ĉi ebligis al mi sperti la efikpovo de Dio. Mi povis denove komenci Lin adori, sen devi elparoli novan porpeton. Tio, kion la Sinjoro montris al mi en mia koro, estis demonstrita erst post pliaj monatoj. Buŝa sciigo fare de la urbestro venis al mi en la tago antaŭ mia nupto. La skriba formo estis de mi atendita ankoraŭ du monatojn. Sed finfine mi povis komenci mian laboron ĉe la financa agentejo en Vieno 6-an de Aŭgusto 1986.

## 2. La Sinjoro estis proksime al mi ĉe mia laborloko

Post ĉiuj-ĉi baroj survoje al la nova profesia ekzisto nun la pordo estis aperta, ke mi povis labori kiel kontrakte dungita en la financa agentejo en Vieno. Ek de Augusto 1986 mi ĉiu-tage veturis pertrajne al Vieno. Mi leviĝis je la 5-a kaj 15 minutoj kaj denove revenis je la 18-a horo hejmen. En la trajno mi havis tempon por riĉa legado de la Skribo: jen psal-mo, jen ĉapitro el la historiaj bibliaj libroj, ĉapitro el la profe-toj en la Malnova Testamento kaj ĉapitro el la Nova. Mi povis dum tio sufiĉe profundiĝi kaj lasi la Sinjoron mem paroli al mia koro. Estis altnivela estado kun la Sinjoro meze de la trajna loko kun multaj frekventvojaĝantoj. Dufoje okazis al mi, ke mi metis mian Biblion flanke, ĉar mi estis enplektita en interparolon kaj mi forgesis ĝin denove meti en mian aktujon. Sed ĉiam denove mi ĝin rericevis, ja ĉiu konduktoro sciis, al kiu la Biblio apartenas.

En la administra kancelario mi en la unua tago ricevis de la organiza ĉefo la unuajn neformalajn instrukciojn por poste esti prezentita en unuopaj sekcioj kaj ricevi mian laborlokon en la sekcio de la financa kaso. La unuaj fakaj esprimoj kiel

datena preparo pere de la akordiga rondo, kontotenado, transaj kalkuloj, datenkontrolo kaj markadtenado enhavis precizan laborprocedon, kiun endis travidi. Pli poste atendis min multaj leĝoj, kiel ankaŭ la procedpreskriboj, regularo de la mondedirĉo por la respubliko, la leĝoj pri la impostigo de enkasigoj, montrafiko, salajra laboro, grundposedo, propraĵposedo, trafiko kaj kapitalo, same ankaŭ la pagdevoj laŭ la konsumado kaj monopolstatuso, kontribuoj… kiuj estas uzataj en la sekcio de la prepozicioj, en la kancelario por prijuĝo, pri la punkondamnoj, ekzekutado kaj salajroimpostado. Apud tio ĉiu laborprocedo estis plena da erareblecoj, ja ĉiam oni devis konsideri multajn flankaĵojn. Oni povus apliki § 103 aŭ § 98, sed eble ankaŭ § 8 de unu nura leĝo en tiu ĉi kazo aŭ eĉ tute alian leĝon kun certa paragrafo. Tiel mi haŭtproksime spertis, kiel malsupre nun mi devis komenci. Mi havis 49 jarojn kaj ektrovis min en tute fremda mondo. Ankaŭ inverse, mi estis por multaj eksparoĥestroj sur tiu ĉi loko tre fremda mondo. Tiel ni komencis nin malrapide interkonatiĝi home. Kelkaj provis sin bone prezenti, do ili estis okupitaj pri si mem. Aliaj demonstris sian konon kaj povon, kiujn ili en la sekcio kaj ekster ĝi havis. Denove aliaj varmigis sin temp-al-tempe sub bonaj kontaktoj kun kelkaj bonaj amikoj. Por ĉiu el tiuj homaj trajtoj mi estis tre dankema. Iu kolego alparolis min antaŭtagmeze, ke mi iru kun li manĝi. Post nia unua parolinterŝanĝo, dum kiu mi en mallongaj skizoj prezentis la kialon de mia decido en la fido, li diris: „Mi faris same, vi estas alia homo. Vi havas radiadon, kiun mi tuj sentis. Ĉe multaj el ni ĉio estas tiel morta, tiel senpersona, ili restas al oni fremdaj. Ĉe vi mi tuj trovis alpaŝon.”

Dum la sessemajna enkonduka kurso ĉe la „Finanzlandesdirektion” (provinca direktoraro por financoj) ni kune kun la dungitoj A (juristoj) per prelegoj kaj multaj ekzamentestoj estis informitaj pri la baza scio super la tuta financa

problemaro. Samtempe oni volis testi ankaŭ la ŝarĝkapaciton de la kandidatoj. Mia sukcesatingo de 94 % situis ekstraordinare bone. Tamen tio kostis mian penadon kaj ŝvitadon. Aldone mi akiris postenon por predispozicioj kiel anstataŭanto pro la graveda libertempo de iu kolegino, por prizorgi la grupon de verkistoj kaj artistoj.

## 3. Gardita okaze de la akcidento

La 21-an de Majo 1987 mi transveturis sur mia vojo al la oficejo frumatene la straton Kaiserstraße. Tiu strato estis dense frekventita kaj sur ĝi tie troviĝis neniaj zebrostrioj por la piedirantoj. Tiel mi inter du parkigitaj aŭtoj transveturis tiun vojparton kaj mi tuŝis per mia aŭto la antaŭan kotŝirmilon de iu subite alveninta aŭto. Mi frapis per mia kapo en la glacon kaj falis aliflanken de mia aŭto kaj rompis mian maldekstran brakon. Tion diris al mi la akcidentprotokolo. Mi mem havis en mia memoro neniun sekundon pri la okazaĵo. Kun krania rompo, cerba pistiĝo, tranĉetoj je la cerba haŭto kaj rompo de la supra makzelparto mi venis en la malsanulejon por akcidentuloj. Tagon poste mi denove akiris konscion. Post unu semajno mi la unuan fojon vidis mian vizaĝon, kie ĝi ne estis bandaĝita, estinte malhelblua, flava kaj verdeca. La tuan tempon de mia troviĝo en la malsanulejo mi estis plena de danko al la Sinjoro, ke Li min gardis antaŭ la morto. La kontrolkuracisto diris al mi, ke mi dufoje eskapis la morton. Kaze de la cerba pistiĝo normale postrestas gravaj daŭraj damaĝoj; se la tranĉetoj de la cerba haŭto estas pli fortaj, la cerba fluaĵo elfluas, kio kondukas en garantiitan morton. En la kranian kovraĵon oni devis bori kvin truojn por elsigeli la ostojn. Ĉi tie mi rememoris, ke la Sinjoro difinas la

limon, ĝis kie la frapo de Satano povas iri. Nun mi tiom pli rajtas esti la atesto pri la gvidado de la Sinjoro.

## B. Benita en la profesia laboro

Post pluraj monatoj mi estis vokita al la ĉefo, kie estis al mi mesaĝite, ke mi estos lokigita en alian sekcion. Sed mi devis en la administrejo fari ankoraŭ kelkajn kopiojn kaj dume oni min vokis denove, kaj mi eksciis, ke mi venos denove al alia laborloko. En mi kreskis konsterniĝo, kiamaniere oni procedas super mi. Sed la voĉo de la Sinjoro diris al mi tute klare: „Restu trankvila, lasu tion okazi!” Mi diris enpense al la Sinjoro: „Sed se tiel, faru el tio ion bonan!” Poste mi ankaŭ povis spontane esperi. Post unu jaro malfermiĝis la ebleco deponi petskribon por esti translokigita al Amstetten. Je mia granda surprizo ĉiuj decidaj instancoj aprobis mian peton. Nun mi povis ŝpari al mi mian ĉiutagan veturadon al Vieno. Nun mi sciis, ke temis pri la respondo de la Sinjoro al mia obeo.

En Amstetten mi ricevis postenon de familia financhelpo. Mia unua laboo en tiu por mi fremda sektoro estis la ekzekuto de la financa helpo por la lernantoj, kiuj veturis ĉiutage en lernejon. Mia kontakto kun la kolegaro estis kolegeca kaj familieca. Okze de la karnevala festtago la unua frazo pri mi tekstis: „Nun ni akiris la paroĥestron, por ke en la financa agentejo neniu plu mensogu.” Dum la klienta frekventado venis homoj ne nur kun iliaj petskriboj por ilia familia financhelpo, helpo okaze de naskiĝo, helpo por veturado kaj kun petskriboj por aldonaj financhelpoj ktp., sed ankaŭ kun siaj tute personaj plagoj kaj zorgoj. Tiel okazis ne rare ankaŭ in-

terparoloj pri la kredo kaj kelkajn fojojn eĉ preĝo. Mia koro batis pli forte, kiam tiaj homoj denove iris de ni kuraĝigitaj.

Post jaroj miaj kunlaborantoj rimarkis, ke mi vivas en certa sekureco, el kiu venas mia gajeco, mia bona humoro kaj mia alparoleblo. Tiel oni trovis bona, ke mi okaze de iu kristnaska festeno spontane estis vokita diri al la kolegaro kelkajn vortojn, ja la respondeca parolisto, la ĉefo, ne povis veni. Ek de tiam mi flanke de mia ĉefo kaj de la personara servo estis petita aranĝi niajn kristnaskajn festenojn. La lastan fojon nia ĉefo diris: „Vi parolas tiel spontane kaj neĝenite pri Dio, ke estas vera refreŝiĝo vin aŭskulti. Ne troviĝas io malagrabla, kio la homon starigus en embarason."

## C. Pensiiĝo, por esti libera por la Sinjoro

Ĉar mi povis finkalkuli la limtempon de mia pensiiĝa valideco kaj mia 60-a vivjaro komenciĝis 1-an de Majo 1997, mi por la 31-a de Julio 1997 deponis mian petskribon. Ankoraŭfoje mi invitis la tutan sekcion kun la ĉefo al mia hejmo por festi en amo. Okaze de tio disponiĝis ebleco montri ankaŭ miajn antaŭajn laborkampojn, estinte paroĥestro. En la tempo de mia servo kiel paroĥestro la preĝejo en Golling an der Erlauf estis fare de la akademia pentristo prof-o Sepp Mayrhuber arte prilaborita en la senco de speciala tekniko „stuccolustru". Tiu ĉi tekniko estis trovita en Pompeo kaj en Herkulaneo kaj similas al la artefarita marmoro. La altarbildon kun la prevalenta motivo de la apostazita Kristo la artisto priparolis kun mi laŭ ĝia teologia enhavo. Troviĝas nenia sanktula kultado. Francisko genuas super sarkofago. Li vivas ĉe Kristo

kaj levas siajn manojn al la apostazita Jesuo en preĝo. Samtempe li troviĝas tiel sub la ŝirma brako de la apostazita Kristo. Jesuo estas konfirmita per la mano de sia Patro, kiu vinkas el la lumo. El la Sankta Spirito iras la helaj koloroj tra la tuta fono, kio volas esprimi la efikadon de la Sankta Spirito en la mondo. La sekiĝinta arbo, trafita per la veneno de la serpento nun per la akvoj de la vivo de Kristo denove estas vekita en vivon.

Inter la amzorge aranĝitaj adiaŭaj donacoj estis al mi donacita ankaŭ iu libro. La titolo estis: *Er war einer von uns* (Li estis unu inter ni) de Rien Poortviliet kaj Friedrich Meisinger, Kawohl-Verlag. Temas pri la bildlibro pri la vivo de Jesuo kun tre densa teksto. La dediĉo tekstis tiele:

> Kara Johano!
> **LI ESTIS UNU INTER NI. . .**
>
> La titolo validas ankaŭ senkonsidere la enhavon de la libro.
> Kaj tamen mi esperas, ke la titolo ne estas tute adekvata; ke, nome, vi ĉiam estos iomete UNU INTER NI kaj tio restos!

Mia rilato al ili ankaŭ okaze de manpremado en la lasta tago de mia laboro multajn el miaj gekolegoj igis diri al mi vortojn de alta aprezo. Tiel mi konsideris en mia preĝo kaj en miaj pensoj de simpatio ilin ĉiujn kaj preparis por ili leteron, per kiu mi al ili ankoraŭfoje klarigis, kio estis la plej gravaj aferoj por ili kaj por mi.

## D. Karaj gekolegoj!

*(Letero al miaj karaj gekolegoj!)*

Okaze de la fino de mia laboro per 31-a de Julio 1997 mi volas postlasi vorton de danko. Mi estis nur malmultajn jarojn dungita en granda laborproceso de la alta financa agentejo. Ankaŭ en la tempo de kreskinta laborkvanto mi retenis la satisfakcion, ke la familioj, speciale la unupersonaj edukintoj povis ĝustatempe ĝui la ŝtatan helpon.

Kion mi ĉe la kolegaro tiom aprezas, estas la pli-riĉiĝo en rilatoj, la aprezado de pensinterŝanĝo pri la vivsenco kaj la partopreno ĉe la ĝojiga kaj ankaŭ malpli ĝojiga flankoj de la vivo. La gaja interparolo, la pensoj, kiuj kondukas antaŭen kaj reciproka akceptado ligis nin unu kun la alia.

Ĉio-ĉi restas transe de la tempo de nia kuneco al ni konservita. Tiel mi volas malpli adiaŭi, sed pli doni spro-non por ĝojo je la vivo. Laŭ mia aprezo por vi venas ankaŭ miaj bondeziroj, kiuj etendiĝas super la ĉiutaga vivo. Mi konas potencon, kiu nin portas tra la vivo. Sub la suno de Dio mi vidas mian malfruan transiron de la paroĥestro al la simpla disĉiplo de Jesuo, mian feliĉan familian vivon en komforta domo kun multa verdaĵo ĉirkaŭe. En la vorto de la Skribo kaj meze de bonaj ami-koj en la fido mi travivas iom da tiu potenco de Dio. Pro tio mi skribas pri mia sperto, kiun mi povas peri antaŭen en la senco de mia bondeziro, ĉar ĝi povas iĝi alirebla por ĉiu. Mi vidas mian vojon de plenumiĝo en kvar eldiroj, kiuj sekvas unu el la alia.

1. Dum ies vivo al mi estis perita difektita bildo pri Dio, pro tio Dio estis al mi ankaŭ tiel longe fremda. Malantaŭ unu nura ĉelo troviĝas tuta biologia konstruprogramo de la kompleta estaĵo, tiel ne revelacias sin nur multa inteligento, sed tiel staras persona, inteligenta Kreinto. Li difinas rilatojn kaj komunumojn, la vivon, kiu vivas el la amo. Ĉio kontraŭdia detruas la komunecon kaj la amon, faras la homon soleca kaj izolita, igas la homon morti. Tiu ĉi amo de Dio, kiu lasas min vivi, povas min atingi. Pro tio mia unua baza eldiro:

**Dio min amas kaj volas doni al mi plenumitan vivon.**

2. Koncerne min mi ne havas kapablon, starigi vivan rilaton kun Dio. Multaj religiaj rilatoj baziĝas sur la pseŭda rilato, estas produkto de oniaj propraj pensoj, sentoj, deziroj kaj de onia religia eduko, kiuj havas falsan adreson, falsan bildon pri Dio. Al Jesuo estas donite, kiel al neniu alia, doni la eternan vivon (la vivo, kiel Dio ĝin havas). Tiu vivkvalito ne estas produkto de onia pieco. Pro tio jen mia dua baza eldiro:

**Mi ne povas transponti la vojon al Dio.**

3. La sonmuro inter la Dia kaj la homa regiono povas esti trabatita nur fare de Dio. Pere de Jesuo Dio venis al mi. Lia alveno estis antaŭdirita per multaj detaloj, kiel tio aperas ĉe neniu religia fondinto. Li posedas en sia agado kaj parolo Dian memkonscion kaj li komprenas sian mision en tio, doni al mi la ŝlosilon por la regno de Dio. Li forigis la baron inter Dio kaj la homo. Li povas min

deaĉeti el la mortporta izolo, se mi al li fidas en tio, kion li volas diri al mi kaj kion li faris por mi. Pro tio jen la tria baza eldiro:

**Nur Jesuo malfermas al mi la veran alpaŝon al Dio.**

4. Ĉar en ia rilato du flankoj estas engaĝitaj, ne sufiĉas la nura ago de Dio por restarigi la Dio-homa rilato. La amo ne konas sltrudan feliĉigon, ĝi vivas el la reciproka libera decido unu por la alia. Tiu decido korektas la malsanan vivsintenon, vivi nur el mi mem aŭ tamen el la anstataŭa Dia principo. Tiel el la pseŭda rilato fariĝas viva rilato kun Dio. Mia malfido al Dio denove fariĝas vivo, fidanta al Dio. Mi fidas al Li, kion Li en la Sankta Skribo diras pri mia rilato al Li. Mi komencas kompreni kaj vidi min en tiu ĉi lumo de Dio. Tiu ĉi vido eligas sentojn, dirantaj al mi, ke mi ne estas sufiĉe bona. Mi estas denove amata kaj akceptita kaj ne plu eligita. Do mi ne devas ĉion-ĉi erst meriti. Estas kiel inter la amantaj homoj. La amo, kiun mi ricevas de mia partnero, ne bezonas esti meritata de mi. Estas alies libera decido, min ami. Mi rajtas la amon simple alpreni, lasi ĝin validi. Dio jam deĉiam la unua min amis. Tio min faras libera de la spasma klopodo plenumi mian devon. La vivo estas la donaco kaj volas esti plenumita laŭ la maniero de la donaco. La tuta kulpo, la tuta deficito estas al mi pardonita, se mi Lian proponon de la savo alprenas. Tion diras la kvara baza eldiro:

**Mi decidas rilate tion, kion Jesuo al mi signifas kaj donas. Estas mia kreddeklaro, per kiu mi alprenas Jesuon.**

Tiu ĉi deklaro pri la alpreno de Jesuo ŝanĝis mian vivon. Per sekvaj vortoj mi tion esprimis:

*Sinjoro Jesuo, mi vidas mian vivon en via lumo. Mi scias pri mia perditeco. Al mi mankas la gloro de Dio, mi estas la kreitaĵo malsolida kaj plena je mankoj. Nun via plenpovo min savi fariĝis al mi klara. Mi vokas vin mia Savanto kaj Sinjoro. Venu en mian vivon kaj malfermu vian rilaton al mi, kiu kunprenas la diecan vivon. Plenumu min per la Sankta Spirito, kiu min konduku laŭ viaj intencoj. Vi estas bona. Mi volas rakonti pri via mizerikordo en ĉiuj tagoj de mia amo.*

Tiu ĉi vojo estas tiel simpla kaj povas esti transpaŝata de ĉiu. Por aldona interparolo, por interŝanĝo de spertoj aŭ ankaŭ por la sporada komuna preĝo mi ĉiam volonte troviĝas je dispono.

La Sinjoro vin benu kaj gardu!
La Sinjoro lasu sian vizaĝon lumi super vi kaj estu al vi gracoplena!
La Sinjoro levu sian vizaĝon sur vin kaj donu al vi la pacon!

Kun plena rememoro via

Johannes Ramel

# 8. Benita per mia edzino

## A. La Sinjoro ene de la familio

La 2-an de Majo 1986, tio estas unu tagon post mia 49-a naskiĝtago, en la urbdomo Krems-Stein Eliza kaj mi antaŭ la publiko diris nian vorton JES por la geedzeca vivo. Trovis sin mallarĝa amika rondo de 15 personoj, kiu nin akompanis. La saman tagon ni tamen renkontis ankaŭ la pli larĝan rondon da gefratoj en fido en iu hotelo, por en la lumo de la Dia vorto alpreni la benon super nia geedzeco akompane kun la preĝo.

Eliza fariĝis por mi grava partnero en la fido kaj en la vivo. Antaŭ ŝi mia vivo estas tiel malfermita, ke mi nenion antaŭ ŝi prikaŝi povas ka bezonas.

Ŝi amas min kune kun miaj malfortoj kaj miaj fortoj. Tio lasas min stari antaŭ ŝi tiel malstreĉa kaj honesta. Sed antaŭ ĉio ŝi montras al mi konstante sian altan estimon, kiu donas al mi ĝojon en laboro kaj forton en mia servo por la faroj por la Sinjoro. Rigardate spirite ŝi kun mi komprenas nian geedzecon kiel bazon de kunveno de nia domeklezio. Tiel ni renkontas nin potage ĉe legado de la Skribo kaj preĝado, foje nur mallonge, foje ankaŭ pli longe, por meti ĉiujn niajn aferojn antaŭ Lin. Tiu ĉi komuneco de nia komuna disĉipleco nin portas tra la tuta tago. Se nia troviĝo antaŭ la Sinjoro estas pala, perdiĝas tiel ankaŭ nia ĉiutaga vivo en vanteco kaj falas en turbulojn. Tiel ni tre volonte revenas kun pento al nia hejmo kaj fido. Nia vivo estas multvalora, tamen nur sur la vojoj kun la Sinjoro.

## B. Kiamaniere la Sinjoro gvidas?

Multaj sacerdotoj demetis sian pastrecon pro virino. Tio por mi ne estis decida motivo. Mi provis, kompreneble, en malsukcesa maniero unuigi mian sacerdotecon kaj mian rajton havi edzinon – kiel cetere la apostoloj kaj la fratoj de la Sinjoro, kaj Kefaso (1-a Korintanoj 9,5). La decida entranĉo en mia spirita evoluo tamen venis per malkovro de la senpera kredrilato per Jesuo Kristo al la Patro, kiel mi tion enkonduke montris. Ke per tio ankaŭ la rilato al la virino, kiun mi amis, laŭ la liberigita maniero kaj sub la beno de Dio aperis, estas la postsekvo de mia nove akirita rilato kun Dio.

Mi renkontis mian edzinon la unuan fojon okaze de iu nupto, ĉe kiu ŝi estis mia najbarino ĉe la tablo. Ŝia sana kompreno pri la temo, kiu leviĝis apud la tablo, plaĉis al mi kaj montris multon komuna inter ni. Ankaŭ ŝia precizemo, kian ŝi kiel la ĉefsekretariino en iu masona firmao kaj kiel librotenisto kaj kalkulanto de salajroj en iu meblovenda firmao, akiris, korespondis kun miaj klopodoj.

La varmo de ŝia proksimo penetris sub mian haŭton. Mi rimarkis, kiel ŝi min aprezas kaj kian atenton ŝi por mi dediĉis kaj tamen ŝi ne estis altrudema. Post pluraj monatoj ni nin revidis sur la strato kaj interŝanĝis parolon en ĝojo de nia revido. Mi proponis novan renkontiĝon por interparolo. Je mia surprizo ŝi pozitive respondis mian proponon.

### 1. La malcertiĝo ĉe mi

Mi ĉiam denove sentis fortan necertecon ĉe la demandoj pri la interhomaj rilatoj. Jam dum mia tempo en la mezlernejo

ĉia kontakto kun knabino lasis en mi sonori alarmon. Por mia sento tio estis perfido je mia sacerdota vokiteco. La fido en tiu punkto ne devis esti minacita. Tiel mia kompleta bonnomo estus difektita. Spite al mia tuta kamaradeco inter la studentoj kaŝeniris min certa sopiro, sperti delikatan rilaton, kian knabinoj elradias. Por mi estus sufiĉe esti alparolita kaj alrigardita de tiu aŭ alia knabino. Mi povas ankoraŭ bone rememori. Okaze de la lerneja danco estis ekspoziciitaj fotoj de la paralela klaso. Mi aĉetis tiun foton, por havi tiel antaŭ mi la bildon de certa knabino.

Ĝuste tiu ĉi deficito estis la grundo de mia longtempa soleco. Ĝi ne povis esti solvita per mia pli posta socia pozicio kiel paroĥestro kaj same ne per mia servo por la fido.

## C. Ĉu estas permesite geedziĝi?

Al la interkonsentita renkontiĝo por pli proksime interkonatiĝi sekvis tempo de aldona reciproka konatiĝo en la rondo de konatuloj de mia estonta edzino. Ni rimarkis, ke nia rilato kreskis en personan intimon. Sed ekloĝi kune sen nupto ne estis imagebla. Tiel ni unue preĝis, por ke la disciplino de celibato estu abolita. Ek de la II-a vatikana koncilio estis la jam edzigitaj elpruvitaj viroj (*viri probati*) konsekritaj kiel diakonoj. La sekva ŝtupo do estus, ke tiuj viroj post certa tempo de elprovo estus konsekritaj por sacerdotoj. Pri tiu ĉi demando ni longe interparolis, ankaŭ pri la biblia ordo, ke en ĝi ĝuste la edziĝintaj viroj validis kiel kandidatoj por presbiteroj kaj por episkopoj. Ni travivis la liturgian reformon de la latina al la gepatra lingvo. Antaŭe la meso en la gepatra lingvo estus prezentita kiel problemo. Ĉu tamen povus veni ŝanĝo ĉe la demando de la celibato?

## 1. Malpermeso geedziĝi el la instruo de demonoj, ĉu?

El la atestoj el la Sankta Skribo iĝis por ni ambaŭ klareco, ke antaŭ Dio validas alia ordo koncerne geedzecon ol en la eklezio de Romo. Dio ne malpermesas geedziĝon, nur la eklezio tion faras. Sed rilate tion al neniu institucio – ankaŭ ne al la eklezio – estas de Dio permesite starigi la malpermeson geedziĝi. Eĉ se troviĝas multaj motivoj, kiuj la eklezion inklinigis tian malpermeson starigi. Ĉiuj tiuj motivoj havas nenian aŭtoritaton el la Sankta Skribo. La eklezio povus nur eldiri rekomendon, kiel ĝin donis ankaŭ Paŭlo, kiam temis pri aparta situacio, kaj tamen li samtempe parolas pri sia rajto havi edzinon (*1-a Korintanoj 9,4*) kaj tiel demaskis la spiritan fonon, de kie venas la malpermeso geedziĝi:

*„Sed la Spirito klare diras, ke en la venontaj tempoj kelkaj defalos de la fio, atentante delogantajn spiritojn, per la hipokriteco de trompantoj, kiuj havas la konsciencon kaŭterizitan kvazaŭ per brule varmega fero,* ***admonante ne edziĝi****…* (1 Timoteo 4,1-3).

Samtempe tamen ankaŭ en la katolika eklezio estas akceptite, ke la gefianĉoj reciproke donas al si la sakramenton de la geedzeco. La paroĥestro estas nur de la eklezio starigita atestanto de la nupto, kiu poste ankaŭ donas la benon de la eklezio.

## D. Reciproke donitaj por la geedzeco

Ni havas do laŭ nia envido la permeson de Dio, geedziĝi. Tiel ni akompane de preĝo donis al ni la reciprokan nuptan promeson kaj ni sciis en nia konscienco, ke ni surbaze de la falsa jugo de la home elpensita celibata regulo agis laŭorde. Tiu ĉi nia konsciencdecido tamen ne povis esti tiel rapide esti transprenita kiel la ĝenerala regulo. Ni cetere eniris kun pura konscienco nian geedzecon, ĉar ni ne vidis alian vojon, tamen ni devis konstati, ke oni la geedzecon – kiel Dio ĝin anoncas – tiamaniere ne povas realigi.

En la korsincera amo kaj dankemo al Dio ni nin ĉirkaŭprenis akompane de nia preĝo. Mia edzino tiel translokiĝis kun sia kvarjara filo Mihaelo en mian ofican loĝejon de la paroĥestro. Ŝi plenumis mian administran laboron por la paroĥo kaj prizorgis la dommastrumadon apud sia cetera profesia laboro. Pli poste ŝi estis dungita en sia firmao nur plu duontempe, por ke ŝi povu pli intense labori por la paroĥo. Tiel ŝi asistis ankaŭ kiel „tablopatrino” okaze de la unua komunio kaj super aliaj paroĥaj okazintaĵoj kaj partoprenis instruhorojn por ludi orgenon, kaj tiel ŝi baldaŭ transprenis la orgenservon okaze de enterigoj kaj piadoraj horoj.

## E. Proklamo de nia geedzeco

Dum la paso de la jaroj mi al ĉiam pli da paroĥanoj malfermis la envidon en nian konsciencdecidon rilate nian geedzecon. Ni gajnis pro tio multe da komprenemo. Nun nia sekre-

to estis konata ankaŭ en la paroĥestraj rondoj. Tuj mi estis ĉe ili izolita kaj malakceptita. La premo sur min estis tiom forta, ke Elisa kaj ankaŭ ŝia infano tion sentis kaj sub tio suferis. Pro tio mi 15-an de oktobro 1979 skribis kiel paroĥestro al la papo:

> Sankta patro,
> la apostolo Paŭlo diras en la 1-a epistolo al Timoteo 3,2 kaj al Tito 1,6, ke la sacerdoto estu edzo de unu edzino; kaj en la 1-a epistolo al Timoteo li diras, ke tiuj, kiuj la geedziĝon malpermesas, sekvas la herezan instruon de demonoj. Laŭ la evangelio laŭ Mateo 15,6, oni ne rajtas aboli la vorton de Dio pro la tradicio.
> Surfone de tiuj ĉi vortoj mi alvokas vin, sankta patro, la eklezian celibatleĝon por la sacerdotaro denove aboli kaj la eklezion denove konduki reen al la vorto de Dio.
> Mi ne ĉesas peti la plej altan Sinjoron de la eklezio, Jesuon Kriston, ke LI vin, la sanktan patron, spronu, solvi la celibatdemandon en la senco de la Dia vorto.
> En la kazo, se vi la vorton de Dio daŭre abolos surbaze de la tradicio (Leĝo), mi ne ĉesos la kristanojn en la tuta mondo peti je ilia preĝo kaj fastado por tiu ĉi intenco.
> Via en la vorto de Dio ligita paroĥestro Johano Ramel.

Revenis nenia reago. La semajnon post tio mi eksciis, ke la papo skribe dankis ĉe iu virino pro ŝiaj naskiĝtagaj deziroj.

## 1. Protektita dum la malsano

Sub tiu nevidebla premo fare de la eklezio mi tiris kaze de miaj aktivadoj kaj agoj pertempe inter Elisa kaj mi pli kaj pli klare senteblan separlinion. Per tia konduto mi submetis mian edzinon al multa sufero kaj mallaŭta deprimo. Aldone ŝi estis fine de julio 1981 mordita de iksodo kaj ricevis inflamon de

sia cerbhaŭto de la plej alta grado. Komence ni supozis, ke ŝi ricevis gripon, ĝis ŝi el sia lito ne povis plu leviĝi. En la hospitalo ŝi dum ok tagoj kuŝis en komao. Okazis kompleta lamiĝo, mem okulojn ŝi ne povis plu movi. Ili estis ŝmirkovritaj per ia ŝmiraĵo, por ke ili ne sekiĝu. Ŝi ricevis gorĝtranĉon kaj maŝinan spiradon. Nur la koro ankoraŭ funkciis. Dum la duonjara hospitaliĝo poste la lemiĝo iom post iom delasis.

## 2. Ĉio estas donaco

Dum la horoj de ŝia agonio mi preĝis por ŝi en mia aŭto dumveture al ŝi. Mi dankis la Sinjoron, ke Li ĝis nun ŝin al mi donis kaj mi redonis ŝin en Liajn manojn, ne sub impreso, ke nun ŝi mortos, sed en scio, ke nun ŝi ekskluzive troviĝas en Liaj manoj. En la dimanĉa evangelia legaĵo estis parolo pri la siriofenica virino, kiu petis Jesuon por sia filino. La situacio parolis al mi tre forte. Ankaŭ mi havis nenian eĉ tiel malgrandan postulrajton antaŭ la Sinjoro. Sed eĉ la hundoj ricevas de la paneroj, falintaj desur la tablo. En tia modesta kredo mi petis la sinjoron por la resanigo de Elisa. Ĉe tio mi ne premis, mi disponigis la tutan kredon en Lin kaj lasis Lin fari. Mi havis konsilplenan kredon, ke la Sinjoro la situacion konas kaj faros el ĝi la plej bonan eliron. Mi dumpreĝe etendis miajn manojn super ŝi memorante je Marko 16,18b:

*„Sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos."*

Kaj mi rimarkis, ke mi rajtas tion fari en konfido en la vorto de la Sinjoro.

Dum tuta semajno mi ŝin ĉiutage vizitis en la hospitalo kaj observis ŝia malrapidan revenon, mi aŭdis ŝian feblan voĉon kaj tenis ŝian manon. Iu amika familio gastumis Mihaelon kaj min en tiuj semajnoj kaj ankaŭ aliaj helpis al ni.

Post ses monatoj Elisa tre pliboniĝis, ke tiel ŝi denove povis iri labori, kvankam la asekurejo al ŝi proponis antaŭtempan pensiiĝon. Post unu jaro ŝi denove provis skii. Sed ĉe ĉiu eta baro ŝi kunfalis. Estis trista situacio. Sed ŝi denove rektiĝis. Komence oni kredis, ke ŝi restos flegenda kazo. Nun ŝi estas restaŭrita kun plenaj fortoj.

## F. Premo, fare de la eklezio

La eklezia premo dum jaroj super ni du kreskis kaj finfine mi cedis antaŭ la postulo de la eklezio denove. Mi interkonsentis kun la episkopo, ke mi translokiĝos malproksimen en iun benediktanan klaŭstron en Luksemburgio por tiel oferi mian rilaton al Elisa. Pro mia malkuraĝo mi tion ĝis lasta minuto tenis antaŭ Elisa en sekreto. Tiu tago estis kiel tempmezura aparato, kiu kuris en la rapido de sekundoj. Estis dimanĉo. Mi devis celebri ankoraŭ festmeson en la festena tendego de la Ligo de Samaritanoj. Post la tagmanĝo ni ankoraŭ iris en publikan banejon por du horoj. Kaj post tio venis la ŝokminuto. Kun sanganta koro mi diris al Elisa, ke mi por ĉiam forveturos. Mi petis ŝin laŭeble al mi tion pardoni, mi devas la katolikan eklezion obei. Ĉio-ĉi venas antaŭ miajn okulojn, kvazaŭ nun estus okazinta murdo. Estis terura homofero sub la falsa timoplena opinio, ke tio estas de mi postulata. Mia bildo pri Dio fariĝis por mi fremda, malmoliĝinta al la sangavida idolo, en kies potenco estas devigo kaj detruo.

## 1. Kaptita en la postulo de la eklezio

Mi tremis je mia tuta korpo, deŝirinte min de Elisa kaj forveturinte. Pro sia malesperiĝo ŝi kuris for de mi sencele en sia doloro. Dum la tuta tempo mi en neniu momento sciis, kion ŝi estus preta kontraŭ si fari. Tiel mi veturis en trajno dum horoj dumnokte ĝis mi en malfrua posttagmezo atingis mian malcertan celon.

Inter la askezaj klaŭstraj ŝtonoj mia tuta vivo aperis antaŭ mi ŝtoniĝinte. En la klaŭstro oni parolis france, nur kelkaj patroj parolis germane. Mi havis por legi nur mian Biblion kaj la horpreĝan Brevieron. Mi retiriĝis en mian ĉelon kaj kriis al Dio. Mi ekkuŝis sur la plankon disstreĉiĝinte kaj atendante ploris kaj preĝis. Dum horoj mi legis en la Biblio, unue la libron Ijobo kaj la psalmojn, poste el la Nova Testamento kaj denove el la libroj de Moseo… Mi faris dum legado taglibrajn noticojn por noti, kio povus esti el la legado de la Skribo al mia koro dirita. Mi interrompis tion nur per la enkoridoraj promenoj kaj per la fiksitaj diservaj tempoj kaj manĝtempoj. Dum la plilongigitaj promenoj mi volis interparoli kun mia Sinjoro. Mi ricevis nenian eĥon. Min ĉirkaŭis tia angora silento de Dio, ke mi ne vidis min plu kapabla, iam ajn en estonto prezenti predikon. La responsa patro, kiu havis la taskon min spirite akompani, nur mallonge parolis kun mi post la unuopaj manĝoj, kaj li ne sciis, kiamaniere al mi helpi. Nur li estis mirigita, kiamaniere mi povis tiom longe legi ekskluzive nur en la Biblio. Iu alia patro rimarkis mian situacion kaj demandis min pri la fono de mia ĉeesto. Mi malfermite klarigis al li, ke mi havas devligan rilaton kun mia edzino kaj mi nun pro obeo al la eklezio ŝin forlasis. Li ekscitita diris: „Vi malsaĝulo, veturu tuj hejmen al via edzino!” Mi diris al li en

larmoj: „Tion mi tamen ne rajtas fari.” Poste li dekovris al mi la faktajn cirkonstancojn, kiaj aperas ankaŭ ene de la klaŭstro. En Francio troviĝas aparta sekreta kliniko por orduloj kaj ordulinoj, kiuj pro la celibato estas psike kaj nerve grave damaĝitaj, por ke nenio penetru eksteren. Kiel eruptas la homoseksualaj inklinoj kaj unuopuloj dum jaroj flegas rilaton ankaŭ kun edziniĝintaj virinoj. Ĉar mi tion ne povis kredi, li nomis al mi aliajn patrojn en gvidaj postenoj, kiuj povus al mi konfirmi la samon.

## 2. En la profundega plago

Mi ne povis plu libere spiri; mi vidis min en maro de forlasiteco fare de Dio. La vorto pri Judaso min persekutis: *„Kaj li ĵetis la arĝentajn monerojn en la sanktejon, kaj eliris, kaj forirante, pendigis sin”* (Mat 27,5). Mi ĵus troviĝis en densa foliarba bosko kaj mi haŭttuŝe travivis, kiel nevidebla mano min kaptis. Mi kriis al la Sinjoro por ricevi helpon: *„Sinjoro, savu min, por ke mi ne pereu!”* (laŭ: Jes 44,17; Psa 3,8; Psa 69,2). Dum neniu alia horo mi travivis tian minacon. Kaj tiam la Sinjoro venis min helpi. Li do tamen ne estis malproksime de mi. Sed Li ne venis min helpi perate far la katolika eklezio, sed pro mia helpalvoko al Li.

## 3. Tie, kie la Sinjoro estas

En tiu momento estis por mi klare, kie la Sinjoro estas. Ne en mia ĝistiama eklezio. Nun tio fariĝis por mi videbla kiel la demone minaca povo, kiu povus detrui mian aliron al Dio kaj same ankaŭ mian vivon. Mi vokis la najbaran familion de mia edzino kaj demandis pri Elisa kaj ŝia farto. La dommastrino

diris, ke ŝi devis esti dumnokte ĉe Elisa, ĉar ŝi sola ne povis ĉion-ĉi elteni. Ŝi apenaŭ estas kapabla ion manĝi. Ŝi ne scias, kiel vivi plu. Sed mi estis deŝarĝita per scio, ke ŝi ankoraŭ vivas.

La generala vikario min voikis, ĉu mi preferus iri en misi-on. Se tiel, mi devus unue lerni kelkajn fremdlingvojn kaj informiĝi pri la kulturo de la misiaj landoj. Mi decide ma-lakceptis. Cetere mi trovis min tute nekapabla ion ajn entre-preni.

## 4. Konsolu, konsolu mian popolon

La paroĥanoj intervenis energie ĉe la episkopo, ke li min revoku en la servon. Tiel mi tuj entreprenis mian revenon. Mi telefonis nun kun Elisa, ĉu ŝi al mi permesas, ke mi ŝin ren-kontu, revojaĝante al mia hejmo en Supra Aŭstrio, por ke ni priparolu ĉion. Mi fartis kiel Jakobo antaŭ sia renkontiĝo kun Esavo. Ŝia voĉo sonis feble. Tamen trapenetris la kablon mal-forta *„Jes”*. Mia stato, dum kiu kontinue malaperis mia viv-forto, ŝanĝiĝis en tiu senco, ke nun revenis nova vivforto. Kurento de inklino kaj de la konsolanta amo verŝiĝis super tiu distanco en la direkto al Elisa. La melodio de la oratorio de G. F. Händel „Der Messias” (La Mesio) troviĝis en mia orelo kaj samtempe la vorto el la Skribo: *„Konsolu, konsolu Mian popolon, diras via Dio. Parolu al la koro de Jerusalemo, kaj voku al ĝi, ke finiĝis la tempo de ĝia batalado…”* (Jesajo 40,1-2).

## G. Ni trovis nin denove

Kiam mi sur la kajo elpaŝis, mi vidis Elisan, iranta dorse kontraŭ mi preteriri. Mi ekscitita ŝin postkuris sub necerteco, ĉu ŝi povos min denove akcepti. Dumsalute ŝi troviĝis en tia malforto, ke mi ŝin kuraĝis ĉirkaŭpreni nur tre singarde, dum ŝi staris tie tute senemocie. Kiam ni en Mondsee eliris aŭton, iu preterpasanto nin alparolis, ĉu li eventuale helpu, ja li rimarkis la malforton de mia edzino. Mi prizorgis trinkaĵon kaj ni serĉis kvietan ĉambron, por ke ŝi povu iomete ekkuŝi.

Por mi estis malfacile nun ekparoli. Kiu vorto povus esti en tiu situacio kredinda? Tiel ni sen vortoj simple sentis nian proksimon. Mi estis atenta pri ĉiu signalo, kiu de Elisa venis. Ŝi spiris profunde kaj peze. Kaj tamen ankaŭ ĉe ŝi iom post iom revenis vivo. Ni preĝis kune kaj dankis Dion, ke ni denove venis en nian kunecon. Ŝi poste diris al mi, ke ŝi en sia plago ĉion transdonis en la manojn de Dio, ja ŝi sur la tero havis neniun plu, por al ŝi helpi. Ŝi sciis, ke al ŝi okazis maljustaĵo, tial ŝi sin konfidis al Dio, la Patro. Ŝi volas min tamen ne influi, mi devas decidi tiel, kiel mi en mia konscienco trovas en ordo. Nun mi al ŝi malkaŝis, ke mi la volon de Dio ne trovis en la katolika eklezio, kiu por mi pli certe fariĝis baro kontraŭ la volo de Dio. Ni devas iri nian vojon sen la subteno de la katolika eklezio, kiel ĝin montras al ni la Sinjoro. Abrahamo ne povis plu progresi en la protekto de la religio de sia patro, kiam Dio lin vokis iri en novan landon sur novaj vojoj. La vorto de Dio fariĝis lia kompaso.

## 1. Ne plu en la manoj de la homoj

La konvinko, kiun ni el la vorto de Dio jam trovis komence de nia rilato, ke Dio la geedzecon benas kaj ne malpermesas, estis konfirmita post ĉiuj ĉi travivaĵoj tiom pli firme. Tiu ĉi vero de la vorto de Dio faris nin liberaj kaj donacis al ni vivon, pacon kaj ĝojon.

Mia unua klarigo al la paroĥa komunumo okaze de la unua dimanĉa diservo post mia reveno estis: „Mi apartenas nek al la paroĥa komunumo nek al la aklezio, mi apartenas al la Sinjoro.” Tiamaniere mi volis klare indiki, kiu aŭtoriato troviĝas super mia vivo. Tro intensive mi haŭttuŝe travivis la detruan aŭtoritaton de la eklezio. La duan fojon mi al tia potenco ne plu malfermos pordon. Tiel mi ankaŭ sciis, ke miaj tagoj kiel paroĥestro en la katolika eklezio proksimiĝas al la fino. Tiel ankaŭ tiu ĉi ĉapitro trovis sian bonŝancan finon en la formo de la suspendo de mia servo ene de la katolika eklezio, per kio la vojo por geedziĝi en la magistrato estis libera.

## 2. Benita en la domo

Kiam Elisa kaj mi post mia suspendo forlasis la paroĥan domon kaj transloĝiĝis en loĝejon, ŝi sentis antaŭ ĉio mankon de ĝardeno, kian ni havis ĉe la paroĥa domo. Ŝi bedaŭris ĉe la Sinjoro ankaŭ tion kaj diris: „Johano pro vi forlasis la paroĥejon. Vi mem diris:

*„Ekzistas neniu, kiu forlasis domon aŭ fratojn aŭ fratinojn aŭ patrinon aŭ patron aŭ infanojn aŭ kampojn pro mi kaj pro la evangelio, kaj kiu ne ricevos centoble en ĉi tiu tempo, domojn kaj fratojn kaj fratinojn kaj patrinojn kaj infanojn kaj*

*kampojn, kun persekutado; kaj en la venonta mondo eternan vivon”* (Marko 10,29-30).

Mi ektrovis min pro tio en embaraso antaŭ la Sinjoro kaj mi volis min ekskuzi pro la altrudemo de mia edzino. Mi ankaŭ sciis, ke tiu ĉi citaĵo el la Skribo rilatas la apartenon al la komunumo. Sed mia Elisa ne lasis sin devojigi de tio, por uzi la citaĵon en sia preĝo por ĝardeno. Ni preĝis kaj inspektis malgrandajn parcelojn. El tio fariĝis nenio. Kaj finfine ni diris: „Unufoje ni ankoraŭ preĝos por tio, poste ni lasos la aferon tute en la manoj de la Sinjoro, kion li volas fari.” Tiel ni iris en nia fido kaj paco el tiu nia komuna preĝo. Post kelkaj semajnoj iu konata virino diris al ni, ke ŝi scias pri parcelo, kiu eventuale povus esti je dispono por aĉeto. Ni estis kortuŝitaj kaj ĝojaj kaj ni tuj demandis pri la afero. La propriantino unuflanke konsentis por vendi, sed la ĝistiama luinto volis la parcelon daŭre utiligi. Post monatoj Elisa insistis, ke mi denove demandu. Mi faris tion en maniero de fidobeo. Kaj la propriantino fakte diris: „Jes, nun vi povas la parcelon havi.” Ni ĝojis kaj eldiris dankon al la Sinjoro. Tio estis rapide cirkulita kaj venis kandidatoj por aĉeti laŭ pli bona prezo. Niaj konatuloj bedaŭris jam nian situacion, ke ni ne atingos nian celon. Mi kontroldemandis kaj la respondo estis: „Vi estis la unua, kiu la parcelon volis havi, mi diris al vi mian prezon kaj ĉe tio restas.” Tiel ĉio estis realigita per notario.

## 2. Propra planko subpiede

La unuan fojon ni surpaŝis la parcelon kun kortuŝo kaj respekto, kiel se ni enpaŝus la promesitan landon. Fakte temis pri nia *„promesita landpeco”*. La parcelo jam estis enbariligi-

ta, la akvokondukto estis instalita, tie staris ĉarma ĝardena laŭbo kaj apude grandaj fruktarboj: du aprikozaj, du nuksaj, pluraj pom- kaj pirarboj. Ni sidiĝis en tiu ĝardeno kaj ni ĝuis la silenton ĉirkaŭ ni, kvankam la parcelo troviĝis tuj apud la setlejo. Inter la loĝejo kaj ĝardeno estis nur ĉirkaŭ 100 metroj. Ni havis plu neniun itereson por migri aliloken aŭ por ekskurzi. Nia ĝardeno estis la vivloko, en kiu ni laboris kaj revis, ripozis kaj preĝis. Ni sentis, kvazaŭ la beno de Dio ĉiun fojon sin kuŝigus super nin.

Prefere ni volis resti en ĝi. Tiel ni revis pri ĝardena dometo. Ĉar la parcelo havis nur dektri metrojn en larĝo, ni ne povis starigi tie domon. La najbara parcelo estis denove disponigita je vendo. Inter la aĉetkandidatoj troviĝis ankaŭ iu benzinstacia posedanto. Se iutage iu tie konstruus domon, ni estus forte fermitaj. Tamen la parcelo ne estis vendita. Tiel mia edzino puŝis la aferon pripensi, ĉu ni tamen alparolu la posedanton. Mi ne vidis financan eblecon. Kaj samtempe ni devus forgesi nian revon pri muntita domo. Ŝi diris al mi: „Preĝu ni por tio; se ni post tio interkonsentos, ke estas en kongruo kun la volo de la Sinjoro, tiam ni faru, cetere ni lasu nefarita.” Je nia surprizo venis la posedanto baldaŭ poste preter ni dirante: „Se vi iam havos la bezonatan sumon, vi povos la parcelon havi.” Tio estis por ni tia surprizo, ja li ĝis tiam malakceptis vendi kaj li certe povus trovi pli pagipovajn aĉetantojn. Estis tiel evidenta konduksignalo de la Sinjoro, ke ni ankoraŭfoje preĝis al Li por akiri la saĝon ĝuste kompreni Lian volon. La ŝparita sumo ĉe la banko, heredita monsumo de mia edzino… kaj aldona kredito povus kovri la prezon. Konsiderinte ĉiujn pripensojn ni akiris certecan trankvilon. Dume mi mem konceptis la aĉetkontrakton por tiel ŝpari al ni la notariajn kostojn kaj lasis ĉion oficialigi ĉe la distrikta tribunalo. La saman tagon, 26-an Februaron 1990 ni per grundborilo boris truojn por la aluminia barilo. La preterirantoj

miris pri la novaj posedantoj, ke tiuj estis tiel rapidaj ĉe la laboroj. Kelkaj el ili nin demandis, kiam do ni komencos per konstruaj laboroj. En miaj oreloj tio sonis pli malpli ironie. En la printempo ni plantis arbedojn el la malnova en la novan eksteran parcellimon.

## 4. La muntita domo

Oni ne povas negi, ke sur tiu ĉi parcelo nova domo farus tre bonan bildon. Estis observite, ke ni nun ne kuraĝis plu peti por tio ĉe la Sinjoro. Sed samtempe estis forta la deziro, ke ni en tia domo povus aranĝi kunvenadon de la disĉiploj de Jesuo. Tiel ni preĝis: „Sinjoro, se vi povas tiun domon utiligi, tiam ni vin petas, por ke tiu sukcese realiĝu.” Ni lasis al iu muntdoma entrepreno prepari por ni planon kaj proksimuman financan antaŭkalkulon. Ni planis kelon sen multaj partoj kaj kun ekstera enirejo, por ke tie povu okazi pli grandaj kunvenoj.

La kredita pomonata sumo por ĉiu el ni du estis iel pagebla, kondiĉe, ke ni vendu la loĝejon kaj lasu antaŭelpagi nian vivasekuraĵon… Per mia fervoro laŭeble efektive laborigi nian monon mi investis la asekuran monon kaj niajn ceterajn ŝparaĵojn en la negoco kun akcioj. Mi baldaŭ estis avertita, kiamaniere Abrahamo volis helpi al la antaŭdiro de Dio ricevi filon, preninte apudedzinon. Sed ĝuste tio ne estis la vojo, antaŭvidita de la Sinjoro. Kvankam mi tion rimarkis kaj mia edzino min nepre avertis, mi tamen investis. Jam post kelkaj monatoj, postsekvaĵo de la milito en la arabia Golfo, miaj akcioj degelis en nenion. Mi volis ilin revendi, sed tio ne estis al mi ebligita.

Mi jam dum kelkaj tagoj konfesis mian falsan agon antaŭ la Sinjoro kaj sentis min kaptito de la afero. Mia edzino mina-

cis: „Se mi ne rehavos la monon denove en miaj manoj, la domkonstruo ne okazos.” Sed dum la lasta minuto mi tamen rericevis mian investan kapitalon. Jam kelkajn semajnojn poste tio ne plu povus esti ebla.

La semajnoj, en kiuj la likvido de la propra kontribuo devus esti por la konstruŝpara kontrakto atingita. Mi transdonis ali iu makleristo la taskon vendi nian loĝejon. Venis du interesitoj, sed kiam ili eksciis pri la kreditpartopaga sumo, ili retiriĝis. Ankaŭ tio ĉi estis por mi kvazaŭ damokla glavo super mia kapo. Surprize estis mia edzino en tiu ĉi afero tute kvieta kaj ŝi havis fidan certecon je la Sinjoro. Ŝi diris: „Ni preĝis kaj ni demandis la Sinjoron, ĉu ni rajtas masoni. Ni ja ne masonas ĝin por ni sole, sed por uzi ĝin en la afero de la Sinjoro. Mi havas certecon, ni vendos la loĝejon ĝustatempe, sed ankaŭ ne eĉ unu tagon antaŭ tio.” Tian parolmanieron mi ĉe mia edzino ne konis. Ŝi estis, kiu ĉe la unuaj malhelaj nuboj en ĉio komencis dubi. Por mi persone tio estis la plej forta konfirmo fare de la Sinjoro.

En la lasta vendredo en la semajno tuj antaŭ la limdato vokis nin denove iu familio, ke ili volas aĉeti la loĝejon. Ili estis pri la aĉetprezo kontentaj kaj ni rezervis renkontiĝon ĉe la notario por la sekva mardo. Ĉio funkciis tiel nekredeble, ja ili devis unue frekventi kaj inspekti la loĝejon. En la atendejo ĉe la notario ni ricevis por legi la tekston de la aĉetkontrakto. Tie estis menciita ĝuste la sumo, kiun oni devis tuj pagi kaj kiun ni bezonis por la aprobo de la konstruŝpara kontrakto. La aĉetantoj ricevis la monon de la ŝtata fervoja kompanio kiel la dungadiaŭan sumon.

Kvankam ni jam en Februaro 1991 betonmasonis la kelkadron kaj ni samtempe helpe de iu konstrutraba firmao lasis fari ankaŭ la kelon mem, la vetero ĉiam estis favora por niaj laboroj. Ĉiun tagon mi ĉeestis kun plena koro da laŭdo kaj

danko al la Sinjoro. Dum unu nura semajno la muntita domo jam staris inkluzive kun plankoj kaj kelkonektoj kaj instalaĵoj.

Grupo da fratoj en kredo el domkomunumoj, ĉe kiuj mi okaze servis, helpis nin ĉe translokiĝo kaj ĉe la surmeto de la herbtapiŝo. La najbaroj miris pri la helppreteco de tiuj homoj. De momento al momento mi laboris ankaŭ ĉe pavimigo de la vojetoj kaj ĉe la spalta glatigo de la kelmuroj.

Intertempe la domo staras ene de abunde surkreskita ĝardeno. La gastoj emfazas, ke ili ĉi tie ĉiam fartas bone. Pliparte temas pri gastoj, kun kiuj ni en la ĝardeno parolas pri nia komuna espero en la Sinjoro kaj ili tiel ĝojas kun ni. Dumtempe multaj aldone venis el nia domkomunuma rondo.

## 9. Benita per la faro de la Sinjoro

Post mia suspendigo surbaze de mia kreddecido okazis multaj kontaktoj, kiun mi ankoraŭ devis superrigardi. La plureco de la kredorientiĝoj, kvankam ili ĉiuj anoncis la evangelion pri nia savo per la graco de Jesuo Kristo en la fido, faris min nesekura, al kiu el tiuj orientiĝoj mi min ligu. Kiudirekten iras mia persona vokiteco? Mi decidis veke aŭskulti la volon de la Sinjoro kaj tiel ligi min al neniu el tiuj orientiĝoj. En la Skribo ja ne troviĝas parolo pri tiaj orientiĝoj kiel modeloj, kontraŭe, estas prefere avertita kontraŭ ili. Ankaŭ nuntempe multaj fadenoj kondukas en la falsifon en la spirito de la ekumenismo.

Ni estas vokitaj lukti la batalon de la kredo, meze de la danĝeroj esti devojigitaj en nia tempo. Tiel ni devas ĉiam resti vekaj en la vorto de Dio, por ke la fremda spirito, iu alia

„kristo”, iu alia „evangelio” ne misgvidu nin (*komp.: 2 Korintanoj 11,4*).

## A. De kiu mi estas varbata?

Kelkaj gefratoj en kredo, kiuj el la gazetoj informiĝis pri mi, kunvenis foje ĉe mi por preĝi aŭ por neformale interŝanĝi opiniojn. Tio okaze estis ankaŭ nerekta varbado por tiu aŭ alia direkto inter la ekleziaj grupoj. Mi tamen ne venis pro certa kristana grupiĝo al mia kreddecido. Decida estis ekskluzive la vero kaj realo de la Sankta Skribo kaj la el tio venanta kredo. Temis pri mia disponiĝo por la evangelio en sia plena dimensio.

Diversaj nomoj de diversaj grupiĝoj faris min iomete timema, ĉar ili estis por mi io tiel fremda, kaj mi ne povis jam prijuĝi, en kiun direkton ili verdire kondukas. Mi volis min neniukaze iel ajn disponigi. La admono de la apostolo Paŭlo en la epistolo al Galatoj sonis en mia orelo:

*„Mi miras, ke tiel rapide vi foriĝas for de Tiu, kiu vokis vin en la gracon de Kristo, al malsama evangelio” (Galatoj 1,6).*

Tiu situacio kondukis al certa embaraso. Unuflanke troviĝis la ĝojo, ke tamen troviĝas tiomaj decidiĝintaj kredantoj, tamen aliflanke mi pri kelkaj sentis certan fremdecon, ĉar ili tiom varbis pri ilia aparta movado. Mi demandis min: „Ĉu ĉe tiuj ĉiam unue estas la evangelio kaj poste la movado, aŭ ili la aferon iomete renversis, kiel mi tion trovis en la katolika eklezio: unue katoliko, poste kristano?” La senperecon de la evangelio, kiel tion alparolas Paŭlo en la epistolo al Galatoj, mi ne volis permesi kovri per nova konfesia direktiĝo.

## 1. Kien mi apartenas?

Mi vivas en la *„komuneco de Lia Filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro"* (1 Korintanoj 1,9), en unu korpo de Kristo, en la de Kristo fondita komunumo, kiu ne estas dividebla. Ĝia origina nomo estas „ekklesia", la de Jesuo *elvokita* kaj tiel de Jesuo formita *kunveno,* kiu heredos la benojn de la Sinjoro.

Tiel la komunumo, la kunveno, restas ankaŭ inter la unuopaj semajnaj kunvenoj. Kiam la disĉiploj de Jesuo el multaj lokoj kunvenas, ili tamen estas ĉiam unu kunveno, unu komunumo. En diversaj lokoj estas ĉiam nur unu kaj la sama kunveno (komunumo) de Jesuo videbla. La diversaj kunvenoj ĉe diversaj lokoj tiel ne povas unu la alian ekskludi, se ili fundamentas sur la alvoko per Jesuo kaj en lia spirito kunvenas.

Tiu unueco venas el la unueco de Dio mem. En la korpo de Kristo ni estas alprenitaj en la unuecon de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito … *„por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi kaj mi en Vi"* (Johano 17,21). Mi povas bone kompreni, ke disĉiplo de Jesuo sen la komuneco kun komunumo en sia loko ne povas esti regula ekzemplo. Nia kristana ekzisto ne estas forigebla disde la altira forto de la komunumo kaj tiel en la kunveno de la disĉiploj de Jesuo kaj en la insisto de la komunumo, en kiun la Sinjoro disponigis siajn servajn talentojn kaj ankoraŭ disponigos (*Efesanoj* 4,1-16).

Tiu ĉi vivovojo de la komunumo okazas ne malofte en ies domo kaj en ies loĝejo. Tie mia edzino decidis lasi sin bapti kaj eksiĝi el la konfesio, kiu la kredobeon rilate la vorton de Dio ne prenas serioze.

La instruo de la katolika eklezio, ke la nova naskiĝo por tiel fariĝi la infano de Dio, okazas per la bapto de bebo, malebligas la veran novnaskiĝon el la kreda alpreno de Jesuo en sian vivon. Tiel la ŝlosilo de la regno de Dio estis forĵetita, kaj tiuj, kiuj volas eniri, estas per falsa sakramenta doktrino malhelpataj eniri. Pro la senco de tiu ĉi respondeco ni devis fari distancon al la katolika eklezio. Tion oni ĝenerale priskribas kiel elpaŝon el la eklezio, kio fakte ne korespondas kun la faktoj. Ni ne elpaŝis el la komunumo de Jesuo, sed el la konfesio kun devojiĝinta kredinstruo.

Al tiaj gefratoj kiel al la komunumo en ilia domo Paŭlo skribis siajn epistolojn, foje li nomis ilin per iliaj nomoj, kiel oni povas legi fine de la epistolo al Romanoj. Ankaŭ niatempe la gardantoj de la kredo devus sin senti alparolitaj helpi en tiaj krizoj, al ili skribi, ilin viziti kaj kuraĝigi. Tiuj homoj devus esti konfirmitaj, ke ili estas la komunumo de Jesuo. Se tiel, ni spertos interligitecon, kiu povas konvinki. La unueco venas el la reciproka servo en la kredo (*Romanoj* 12).

## 2. Tentoprovo por iu dependaparteno

Unu el la tentoj ene de nia disĉiplaro estas, se ni estas invitataj al aparteno – tiel fare de diversaj sektoj, kiel eĉ de misvojiĝintaj kredgefratoj, kiuj mem estis kontaminitaj per forta aparteneco. La vorto *„sekto”* venas el la latina vorto *„sequere”*, signifante *postsekvi* la unuopan majstron kiel ties adepto. Tio ne devas nepre esti falsa. Grave estas, ĉu tia majstro konstruas propran instruon per intenco ricevi adeptojn, aŭ ĉu li volas servi al la tuta vorto de Dio kaj invitas aliajn tion postsekvi.

Ankaŭ la fariseoj uzis fortan fervoron por fari el homoj siajn adeptojn. Ili aranĝis proprajn bibliajn lernejojn, lernejojn por disĉiploj, kaj ili evoluigis grandskalan doktrinon por siaj adeptoj. Farante tion ili opiniis, ke ili tiel plej bone obeas la Sanktan Skribon, diference de la cetera popolo Izraelo. Tamen kelkaj aferoj estis karakterizaj:

1. Ili ligis la homojn al si, al sia agado, sed ne al la Sankta Skribo mem.
2. Ili evoluigis doktrinojn pri la Skribo, tamen pli ol ĝi mem diras, por supoze certigi la validon de la Skribo.
3. Ili sin prenis por la pli bonaj kaj malrespektis la aliajn.
4. Ili subjugis la aliajn – ankaŭ la senditojn de Dio kiel Johanon, eĉ Jesuon – sub sian instrumodelon kaj sub sian pretendon je aŭtoritato, sub kiu ili lin kondamnis al la morto. Ili ne estis kapablaj lerni, same ne kapablaj fari komunecon.

> „*Ve al vi, skribistoj kaj Fariseoj, hipokrituloj, ĉar vi ĉirkaŭiras maron kaj teron, por varbi unu prozeliton* [vi-an disĉiplon]; *kaj kiam li tia fariĝis, vi lin faras filo de Gehena, duoble kiom vi mem*” (Mateo 23,15).

## B. Mia servo por la fratoj

Mia amo por la kredgefratoj tiris min en ĉiam pli larĝajn cirklojn por tie servi, kuraĝigi kaj firmigi. Mia agadradiuso etendiĝis en ĉiujn provincojn de Aŭstrio, en Svislandon kaj Germanion. Pretere mi vizitis Bratislavon kaj Hämeenlinna en

Finlando, kie mi referis pri la katolikismo sub la lumo de la Sankta Skribo kaj mi servis per atestado.

Unu kristanan komunumon mi ekkonis ankoraŭ kiel katolika paroĥestro. Per Albert Betschek, la pastoro en Salburgo (Salzburg) kaj fine en Vieno, mi trovis dum jaroj proksiman kaj konfidindan partneron por interŝanĝi spertojn. Li ĉiam pensis pri la sana instruo. Pere de lia rekomendo mi helpis ankaŭ en St. Pölten dum kelkaj jaroj ĉe la tiea konstruo de la komunumo kiel predikanto kaj presbitero.

Sed plej forte min kortuŝis, kiam iu domeklezia rondo estis tiel solida kaj fidela, ke ĝi alprenis la trajtojn de la biblie orientita komunumo; kiam viviĝis junaj komunumoj en ĝojo je la mesaĝo, ĉar ili ricevis konfirmon, ke la Sinjoro per sia Spirito al ĉiu inter ni donas la saman mesaĝon kaj donacas la samajn spertojn. Surprize por mi estas ankaŭ, ke oni povis tuj dekomence trovi tioman konkordon, kvankam la invititaj el diversaj konfesiaj direktoj alvenis. Tiom longe la rigardo estis direktita sur la kapon de la korpo, Jesuo, kaj la kunagado de la Sankta Spirito estis libera kaj de li estis atendita la tuta kondukado, tiom longe troviĝis neniu splitiĝo, la unu nura korpo de Kristo estis spertita

## 1. Zorgiĝo super la komunumoj
## *(2 Korintanoj 11,28)*

Per tuta malfermiteco ĉiam denove en la Nova Testamento estas la parolo pri falsaj profetoj, pri falsaj fratoj, kiuj cetere povas veni el la mezo de la komunumo; ili neniam vere estis konvertitaj, sed ili estas falsaj fratoj, kiuj envenigas la dissplitiĝon. Estas respondecpostula tasko, averti pri tio ĉi. Ĉar ĉiam denove kuras la kredgefratoj sen konscio en la brakojn de la

falsaj fratoj. Paŭlo admonas kaj postulas, ke ni distanciĝu de tiaj:

*„Nun mi vin petas, fratoj, observi tiujn, kiuj kaŭzas la malkonsentojn kaj ofendojn kontraŭ la instruado, kiun vi lernis; kaj forturni vin de ili. Ĉar tiaj homoj servas ne al nia Sinjoro Kristo, sed al sia ventro; kaj per siaj belaj kaj flataj vortoj ili trompas la korojn de la naivuloj"* (Romanoj 16,17-18).

Markite estas, ke tiaj ne servas al Kristo, sed al sia ventro. La ventro ĉi tie troviĝas kiel la sidejo de la sentoj kaj emocioj. Ili ne alparolas la spiriton, la kapablon prijuĝi, la konsciencon. Ilia agado venas el la ventro, la sugestipova homa nivelo.

La falsaj fratoj tamen ne estis vere la nura danĝero. Niaj propraj eraroj kaj nia propra malmatureco kondukas nin al ne malgravaj problemoj. La ĝojo super la gefrateco en la kredo de neniu estu de ni prenita, sed same ne tro alte taksita. Tamen mi volis veki ankaŭ mian sublimon por la aŭtenta kaj por la malaŭtenta kaj ilia diferenco.

Kiam inter la apostazita Sinjoro kaj la ago de la potenco de la Sankta Spirito ĉe iu peranta personeco aperis, la rigardo de la komunumo baldaŭ sin turnis for de la kapo kaj tien al la peranto. Tiaj dominecaj estraj naturoj kiel movigantoj de certa movado ofte montris multan entuziasmon, sed ili ankaŭ *„konsumis"* kelkajn el siaj adeptoj. Kvankam nur unu sola povas esti nia peranto, Jesuo, kelkaj perantoj denove troviĝis en la antaŭaj lokoj, kiel mi estis alkutimiĝinta ene de la katolika eklezio. La kredo kaj la fidelo tiam estis mezuritaj laŭ la mezuro de la fidelo kaj lojaleco al tiaj homaj perantoj.

La tiel manipulitaj kaj influitaj frekvetantoj troviĝis en forta konvinkiĝo, ke la Sankta Spirito en certa momento efektivigis ion certan. Pere de similaj okazintaĵoj baldaŭ aperis sugesta nivelo. Sed la Spirito efikas kaj mesaĝas al ni, kiel li

volas, ne kiel ofte estas anoncite. La anoncoj de tia speco estis pro tia fono por ni la unua alarmsignalo de falsifo.

La vizitantoj ofte glitis per forta preteco sin oferi en religian eŭforion – tamen sen la viva Dio. Kaj tiu, kiu en tiu entuziasmo ne pretas kuniri, subite ne estis plu prenita por sufiĉe „vive-kredanta”. Sed tiu ĉi stato alprenis nenian sperton pri Dio, neniun pacon, neniun finan hejmon, nenian amon. Li alportis pekon, ekposedon, blindigon, materian ekspluaton, laŭtan amuziĝon, vivon sen Dio, ies idoladoradon.

## 2. Danĝeroj ĉe la falsaj fratoj *( 2 Korintanoj 11, 26)*

Ne malmultaj homoj venis pere de tia evoluo en spiritan plagon. Ili spertis la vivan Dion, la pardonon de la pekoj, la infanecon en la Sankta Spirito kaj ankaŭ komencan personan gvidadon per la Sankta Spirito. Ili ne antaŭsentis danĝerojn. Ili prenis ĉion dankeme, ili vidis nenian falilon kaj neniujn malamikojn. Ili ĉiuj estis inter si fratoj kaj fratinoj, ĉio estis amo kaj simple bonsento.

En tiaj rondoj fakte ne estis permesite pri tio paroli, ke ni devus esti singardaj kontraŭ la falsaj profetoj kaj pastoroj, kiuj en la ŝafpeltoj per sia ekstera bildo aperas, sed en vero ili estas por la gefratoj la disŝirantaj lupoj. Tia parolado estus prenita por ribelado, ĉar komprenita kiel demaskigo. Paŭlo tiel serioze admonas la komunumon:

*„Ĉar vi toleras homon, se li vin sklavigas, se li vin formanĝas, se li vin kaptas, se li sin altigas, se li batas al vi la vizaĝon”* (2 Korintanoj 11,20).

Danĝere, blasfeme estus tiam, se en la kunvenoj tiaj sugestopovaj procedoj de ĉiuj estus rigardataj kiel la efikoj de Dio. Tio estus  en vero sindisponiĝo al la mesaĝo de certa agitatoro kaj ties agoj kaj ne al Jesuo mem.

## 3. Renversiĝo de la rilatoj

Se la falsaj fratoj alproprigis la gvidadon al si, ili per sia estreca stilo ne permesis sin travidi. Ili eme pentris ravbildon pri la komunumo, ili malantaŭ la kurteno faris siajn decidojn, kolektis proksime ĉirkaŭ si nur tiajn, kiuj ne havis tian travidkapablon aŭ eĉ eme faris kunajn aferojn, tiam kiel la unuaj eliris tiuj, kiuj daŭre aŭskultis la voĉon de la bona paŝtisto kaj serĉis la gvidadon ĉe la Sankta Spirito. Tiel povas okazi okazi renversiĝo en la komunuma estraro. Tion faris la grandaj eklezioj jam rilate niajn kredfratojn el la movado de baptistoj kaj ankaŭ koncerne multajn aliajn disĉiplojn de Jesuo. Tio estis provita de la komenco ĝis en nia tempo. Konsideru 2 Korintanoj, 3 Epistolo de Johano … en tia plaga situacio ni ne povas nin apogi je homoj, same ne je iu ajn konzilio kaj kunveno de la komunumo. Tiom pli ofte tiaj homoj okaze de tiaj demandoj alprenis falsajn decidojn, se ili ne permesis sin konduki de la Sankta Spirito.

## 4. Koni Lian voĉon
*(Johano 10, 5)*

Pro tio estas tiel grave, ke ni rilate tiajn danĝerojn aŭskultas la voĉon de Jesuo kaj la parolon de la Sankta Spirito.

*„Pri vi, la sanktoleado, kiun vi ricevis de li, restas en vi, kaj vi ne havas bezonon, ke iu vin instruu; sed kiel lia sanktoleado vin instruas pri ĉio kaj estas vera kaj ne estas mensogo, kaj kiel ĝi vin instruis, vi restas en li"* (1 Johano 2,27).

Misvojiĝe ili ofte ne venas erst en la komunumon, ili venas el la komunumo, diras la apostolo Johano: *„De ni ili eliris, sed ili ne estis el ni…"* (1 Johano 2,19). En la epistoloj de la apostoloj troviĝas aperta kaj abunda parolo pri tio ĉi. En tia situacio ni ne rajtas permesi, esti kondukataj fare de homaj pensmanieroj, ja cetere estiĝas malkonstruema povobatalo en la komunumoj, kiu deruas ankoraŭ pli. Tio ĉi povas esti prijuĝita nur spirite. En tiu ĉi demando la apostolo Paŭlo ne cedis eĉ unu paŝon, sed li postulis de la kredantoj fari decidon. Li menciis multajn markojn de la aŭtenta kaj de la malaŭtenta apostolo (2 Korintanoj 2,14 – 7,16 kaj 11,3 – 33). Same Petro (2 Petro 2,1-22) kaj Johano (1 Johano 4,1-4; 2 Johano 7-11) kaj Judaso (Judaso 8-19) tion faris. Ano de la komunumo devus ekkoni, kiu antaŭ li staras.

## 5. Ne plu malplenaĝaj

La celo ne estas la malplenaĝo de la disĉiploj, sed la plenaĝo. La sanktaj devus esti por la laboro de la servo armitaj por la konstruo de la korpo de Kristo (*Efesanoj* 4,12).

*„Por ke ni jam ne estu infanoj, onde ĵetataj kaj ĉirkaŭpelataj de ĉiu vento de doktrino, per ĵonglado de homoj, per ruzo laŭ artifiko de trompo; se parolante la veron en amo, ni ĉiel kreskadu en tiun, kiu estas la kapo, Kristo, el kiu la tuta korpo, kunigita kaj kunfortikigita tra ĉiu artiko de la livera sistemo, per energio, laŭ la mezuro de ĉiu parto, faras kreskadon de la korpo, por la sinedifado en amo"* (Efesanoj 4,14-16).

Pri kio do finfine temas:

- En komunumon povas enveni ankaŭ trompa doktrino.
- La vento de la trompa doktrino devu neniun plu faligi, ja li povas elprovi kaj li devas elprovi.
- La unuopulo devus esti kuraĝigita por rifuzi la falsan doktrinon.
- Ĉiuj devus kreski ĝis la kapo, Jesuo. Li restas por ĉiam la kapo de la komunumo.
- De la kapo kaj de la gvidado fare de la Spirito venas la unueco de la komunumo.
- Ĉiu estas efika laŭ la mezuro de unuopa parto, tial bezonanta kompletigon.
- Kun ĉiuj kune realigas la Sinjoro la memkonstruadon en la amo, la kreskon de la korpo. Tiu ĉi kresko venas eksteren el la interno kaj ne inverse, el la ekstero en la internon.

## C. Ili kunvenadis en domoj (Romanoj 16, 5)

Dum longa tempo mi estis allogita en aliajn lokojn kun pli grandaj kunvenoj. Se iu estis alparolebla pri la temo kredo, mi tiujn stimulis simple kunveni. Samtempe mi estis klopodanta tiujn, kiuj komencis kredi, kunvoki en niaj domoj surloke. Tamen tro rapide tiuj kristanoj estis engaĝitaj en aliaj lokoj rilate kredon. La densa programo engaĝis ilin tiom, ke ili por sia hejma loko ne plu estis malfermitaj.

### 1. Enhejmiĝo en la fido

Mia edzino tamen tuttempe en niaj domkunvenoj vidis sian hejmiĝon, kiu sin montris en ordo. Ni rimarkis la benon en nia rilato ĝuste pere de tiu esti-unu en la kredo. Ĉio devus esti el la komunaj trovoj en la vorto de Dio prenita kaj vivata. Ŝi havis embarason antaŭ alpreno kaj manipula direktado fare de aliaj; garantii por la finance troigitaj projektoj, kiujn la homoj por siaj gvidaj pozicioj elravis. Ĉio, kio misevoluis al certa teatraĵo kaj kio ĝenis nian pozicion antaŭ la Sinjoro, fariĝis misa afero kaj por ŝi skandalo.

### 2. La misio venas el Jesuo

El tiu spertofono mi rimarkis, ke mi dum jaroj permesis al mi forŝteli la alvokitecon por mia kredserva agado en la propra vivloko. Multaj volis en mi vidi adepton, kiu luktos por ilia

afero kaj mi mispaŝis en la falilon. La voko de la Sinjoro estis supervoĉigita per la homa varbado. Kiel Jesuo ĉiam venis al la homoj de sia Patro kaj li ne permesis sin devigi fare de la homoj, tiel ankaŭ ni devus atenti, ke nia eliro ĉiam okazu el nia ligo kun la Sinjoro en preĝo kaj konforme al liaj instrukcioj. Tiel ni invitis la gefratojn en nian domon por atingi viglan interŝanĝon de la kredspertoj, travivon de la aminda komuneco kaj por havi reciprokan subtenon en la kredo kaj en la preĝo. Ĉiu partoprenanto devus kunpreni sian Biblion kaj sin kompreni kiel la kunportantan helpe de la donaco de la graco, kia al tiu estis donita. Ni interŝanĝe servis unu la alian ĉe la vorto, kio aldone ankaŭ estis interkonsentita.

## 3. Eta grego

Tiaj domkomunumoj devus ankaŭ ĉiam pli ricevi helpon, por ke ili estu akompanataj sur la vojo de la biblie akordigita komunumo, en kiu la ĉiamaj servkontribuoj de la unuopuloj estu alprenataj. La nove konvertiĝintaj estas ankoraŭ profunde kundeterminitaj de la antaŭmetitaj strukturoj de la ĝistiamaj grandaj eklezioj, kaj tiu ĉi pensmaniero  rapide kaŝrevenas. Temas pri buroeska pensmaniero, laŭ kiu ĉio estas pripensita kaj decidita fare de certa organizaĵo. Temas pri transiro de la kunvenada stilo el la dom-kunveno en la bazilikan kunvenon. *Baziliko* estis publika konstruaĵo, en kiu la pagana reganto rezidis kun sia povo. Tio fariĝis la modelo por la kristanoj, kiuj jam troviĝis sur la misa vojo al la katolika eklezio. Oni simple anstataŭis la bildon de la cezaro per la bildo de Kristo-Pantokrato (Kristo kiel la mondreganto, sidanta sur la ĉielarko). Sed trono estis starigita ankaŭ por la episkopo, kiu, koncipita la reprezentanto de Kristo an la reganta senco, aldone

kun la paganaj signaĵoj de mitro (la episkopa ĉapo en la formo de la fiŝkapo), kian antaŭe portis la sacerdotoj de la kulto de la fiŝdiaĵo Dagono.

Tiel la gefrata kunveno transformiĝis al kunveno, strukturita laŭ la regpovo. Ju pli granda tia kunveno estis, des pli da intereso, fascino kaj povo ĝi akiris. La tento de la povo estis la baza tento de Satano, adresita al Kristo. Kaj tio restos ankaŭ la plej granda tento por la komunumoj. Ĉiam temas pri tio, pretendi la venkon kun la perfektiĝo helpe de propra povo. Ĉe tio estas serĉata ankaŭ la propra konfirmiteco. Oni volas ŝpari al si la vojon de la insisto kaj elprovo.

## 4. Kreski en grundfesteco

El tiu ĉi fono la *komunumo en la domo* estas la sana formo de la vojo maturiĝi. Tie, kie la Sinjoro troviĝas en la mezo, ĉar neniu alia staras bare survoje; kie la gvidado fare de la Sankta Spirito estas serĉata, ĉar ne troviĝas ankoraŭ iu, kiu estus ĉion antaŭpreparinta, antaŭdecidinta kaj stirinta; kie oni praktikas la reciprokan servon, ĉar ankoraŭ neniu unudirekta trako de la servado inter la prizorganto al la prizorgato troviĝas; kie okazas interŝanĝo, ĉar ĉiu rajtas ion kontribui kaj tion ankaŭ laŭeble faru. Tiel ne estu konflikta temo, ke ankaŭ en pli grandaj komunumoj la samo povas okazi kaj ankaŭ fakte okazas.

## 5. La rilatoj de la korpaj membroj

La ligiteco de la komunumo en diversaj lokoj estas certigita per la kapo kaj la subtenantaj artikoj (la reciproke sin subtenantaj servantoj kun la servotalentoj) en la korpo:

*„El kiu la tuta korpo, kunigita kaj kunfortikigita tra ĉiu artiko de la livera sistemo, per la energio, laŭ la mezuro de ĉiu parto, faras kreskadon de la korpo, por la sinedifado en amo”* (Efesanoj 4,16).

Tiuj artikoj ne estu forpuŝitaj, sed ili estu akceptitaj sur siaj lokoj. Ĉe tiuj komunikaj punktoj la tuta korpo estas kunligita. Tiel simile okazas ankaŭ en la tutmonde troviĝanta rilato inter la disĉiploj de Jesuo. Estas bone, se la mano estu elstreĉita tutglobe, sen aspiri la regadpovon.

*„Tiam, post intertempo de dek kvar jaroj, mi denove supreniris al Jerusalem kun Barnabas, kunkondukante ankaŭ Titon. Kaj mi supreniris laŭ Dia malkaŝo; kaj mi prezentis al ili la evangelion, kiun mi predikis inter la nacianoj, sed aparte al la eminentuloj, por ke mi ne estu vane kuranta aŭ kurinta”* (Galatoj 2,1-2).

La falsaj fratoj foje volas ion eldevigi de la aliaj (*Agoj* 15,1-2). Tiel ili povas praktiki super la komunumoj sian povon, sufokanta la spiriton. Ili volas bari la alirvojon al la veraj kolonoj. Ili ne konsideras ĉiam tion, kion efektivigas la Spirigo de la Sinjoro, sed ankaŭ la intereson de sia influo. Al tiaj falsaj fratoj estis disponigita ankaŭ la apostolo Paŭlo:

*„… sed tio estis pro la kaŝe enportitaj fratoj, kiuj ruze envenis, por spioni nian liberecon en Kristo Jesuo, por ke ili nin sklavigu”* (Galatoj 2,4). Sub tiujn, kiuj do nian liberecon en Kristo spionas, nin sklavigas, ni ne rajtas nin tro rapide disponigi:

*„Al kiuj ni ne submetiĝis cedeme, eĉ por unu horo; por ke la vero de la evangelio restadu kun vi”* (Galatoj 2,5).

## 5. La kolonoj, kiuj rekonas la gracon

*„Sed el tiuj, kiuj ŝajne iom valoris (kiaj ajn ili estis, tio por mi ne estas grava: ĉe Dio ne estas personfavorado) – tiuj valoruloj nenion aldonis al mi; sed kontraŭe, kiam ili vidis, ke je la evangelio de la necirkumcido mi estas komisiita tiel same, kiel Petro je la evangelio de la cirkumcido (ĉar Tiu, kiu forte energiis en Petro por la apostoleco de la cirkumcido, ankaŭ energiis en mi por la nacianoj), Jakobo kaj Kefas kaj Johano, kiuj ŝajne estis kolonoj, rimarkinte la gracon donitan al mi, donis al mi kaj al Barnabas la dekstrajn manojn de kunuleco, por ke ni iru al la nacianoj, kaj ili al la cirkumcidularo”* (Galatoj 2,6-9).

En tiuj sanaj rilatoj la unua rigardo serĉas, kiamaniere la Sankta Spirito agas en la unuopuloj. El tiuj efikoj venas la aŭtoritato, kiun donas la Sinjoro, estante registrita kaj en la komunumo agnoskita.

En Jerusalemo troviĝis rondo da valoraj, da kolonoj, kiuj ne estis disigeblaj. Sed ili ankaŭ konstante estis ligitaj kun la kompleta komunumo. Tie estis trovita mondlarĝa konkordo per la disvastigo de malfermaj demandoj ankaŭ antaŭ la presbiteroj kaj la tuta komunumo, rigardĵete al la efikado de la Sinjoro kaj per la atestado de la Sankta Skribo (*La agoj* 15).

## 6. Tamen nenia blanka ĉeko en la aferoj de la fido

Tamen eĉ tiaj kolonoj kiel Petro, Jakobo kaj aliaj povis misiri (*Galatoj* 2,12-13). En tiu interligo diras Paŭlo:

*„Kaj kiam mi vidis, ke ili ne prave kondutas laŭ la vero el la evangelio, mi diris al Kefas antaŭ ĉiuj”* (Galatoj 2,14).

En tia tikla situacio bezoniĝis lukto por la konsekvenca vekiĝo super la fido. Nia tempo troviĝas en danĝero, ĉion lasi al organizaĵoj. La organizaĵoj estas bona helpilo por atingi celojn. Tamen ili devus servi nur kiel bona helpilo por la estraro, kiu kiel fidindaj elpruvitaj gvidpersonoj kaj gardantoj tenas siajn okulojn malfermitaj por la efikoj de la Sankta Spirito, fortigante tiel la komunumon laŭmezure de sia servtalento.

## 8. Postenigita fare de la Sinjoro

La gvidado fare de la Sinjoro do restis konstante en la antaŭa loko. Se oni ĉesas koncerne la demandojn pri gvidi konsulti unue la Sinjoron, tiam restas nur plu la homa gvidkapablo. Pro tio super neniu estu tro rapide metitaj la manoj, se la Sinjoro sian konfirmon ne jam donis.

*„Sur neniun surmetu la manojn tro rapidece kaj ne estu partoprenanto en la pekoj de aliaj”* (1 Timoteo 5,22). La antaŭregado de la Sinjoro estu atestita per lia konfirmo.

*„Ne malŝatu la donacon, kiu estas en vi, donita al vi por profetado, kun la surmetado de la manoj de la presbiteraro. Estu diligenta pri tiuj aferoj; dediĉu vin al ili, por ke via progreso evidentiĝu al ĉiuj. Zorgu pri vi mem kaj pri via instruo.*

*Persistu en tio; ĉar, tion farante, vi savos vin mem, kaj tiujn, kiuj vin aŭskultas"* (1 Timoteo 4,14-16).

Tia aŭtoritato maturiĝas laŭ la atesto de la Sankta Skribo subgvide de la Sankta Spirito prefere en la cirkonstancoj de la preĝanta komunumo. Tiu aŭtoritato povas nerimarkite memstariĝi en certa organizaĵo kaj tiel ĝi venas en danĝeron, sin mem disigi for de la komunumo. Tiel estiĝus denove hierarkio, kia sin komprenas en la grandaj eklezioj en la senco mem esti *la* eklezio, pretendante la arbitran plenpovon super la komunumo. Per tio denove estiĝus disdivido inter la komunumo je la estraro kaj la popolo de Dio, kiel en la katolika eklezio. Per tio la organizaĵo fariĝus anstataŭante per si mem levita al la komunumo kaj tiel ĝi pretervidus la ekziston el la korpo de Kristo, karakteriza por la komunumo.

La de Dio donita aŭtoritato fariĝas rimarkebla por la komunumo kaj samtempe dankeme agnoskita. Tie la voĉo de la unuela paŝtisto Jesuo denove estas ekkonita. Tio kreas la fekundan grundon, sur kiu la paco kaj la kresko kaj la maturiĝo prosperas.

## D. Alpaŝi la homojn

La lasta kaj certe la plej grava tasko, kiun la Sinjoro donis al siaj disĉiploj, diris: *„Iru en la tutan mondon, kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo. Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita"* (Marko 16,15-16). – *„Tiam la Sinjoro Jesuo, post kiam li parolis al ili, estis ricevita supren en la ĉielon, kaj sidiĝis dekstre de Dio. Kaj elirinte, ili predikis ĉie, kaj la Sinjoro laboris kun ili kaj fortikigis la vorton per la signoj, kiuj sekvis"* (Marko 16,19-20).

Tiu ĉi taskigo ne povas esti efektivigita sen la senditeco kaj sen la povo de Dio. Pro tio estas skribite:

*„Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalem kaj en la tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la malproksima parto de la tero”* (Agoj 1,8).

Ne estis nur la apostoloj, kiuj tiun ĉi taskigon postsekvis, sed ankaŭ la disĉiploj, kiuj eĉ estis forpelitaj en aliajn regionojn:

*„Sed la dispelitoj trairis, predikante la vorton. Kaj Filipo, malsuprenirinte en la urbon Samario, proklamis al ili la Kriston. Kaj la homamaso unuanime atendis la parolojn de Filipo, kiam ili lin aŭdis kaj vidis la signojn, kiujn li faris”* (Agoj 8,4-6).

## 1. Eliru!

Sub la preparita preĝo kaj aŭskultado al la Sinjoro mi ankaŭ eliras por trovi malfermitan pordon por la bona mesaĝo de la savo, fare de Jesuo. Je mia miriĝo kelkaj vere estis malfermitaj. Unue mi devis  instali verecan rilaton kaj komunecon, poste ni ankaŭ povis enpaŝi la vorton de Dio. Dum la interparolo ĉiam la enpaŝo en la vivon kaj same la konkreta praktiko de la kredo estas observataj. Tio samtempe kaŭzas la komencan kredsperton, el kiu sin nutras la intereso por la sekva vojparto. Mi ĉiam denove demandas, ĉu mi rajtas veni denove. Kaj ĉiam estis respondite jese.

Regule vizitas min juna viro. Pliparte li ricevas energion, se ni post elĉerpa interparolo pri kiel formi sian vivon, ni prezentas antaŭ Dio preĝante ĉion, atendante la lumon kaj la orientigon de LI. Li parolas pri tio, kia kvieto lin dum tio ple-

nigas kaj li povas daŭrigi sian vojon plifortigita. Dume li jam preĝas por sia amiko, kiel tio simple venas el lia koro kaj ankaŭ dirante post tia preĝo: „Jen la plej bela donaco, kian vi al mi povis doni.” Lia ĝisnuna pieco lin per tio ne povis regali. Donace li trovis certan manieron de repaciĝo, kian li el sia homa potenco ne povis trovi. Tiaj homoj travivas, ke la Sinjoro troviĝas aktuale kaj vive en proksimo, se oni lin el aŭtenta koro alvokas, kaj li transformas onian tutan vivon. Kio en tiaj momentoj okazas, povas nur Dio scii. Mi ne povas pri tio atesti grandskalajn sukcesanoncojn. Ĉio-ĉi estas la efiko fare de la Sinjoro. Sed temas pri spertoj, kiuj min igas troviĝi tre proksime al la Sinjoro. En tiu ĉi servo mi rajtas lerni, kiel sperti la gvidadon fare de la Sinjoro. Tio estas la beno kaj la granda ĝojo, kio nin en ĉio daŭre tenas kaj lasas nin fari kontinuon.

Ankaŭ la telefonaj interparoloj kaj la korespondado kun multaj, kiuj intertempe legis mian libron aŭ min konis pro miaj prelegoj, ŝtopas grandan parton de miaj tagoj. Tio kondukas min ankoraŭ pli motivite en la preĝon kaj en tiun lukton, por ke mi anoncu la tutan konsildecidon de Dio, la evangelion de la graco de Dio kaj ke mi konduku tiujn homojn al Dio, lia vorto kaj graco, ja Li havas povon superkonstrui kaj disponigi heredaĵon al la sanktigitaj (komp. *Agoj* 20).

## 10. Perspektivo

Retrorigarde sur mian kredvojon mi vidas min poetape en false komprenita subordiĝo, en kiu mi ne ĉiam sen malhelpo povis postsekvi mian profesion, ĉar iu alia volis min subigi

laŭ siaj arbitraj imagoj. Tiel mi dankas mian Dion kaj Patron, ke Li min ĉiam denove liberigis el falsa humilo kaj donis al mi kuraĝon de libero postsekvi la vorton de Li. Estas mia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu min alvokis kaj min ankaŭ volas formi por sia servo.

## A. La vojo de la fido – kiel la obeo el la fido

*„Per la fido Abraham, vokite, obeis eliri en lokon, kiun li estis ricevonta kiel heredaĵon; kaj li eliris, ne sciante, kein li iras”* (Hebreoj 11,8).

Per la fido obeema trovis Abrahamo sian lokon antaŭ Dio kaj atendis je la promesoj. Li ricevis la povon, ĉar li prenis por fidela tiun, kiu la promesojn al li donis. Li prenis sin por fremdulo kaj sen la ŝtatanecaj rajtoj sur la tero kaj sopiris je la ŝtataneco en la ĉielo. Tial Dio ne cedis sin mem nomi lia Dio, ja Li preparis por li la urbon, la ĉielan Jerusalemon.

Tio ĉi estas la bazaj linioj, kiuj ankaŭ por mia fido estas la ruĝa fadeno. El tiu ĉi fono oni evas la titolon de tiu ĉi libro ***En la erupto de la fido****…* finfine kompreni. Temas pri la erupto, kiu ne estis tiom kaŭzita fare de iu homa agado, sed fare de la alparolebla Dio, kiu inter multaj ankaŭ min prenis en sian servon. Ĉar mia senditeco venas de Dio, mi rajtas malpli alpreni sendecon donite de la homoj, kiuj Dion ne konas. Pro tio en la mezo troviĝas la libro de la vorto, kiu okupis plene mian koron: MI VOLAS VIAN OBEEMON. La obeemo, kia decas por la Sinjoro, ne rajtas esti dividita kun la pretendoj de la homoj. La obeemo al la homoj ĉiam restas la al Dio subigita obeo. Tio povas portempe ankaŭ konduki en solecon, ta-

men ĉiam denove en animan komunecon kun tiaj, kiuj Dion povas ame koni kaj Lin servi.

Ni vivas apud la tuta plago en la *tempo de la plenumiĝo* de ĉio tio, kion Dio per la buŝo de la profetoj anticipe anoncis (komp.: *Agoj* 3,18). En tiu ĉi tempo ni estas vokitaj, nian opinion pri Dio ŝanĝi; pri Dio denove pensi tiel bone, kiel Li vere estas. Ja lia vereco kaj efektivigopovo devus nin denove difini. La mesaĝo de la evangelio restas: *La ĉiela regno alproksimiĝis*. Ne temas do nur pri punktuala savo, sed ankaŭ pri nova vivmedio, ene de kiu la Spirito de Dio alprenas la superregadon. Tiam ankaŭ la tempo de la revivigo venos de la apero de la Sinjoro (komp.: *Agoj* 3,19). El tio fariĝos nove spertata ĝojo pri la agado de Dio en nia vivo, kiu efektivigos novan kunligitecon inter ni, ene de kiu multo estos portata de la amo.

## B. La sinrevelacio de lia komunumo

Kiam nia vivo estos lumigita de la atendo de la manifestiĝo de Jesuo, de la restaŭro de ĉiuj aferoj, pri kiuj parolis la profetoj jam de ĉiam (komp.: *Agoj* 3,21), tio restos lia komunumo. Mi malpli supozas fortan ondon de konvertiĝoj tie kaj tie aŭ ian duan reformacion, sed mi supozas la manifestiĝon de lia komunumo en la tempo de la plago kaj elprovo, kiun la Sinjoro por si preparas kaj ĝin alprenos enĉielen. Same, kiel dum la pentekostaj tagoj neniu katolika aŭ ortodoksa aŭ evangelia komunumo aŭ io simila troviĝis, tiel ankaŭ okaze de la elpreno de la komunumo per Jesuo neniajn tiaspecajn markojn por sin identigi prezentos la komunumo. Lasu ni nin

restaŭri en tiu origineco, kiel de Dio ĉiam volite. Paŭlo elparolas tiun misteron de Dio tiel:

*„Al mi, kiu estas malpli ol la malplej granda el ĉiuj sanktuloj, ĉi tiu graco estas donita, por ke mi prediku inter la nacioj la neesploreblan riĉon de Kristo; kaj por ke mi klarigu al ĉiuj, kia estas la dispono de la mistero kaŝita tra ĉiuj mondaĝoj en Dio, kiu kreis ĉion; por ke nun konatiĝu al la regantoj kaj aŭtoritatoj en la ĉielejoj, per la eklezio, la multnombra saĝeco de Dio, laŭ la eterna decido, kiun Li faris en Kristo Jesuo, nia Sinjoro, en kiu ni havas kuraĝon kaj alkondukon en fidado per nia fido al li"* (Efesanoj 3,8-12).

Ni homoj estas vokitaj penti, nove pensi akorde kun Dio, nin konverti al Dio, veni sub lian kondukon kaj ĝisatendi la alvenon de Jesuo. Ĉion alian faros Dio, kelkion ankaŭ per la graco, kiu por ni ne restos senefika.

Kiel forte en niaj tagoj la atestado pri la Sankta Skribo estos nove serĉata kaj ankaŭ trovata, la viva diosperto per la fido en Jesuon. La prilaboro de la biblia instruo estos multloke farita ĝenerale alirebla, kiel same ankaŭ la reciproka atestinterŝanĝo survoje al la celo kreskas. La aŭtentaj kaj la malaŭtentaj aferoj povos esti ĉiam pli klare distingataj unu disde la alia.

Sed la finfine komuna afero estas kaj restas la korpo de Kristo, tiu *unu komunumo de Dio*, kiu kunvenas en iu ajn loko. *„Ĉar en unu Spirito ni ĉiuj baptiĝis en unu korpon, ĉu Judoj aŭ Grekoj, ĉu sklavoj aŭ liberaj, kaj ĉiuj estas trinkigitaj en unu Spirito"* (1 Korintanoj 12,13).

El tiu ĉi kompreno ankaŭ eliros neniu difinita kreddirekto. Ne malmultaj kun rajto vivas sub la konduko de la Sinjoro, sen serĉi certan kreddirekton. Grave estas, ke ĉiu trovas la

puran vorton de Dio kaj la plenan kredobeon kaj kondukadon fare de la Sankta Spirito en sia komunumo trovas kaj povas tion dividi kun la aliaj. Se iu tion ne trovas, bonvolu survojiĝi kaj iri la vojon kun la Sinjoro. Tiu ekkonos la vojkamaradojn.

Konsiderante ĉian spondanecon kaj malfermitecon restas la marko de la insisto kaj ordo kiel sana signo de certa komunumo. Paŭlo praktikis certan koncepton de sia instruo kaj ordon de la komunuma vivo (komp.: 2 *Tesalonikanoj* 2,15), sed ankaŭ disdonon de la taskoj al unuopaj kunlaborantoj (komp.: 1 *Korintanoj* 16,10-18). Tiel ia organizaĵo, adaptita al la ĉiamaj tempaj cirkonstancoj, tamen estas al la biblia instruo konforma praktiko.

Koncerne la demandojn pri la reciproka konduto (*Romanoj* 12,3-21) estas bezonata komuna kapablo kunporti, per kiu oni prenas unu la alian per amo. *„Ni, kiuj estas fortaj, devas porti la malfortaĵojn de la nefortaj, kaj ne plaĉi al ni mem. Ĉiu el ni plaĉu al sia proksimulo pro tia bono, kia taŭgas por edifi"* (Romanoj 15,1-2).

La eta grego (*Luko* 12,32) restu orientiĝinta al la disĉipleco sur la fundamento de la vorto de Dio kaj sur la kresko de sia komunumo, per kiu la tuta larĝo de ties efikado montriĝu.

La komunumo havas Jesuon Kriston por sia kapo kaj la Sanktan Spiriton por sia konsilanto. Ĉiuj aliaj servoj en la komunumo estu kiel la gractalentoj subigitaj al la Sinjoro. Sed tiaj servoj estu en la komunumo ankaŭ rekonitaj kaj estimataj.

Ĉia servo en la komunumo, ankaŭ tiu de la pastoro, de la instruisto … estas parto kaj tiel bezonanta kompletigon per la

servo de ĉiuj membroj. *„Sed al ĉiu  el ni la graco estas donita, laŭ la mezuro de dono de Kristo”* (Efesanoj 4,7).

La celo de la komuna servo en la komunumo sub la kapo Jesuo estu la kresko de la kopo ĝis ĝia memedifo en la amo (*Efesanoj* 4,16).

*„Nun al Tiu,*
*kiu povas tre abunde fari,*
*super ĉio, kion ni povas peti aŭ pensi,*
*laŭ la potenco, kiu energias en ni,*
*estu gloro en la eklezio*
*kaj en Kristo Jesuo ĝis ĉiuj generacioj*
*por ĉiam kaj eterne.*
*Amen”*
Efesanoj 3,20-21

## C. Kaptu la savon!

Estimata leganto! Nun antaŭ viaj okuloj troviĝas mia vivatestado, la kuro de mia ekpreniteco fare de Jesuo. Mi ne deziras tiun ĉi libron fermi, sen vin motivigi, ke ankaŭ vi mem malfermu la pordon por Jesuo. Li estis levita sur la krucon kaj per la resurekto, por ke ĉiu, kiu en lin kredas, havu la eternan vivon. Vi ricevas vian partoprenon je tiu vivo, se vi vin deturnas de ĉia sendieco, alprenante Jesuon via persona savanto kaj

Sinjoro, kiel ankaŭ la Patro lin estis sendinta. Vi povas tion esprimi per sekva preĝo:

**Sinjoro Jesuo, ankaŭ mi scias pri mia manko,**
**pri miaj personaj pekoj**
**kaj pri mia perditeco, estante sen vi.**
**Mi vivis ĝis nun sen vi.**
**Jen LA peko, kiun mi antaŭ vi konfesas.**
**Mi dankas vin, ke vi min tiel amis,**
**ke vi oferis vian vivon.**
**Hodiaŭ mi dankeme alprenas vian savservon,**
**mi vin alprenas kiel mian savanton kaj Sinjoron.**
**Venu en mian vivon kaj min konduku!**
**Vi staras antaŭ la pordo de mia vivo**
**kaj frapetas sur ĝin.**
**Mi nun min al vi malfermis, por ke vi min**
**allasu al la tabla komunumo de la vivo.**
**Estu danko al vi el mia tuta koro!**
**Vi estas mia paŝtisto, nenio al mi mankos.**
**Amen.**

Se vi faris tiun ĉi decidon kaj en ĝi fidele restas, mi bondeziras al vi pro via NOVA VIVO en Kristo Jesuo. Konstanta konfida pensdialogo kun LI en preĝo kaj daŭra konsidero de la vorto de Dio, kion vi ĉiam denove laŭeble konsumu, kaj la varmkora komuneco kun la gefratoj en kredo, kiuj same konas Jesuon, lin amas, estas la plej bona nutra bazo por tiu ĉi nova vivo, kiu faras onin feliĉa.

***

## *Postvorto*

La aktualeco de tiu ĉi libro dum lastaj jaroj kreskis. La vorto de la Sinjoro al Jeĥezkel faras min trafita:

*„Kaj nun, ho filo de homo, Mi starigis vin kiel observanton por la domo de Izrael; kaj kiam vi aŭdos el mia buŝo vorton, avertu ilin en Mia nomo. Kiam mi diros pri la malvirtulo: Malvirtulo, vi devas morti; kaj vi ne parolos, por averti la malvirtulon kontraŭ lia konduto; tiam li, la malvirtulo, mortos pro sia malvirteco, sed lian sangon Mi repostulos el via mano"* (Jeĥezkel 33,7-8).

Ni devus klare diri, ke Dio estas konkreta kaj viva, kiun ni rajtas alvoki, kiu pardonas nian tutan kulpon kaj nin prenas en sian rilaton kaj nin renovigas.

La skribistoj kaj fariseoj demandis al Johano: „Kiu vi estas, pro kio vi baptas, en kies povo vi tion faras kaj instruas?" Ili serĉis ĉe li nur homan aŭtoritaton. La spiritaj gvidantoj ricevis tiutempe sian komisiitecon de la povuloj de tiu ĉi mondo. Eĉ la ĉefpastro estis instalita fare de la romia okupacia povo.

Tiel ili la proponon de Dio malakceptis kaj ne partoprenis en tio, kio faris la mesaĝon de Johano Baptisto, nome malfermiĝi por la regno de Dio, por la alveno de la reĝpovo de Dio, penti kaj konverti sin al Dio. Ili restis kontentaj pri si mem per sia memjusteco sen Dio.

Vere troviĝis templo, troviĝis diservoj en tiu templo, okazis kunvenadoj en sinagogoj, la legadoj en la Sankta Skribo, okazis eksplikadoj de la Skribo. Tamen estis Johano

Baptisto sendita, nome de Dio mem. Troviĝas certa servo, per kiu Dio parolas per ŝoka maniero, alimaniere ol oni estas alkutimiĝinta – kompreneble ĉiam en rilato al la revelacio, al la tuta Sankta Skribo. Tiu parolo de Dio estas la granda graco por ĉiu en nia tempo. *„Ne obstinigu vian koron, kiel en la indignigo, kiel en la tago de la tento en la dezerto”* (Hebreoj 3,8).

Neniu alia aparteno havas tiel larĝajn konsekvencojn, kiel la aparteno al Jesuo Kristo, kiu estas viva, resurektinta kaj kiu estas la kapo por la korpo, kiu por li estas la komunumo. En ĝin ankaŭ mi estis prenita – ne per suĉula bapto – sed, kiam mi min deturnis de mia ĝistiama vivstilo kaj mi alprenis Jesuon per savodona kredo kiel mian savanton kaj Sinjoron.

Tiu alpreno, plenigita de la fido, estis realigita, kiam mi min devige ligis kun mia Sinjoro Jesuo Kristo. Kaj tiel mia kredkonfeso estas: „Jesuo Kristo estas la Sinjoro je la gloro de Dio Patro” kaj ne plu „romkatolika”, ne „evangelia”, ne „ortodoksa”, ne „anglikana” aŭ ia ajn cetere. Mi apartenas al la Sinjoro kaj mi rajtas min identigi kun li.

Paŭlo diris: „Mi kredas ĉion, kion Dio parolis per la profetoj kaj per la Leĝo tra la Sankta Spirito”, antaŭ ĉio, kion li per sia Filo parolis al ni. Estas skribite en la Sankta Skribo. Tiel ni volas nek por unu piedspuro forlasi la Sanktan Skribon, sed ni volas resti sur la grundo de nia kredo, sur la fundamento de la apostoloj, reteni tiel la instruon de la apostoloj en la Sankta Skribo.

La komunumo, al kiu mi apartenas, ne estas konstruita surbaze de tiu aŭ alia homa persono, ankaŭ ne sur Petro, sed sur Jesuo Kristo, la fundamenta ŝtono, kiu ligas ĉion. Kaj neniu povas meti alian grundon, kiu estis metita, krom Jesuo Kristo. Sur lin indas plukonstrui, sin enkonstrui, por ke ni fariĝu la templo de Dio, kie Dio ĉeestas, kie la Spirito de

Dio agas kaj Dio en li apoteozita estas laŭ la maniero, kiu Lin decas. Multaj aferoj el la pagana mondo enfluis kristanecon, ĉar ne okazis konvertiĝo. Tiel naskiĝis la falsa eklezio. Ĉu ni pro tio ne havas elireblon el tiu ĉi blinda strato?

Tamen, estas eble returni sin al la Sinjoro, ĉion antaŭmeti antaŭ la Sinjoron kaj alpreni la ordon, kiun la Sinjoro donas kaj laŭ ĝi vivi. Jesuo diras: *„Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj,* (nome, per religiaj tropostuloj) *kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza"* (Mateo 11,28-30). Komparu ankaŭ: Agoj 15,10.

Ni observu la patrinon de Jesuo laŭ lia korpo, Marian, kiu el sia kredobeo permesis, ke okazu, kion Dio diris pri ŝia vivo kaj poste ŝi diras al la homoj: *„Faru ĉion, kion li* – la filo de Dio – *al vi diras!"*

Tiel ni konsentas kun Maria, ke ne estas en ordo, se ni atribuas al ŝi la gloron, kian nur Dio meritas. Kaj pro tio ni ne ripetas la praktikon, doni al Maria gloron kiel al reĝino de la ĉielo, ja unu nura estas la Reĝo, la Sinjoro de la sinjoroj, Jesuo Kristo. En la Malnova testamento troviĝas parolo pri certa reĝino de la ĉielo, pri la pagana diino de fertileco Semiramis. Ni ankaŭ ne dividas la opinion, ke ni devus konsekri nian koron al Maria, kiel la papoj faris.

Paŭlo diras: *„Ĉio apartenas al vi, sed vi apartenas al Kristo* (komp.: 1 Korintanoj 3,21-23) – *kaj al neniu alia krom al Kristo."* Kiu Dion ne serĉas, tiu Dion ne trovos, tiu restas ene de la kreitaro, ene de la substituaĵo de Dio. Kaj tio estas la idolana servo. Dio diras: *„Se vi estas en plago, alvoku min"* (komp.: Psalmo 50,15). Kaj tiuj, kiuj la nomon de la Sinjoro alvokos, estos savitaj!

Tiu ĉi libro pritraktas la efikadon de Dio en nia vivo, en la homa vivo, kiu estis tuŝita de Dio kaj tiel trovis vojon sub

la gviado de Dio. Sur tiu vojo postuliĝas nepraj *plibonigoj*, kiuj en siaj konsekvencoj fariĝis videblaj tiel, ke mi ĉesigis mian servon de paroĥestro.

Nome, en la tuta Sankta Skribo troviĝas neniu mencio pri *konsekrita sacerdoteco*, kiel mi tion praktikis kiel la katolika paroĥestro. Ni havas mirindan ĉefpastron, kiu sian pastrecon efektivigas en la regiono de la plej sankta areo antaŭ la trono de Dio en la ĉiela mondo, kiu sur la tero bezonas neniun anstataŭanton, ĉar la decidaj aferoj okazas antaŭ la vizaĝo de Dio.

Kiam ni kunvenas antaŭ la Sinjoro, ni rigardas supren al la inicianto kaj finplenumanto de nia kredo, al Jesuo Kristo. En la fido ni ricevas la antaŭpagon de la heredaĵo; ni levas Dion en nia adorado kaj dankesprimado. Ni aŭdas la promesojn de Dio kaj liajn instrukciojn en la Sankta Skribo kaj ni petas ĉe Li por la adekvata rekono de Lia volo en nia ĉiutaga vivo.

Ĉar la homo ne estos savita per la sakramentoj, sed per sia kredo, se ni fidas al Jesuo, por kio li estis sendita de la Patro. Kaj li venis, por ke neniu estu perdita, sed ke ĉiu, kiu en lin kredas, havu la eternan vivon (komp.: *Johano* 3,16). Do ĉiuj, kiuj en lin fidas – tio diras, lin tiel alprenis, kiel la Patro tion volas – ricevas la dian vivon, la eternan vivon, kiu ne konas plu morton, ne konas plu pekon, malsanon, ke do estas sana, estante fonto, fluanta en eternon.

La alstrebo de la homoj unuiĝi ofte estis ribelo kontraŭ Dio, kiel ni vidas tion kaze de Babelo, kie tekstas: *„Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero”* (1 Moseo 11,4). Tiaj turpintoj en la ĉielo estas la bildo de la homa religieco. Kaj foje ili kunfalas dum unu nura horo.

La evidenta restaŭro de ĉiuj aferoj okazos fine de la tempoj. Tio okazos sub majesta juĝo fare de Dio. Sed mi atendas meze de ĉiuj plagoj en la fina tempo ankaŭ klaran revelacion de la komunumo de Jesuo. La vojo al tiu revelacio helpe de Dio kondukas nin tra la efektivigo de la promesoj de Dio, kiun antaŭvenos nova sentivo pri Dio kaj homoj, orientiĝo reen al Dio kaj la pento kaj la sperto de la pardono de pekoj. La disĉiploj demandis Jesuon antaŭ lia ĉieleniro: *„Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon al Izrael?"* (Agoj 1,6). La respondo de la Sinjoro estis, ke ni la tempolimon, kiun la Patro por tiu restarigo difinis, ne konas. Sed per tio li ankaŭ diris, ke venos tempa limo, kiam tio ĉi tamen okazos.

Dum nia generacio post preskaŭ du jarmiloj la 15-an de Majo 1948 la sur ĉiuj kontinentoj dispelita Izraelo denove estis kunvenigita por esti unu nacio, kaj restarigita estis propra ŝtato Izraelo kaj Jeruzalemo fariĝis la ĉefurbo kaj la sidejo de la registaro. Ĉu tio ĉi ne estas jam la signohava lumiĝo por la restarigo de la regno Izraelo, kian Dio faros en gloro? Jesuo sanktigos sian komunumon, la fianĉinon de Kristo, kaj ĝin purigos per la akvo de la vorto de Dio, *„por ke li sanktigu ĝin per akvolavo, kun la vorto, por ke li starigu ĝin antaŭ sia glora eklezio, ne havanta makulon, nek malglataĵon, nek ion tian, sed por ke ĝi estu sankta kaj sendifekta"* (Efesanoj 5,26).

Tiu ĉi procedo ne povas esti organizita memvole fare de la homoj, kiel oni pova organizi reformacion aŭ ekumenisman unuiĝon. Tamen ni rajtas esperi je la procedo de la purigado kaj por ĝi preĝe peti pere de nia tute persona konvertiĝo kaj refreŝigo, kiu estos al ni donacita.

Mi havas certecon, ke Dio ĉion venigos al sia celo, kiun Li antaŭanoncis. Tio estas la espero, kiun Dio donis, kaj tio fariĝis ankaŭ mia espero en tiu ĉi libro.

# Aldonaĵo

*(La konsekra dokumento de pastrigo en esperanta traduko)*

## Franzisko

PER LA GRACO DE DIO KAJ DE LA APOSTOLA SEĜO
EPISKOPO DE ST. PÖLTEN

Agante en la fido ni surbaze de la antaŭmetitaj kontroldokumentoj en la jaro de la savo mil naŭcent sesdek tria, la 29-an tagon en la monato Junio, la estotago de la sanktaj apostoloj Petro kaj Paŭlo laŭ la rito de la sankta roma eklezio nian amatan
J o h a n n e s   R a m e l,
la diocezan disĉiplon de la episkopa sacerdota seminario, la diakonon, elprovita sub la ĉeesto de la Sankta Spirito starigas en la pozicion de

**SACERDOTECO +)**

Tion ĉi ni konfirmas per la propramana subskribo kaj per nia sigelo valida.
El nia dioceza sidejo ĉe la sankta Hipolito en Aŭstrio, la 29-an tagon de la monato Junio en la jaro de la Sinjoro 1963

+ Franziskus Zak
Episkopo

+) En la latina origina dokumento „PRESBYTERATUS“ –, kio laŭvorte signifas „la presbitera servo” kaj ne la sacerdoteca servo. Ĉi tie oni vidas, ke tra ĉiuj jarcentoj eĉ en la roma katolika eklezio ekzistas faka esprimo por konsekrita sacerdoteco.

## Aliaj publicaĵoj
(en la germana lingvo):

**Brief eines ehemaligen Pfarrers**
an seinen Schulfreund
Selbstverlag, Pb. 48   ISBN 3-9500771-1-1

VIDEO

**Der Aufbruch eines Pfarrers**
aus der Röm. kath. Kirche
Alphaplus W. Bartl,  Gmunden,

**Kontaktadreso:**
*Johannes Ramel*
*Neudastr. 10*
*A-3375 Krummnussbaum*

*Tel +43 (0)2757 – 84 31*
*E-Mail: ramel.johannes@utanet.at*
*web.utanet.at/johannes.ramel*